

EL POPOLA
CINIO

3^a
1965





Konduki Akyon sur Monton

Foto de Jang Bingven

Ĉefa Enhavo

Sur la kovrilo — Ĝoja Kunveno en la Somera Infana Tendaro

Foto de Ĝu Jongking

Por Morgaŭ

La Infanoj de la Nova Ĉinio

Antaŭenmarŝo de la Tibeta Historio De Najlo-importo Ĝis Maŝin-eksporto

La Civila Aviado de Ĉinio

Ŝanĝoj en la Fruktoproduktejo Kamparo sur la Vojo de Elektrigo kaj Mekaniko

Rakonto pri Blindaj Geedzoj

Kultura Husaro

Konstrui Novan Domon (Rakonto)

Por Savi Infaneton de Laboristino

Pentraĵoj de Infanoj (Bildpaĝoj)

Nova Moro de Geknaboj

Astronomia Grupo de Junaj Pioniroj

Komparo de Infanaĝoj

La Unua Tago (Poemo)

Historio de Liberigita Servutulo

Asu Badi

En Tribunalo de Malamiko

Surpriza Atako

La Voĉo de la Popolo de Suda Vjetnamio

Fiera Rano (Fablo)

Sporto

Veĵcio (Ĉina Ŝako)

Eduko de Etuloj

Post la Kurso

Esperanto Marŝas

Sur Nia Librobreto

Sur la dorskovrilo — Peonioj

Foto de Sun Kiaŭsen

ALDONO:

Por Solvi la Problemon de Suda Vjetnamio, antaŭ Ĉio Usono Devas Retiriĝi el Suda Vjetnamio Subteno al la Vjetnama Popolo kontraŭ la Usona Agreso Estas la Internaciisma Devo de la Ĉina Popolo

Deklaro de la Naciliberiga Fronto de Suda Vjetnamio pri Intensigo kaj Disvastigo de Agresa Milito al Suda Vjetnamio Fare de la Usona Imperiismo



POR MORGAŬ

La infanoj estas "la morgaŭo" de la homaro.

Socioj kun malsamaj reĝimoj kreas por si malsamajn "morgaŭojn".

La estonto de socialismo estas komunismo, la plej alta idealo de la homaro. Tial la "morgaŭo" — la infanoj de la nova Ĉinio kreskas sub la komunisma edukado kaj estos la daŭrigantoj de la komunisma afero.

Ankaŭ en la malnova Ĉinio, oni parolis pri tio ke "la infanoj estas la mastro de la estonto". Sed la infanoj kiujn ili priparolis, estis nur la popolon plu ekspluatantaj gesinjoretoj el familioj de la ekspluatantaj klasoj. Kaj la infanoj de la vasta laboranta popolamaso neniam ĝuis la honoron de la "estonta mastro". Same kiel siaj gepatroj, ili vivis mizere en suferoj de frosto kaj malsato. Iuj el ili fariĝis sklavoj de la bienuloj aŭ kapitalistoj en la aĝo de malpli ol 10 jaroj. Iuj vagis sur stratoj elfosante siajn nutraĵojn el amasoj de forĵetaĵoj. La vortoj "lernado" kaj "higieno" estis tute senrilataj al ili.

La ĉina revolucio plene frakasis la regadon de la ekspluatanta klaso, kaj faris la vastan amason de infanoj vere grava kiel la "morgaŭo de Ĉinio".

Dank' al la disvolviĝo de sanigaj aferoj por la virinoj kaj infanoj, kaj de la edukado de infanoj, la ĉinaj infanoj jam estas protektataj per la bonstatigaj servoj de la socio kaj havas eblecon vizitadi lernejojn. Malaperis almozuletoj kaj vaguletoj. Tre malofte krimis la junaj homoj. La infanoj estas edukitaj konsideri laboradon glora afero kaj ekspluatadon hontidaĵo, zorgi pri sia kolektivo kaj helpi la aliajn. Ili arde amas pacon kaj forte malamas imperiismon, precipe la agresadon de la usona imperiismo.

Por eduki la infanojn en generacion kapablan daŭrigi la grandan aferon de revolucio, la Kompartio kaj la ŝtato, la socio kaj la familio ĉiuj kune kreas por ili bonajn medion kaj kondiĉojn de edukado en diversaj sferoj per ĉiaj rimedoj. Niaj ludiloj, legaĵoj, kinofilmoj, teatraĵoj, radielsendoj k. c. ĉiuj ludas bonan rolon en la infanedukado.

La lernejoj zorgas ne nur pri la klerigado kaj fizika kulturo de la infanoj, sed eĉ pli multe pri la kulturo de ilia komunisma moralo, ke ili lernu diligente kaj progresu kun la tagoj. La infanaraj organizoj kiaj la Ĉina Junpionira Organizo, Palacoj por Infanoj, Domoj de Geknaboj k. c. ĉiuj zorgas pri helpado al ĉiufanka disvolviĝo de la infanoj, ke ili fariĝu kleraj laboruloj kaj persistaj daŭrigantoj de la revolucio.

La honoran taskon de instruistoj plenumas en efektiveco ne nur la profesiaj instruistoj en la lernejoj, sed ankaŭ la onkloj laboristoj kaj soldatoj, avoj komunumanoj kaj multaj aliaj kiuj travivis malfacilajn jarojn en la revolucia batalado — ĉiuj ĉi tiuj estas instruistoj de klasa edukado por la infanoj. Ĉiuj revoluciaj popolanoj diligentas elkulturi daŭrigantojn por la "morgaŭo" de la revolucio.

Tiu ĉi numero eliras okaze de la "Unua de Junio", la Internacia Infana Tago, kiun la tuta mondo celebras. Ni dediĉis kompare multe da paĝoj al la vivo de la ĉinaj infanoj, por esprimi nian gratulon, kaj samtempe por komprenigi niajn legantojn pri la "morgaŭo" de Ĉinio.

La Red.

LA INFANOJ DE LA

LA infanoj de la nova Ĉinio kreskas sane kaj feliĉe, edukate de la komunisma ideologio, ĉiam kaj ĉie sub la zorgado kaj kulturado de la Komunista Partio de Ĉinio kaj Prezidanto Maŭ.

La infanoj, en la nova Ĉinio, estas rigardataj kiel daŭrigantoj de la revolucia afero. Zorĝon kaj aranĝon pri iliaj vivo kaj bonstatigo la ŝtato donas unuavice. Samtempe la lernejoj, familioj kaj la tuta socio atentigas ĉiam pri ilia klerigado kaj progresado en komunisma ideologio. Ili fariĝos laboruloj kun socialisma konscio kaj klereco. Ili fariĝos la nova generacio havanta grandan revolucion idealon kaj noblan animon por daŭrigi la komunisman revolucion.

HARDATA EN LA REVOLUCIA FAJRO

La ĉinaj infanoj havas sian gloran revolucionan tradicion. Sub la gvido de la Kompartio,

jam en la tempo de la Unua Enlanda Revolucia Milito (1924-1927), establiĝis en ĉiuj revolucionaj bazoj la infanara organizo Ligo de Infanoj. Multaj infanoj firmvole luktadis kontraŭ la malamikoj, kaj iuj el ili eĉ sin vicigis en la malfacilega Longa Marŝo de 25,000 Lioj. En la tempo de la Kontraŭ-japana Rezistmilito, en ĉiuj liberigitaj regionoj fondiĝis la Ligo de Infanoj. Prezidanto Maŭ tiam kun granda entuziasmo alvokis pere de la gazeto *Limregiona Infanaro*, ke la infanoj leviĝu, lernu rimedojn por liberiĝi el sub la jugo de la japana imperismo kaj faru sin mastroj de la nova epoko. En tiu tempo la membroj de la Ligo de Infanoj firme helpis la armeon per gardstarado, kaptado de spionoj, vojevizado por la trupoj, transsendis informojn, prizorgis familianojn de revolucionaj militistoj, diligente lernis kaj eĉ faris batalojn rekte kontraŭ la malamikoj. Ili tuj kolektiĝis je ekfajfo kaj ricevinte urĝan leteron kun koko-

Trafika policano rakontas al junaj pioniroj revolucionajn historiojn.




NOVA ĈINIO

plumo ĉiuj ekagis vige, plenaj de revolucia entuziasmo. La heroaĵoj de la infanoj enskribis brilan paĝon en la historio de la ĉina revolucio.

Post la fondiĝo de la nova Ĉinio, la infanoj pli viglaj ol antaŭe daŭre disvolvas sian revolucionan tradicion. La vaste konata "heroa infana okavoja armeo" ĉe la batalfronto en Fugian-provinco, kaj multaj aliaj infanaj milicanoj lertaj en pafado ĉiuj elkulturiĝis kaj hardiĝis en praktika luktado sub la edukado de la revolucionaj antaŭuloj. Ĉe la marbordaj frontoj en la provincoj Fugian, Ĝegiang, Ŝandong, Giangsu kaj Guangdong iuj el la kaptitaj sekretaj agentoj kaj spionoj estas malkaŝitaj sub la viglatentaj kaj subtilaj okuloj de la infanoj. Liu Venhŭe kaj Ĝang Gaŭkian, kiuj oferis sian vivon en firma batalo kontraŭ feŭdaj bienuloj kaj kontraŭrevoluciuloj por protekti proprajojn de la popolkomunumoj, estas imitindaj modeloj por ĉiuj infanoj de la lando.

AMEGI LABORON

La ekspluatanta klaso inokulas mallaboremmon al siaj gefiloj, la nova Ĉinio edukas la infanojn ami laboron, kaj prenas tion kiel la plej gravan ĉeneron por ilia progreso en moralo, intelekto kaj fizika kulturo. Oni edukas ke la infanoj eksciu jam en la komenco de sia kompreno, ke "ĉion kreas laboro", ke ili ekhavu la penson ke "laboro estas glora", kutimiĝu al laboro, ke la diversaj manĝaĵoj kreiĝis nefacile, kaj hontinde estas ekspluati la fruktojn de alies laboro. En la kamparo, kiam venas sezono de intensa agrokultura laborado, la infanoj help-laboras laŭ sia kapablo. Ekzemple, dum la aŭtuna rikoltado ili organizas sin en kampanjo grenkolekta por ke "perdiĝu neniu grajno", kaj en la vintro, ili organizas sin en sterkokolekta kampanjo, ke ili liveru po "korbo da fekaĵo". En la ordinara tempo, la infanoj sin okupas pri arboplantado, kulturado de ricino, sunfloro kaj aliaj floroj, hibridigo, greftado, kulturado de nova specio de plantoj, k. a. La infanoj en la urboj iras al la parkoj por sarkado kaj irigaciado. Ili purigas stratojn, teni la ordon ĉe publikaj lokoj, helpas maljunulojn aŭ kriplulojn ĉe haltejo de aŭtobusoj kaj trolebusoj kaj blindulojn transiri



Infanoj sin ekzercas pri paraŝutado.

stratojn de vigla trafiko. Ili ekstermas muŝojn, ratojn, moskitojn, litocimojn k. a. fiinsektojn, kaj propagandas pri higieno. Ĉio ĉi estas konstantaj aktivadoj de la infanoj.

LERNI, LERNI KAJ LERNADI

"Lernu diligente, progresu kun ĉiu tago", tiu ĉi direkto de progreso montrita de Prezidanto Maŭ al la ĉinaj infanoj, estas ankaŭ direkto de la nova Ĉinio en scienca kaj kultura edukado al ili.

Por ke la infanoj povu bone lerni kaj posedi sciojn de kulturo kaj scienco, la ŝtato faris multajn laborojn krom la normalan edukadon de la lernejoj. En ĉiuj lokoj troviĝas multe da agokampoj por la infanoj, nome, la "Palaco por Geknaboj", "Domo por Geknaboj", "Geknaba Stacio de Scienco kaj Tekniko", "Amuzejo de Infanoj", "Infana Biblioteko" k. s. Per tiuj establaĵoj, oni gvidas la infanojn en aktivadoj de scienco, tekniko, literaturo, bel-kaj meti-arto. La eldonejoj de infanaj legaĵoj ĉiujare eldonas por la geknaboj instruajn kaj interesajn librojn kaj periodaĵojn. Prenu kiel ekzemplon la okazon de la "Unua de Junio", la Internacia Infana Tago en la pasinta jaro, la Ĉina Eldonejo por Geknaboj eldonis sep libroseriojn de *Fajreroj de Komunismo*, *Geknaba Manlibro pri Sciencaj kaj Teknikaj Aktivadoj*, *Mekanikaj Ludiloj*, *Rakontoj pri Sciencistoj*, *Marŝu al la Morgaŭa Scienco* k. a. La eldonkvanto de *La Ĉinaj Geknaboj*, ĵurnalo speciale redaktata por infanoj, jam atin-

gis pli ol 4,200,000 ekzemplerojn. Krome, la gazetoj *Amiketoj*, *Infanaĝo*, *Literaturo por Geknaboj*, *Gimnaziano*, *Ni Amas Sciencon* k. a. grandkvante eldoniĝas por doni riĉan spiritan nutraĵon al la infanoj.

La Centra Popola Radio-stacio regule elsendas siajn programojn titolitajn "Stelo kaj Torĉo" por la junaj aŭskultantoj kaj "Malgranda Trumpeto" por infanoj kiuj ankoraŭ ne atingis la aĝon por viziti lernejon. Troviĝas en diversaj lokoj de la lando multe da radiostacioj, kiuj elsendas ĉiutage porinfanajn programojn. La kinofilmaj farejoj produktas ĉiujare por la infanoj instruajn kaj interesajn filmojn de rakontoj, movbildoj kaj sciencaj scioj.

KE LA VIVO PLIRIĈIGU

Tre riĉa kaj varia estas la kulturamuza vivo de la infanoj, kaj sporto ilin plej interesas.

Post la fondiĝo de la nova Ĉinio, la mezgradaj kaj elementaj lernejoj, la infanaraj postlecionaj lernejoj de fizika kulturo ofte organizas infanojn en diversaj aktivadoj de muziko, danco, pilkoludo, naĝado, ekskurso, vojaĝo, montgrimpado k. a. Cetere, en diversaj provincoj kaj urboj okazas regule diversaj sportokonkursoj de infanoj. Ekzemple, en 1963 okazis la Tutlanda Geknaba Kunveno de Trakokampaj Sportoj kaj la Tutlanda Tablotenisa Ĉampioneca Konkurso por Geknaboj, komence de 1964 okazis la Knabina Tablotenisa Ĉampioneca Konkurso de Dudek Unu Provincoj kaj

Municipaloj kaj poste en feb., 1965, en Ĉangŝa, Hunan-provinco, okazis alia Tutlanda Knabina Tablotenisa Ĉampioneca Konkurso de Dudek Unu Unuoj. En multaj urboj establiĝis apartaj kinnejoj por infanoj, kaj en Pekino, Ŝanhajo, Liaŭning k. a. establiĝis infanaj artaj teatroj kaj infanaj pupoteatroj speciale ludantaj por la junaj spektantoj. Ĉiujare en la somera kaj vintra libertempoj la infanoj havas riĉenhavajn kolektivajn aktivadojn. La junaj ŝakistoj Ĉen Ĝude kaj Hu Jonghua, ĉampionoj en la tutlanda turniro de vejĉio kaj la ĉina ŝako majstriĝis en la aĝo de dekkelkaj jaroj dank' al flegado de famaj ŝakistoj kaj venkis multe da veteranoj en tiu sporto.

La plena prizorgado de la nova Ĉinio pri la infanoj celas kulturi ilin en daŭrigantojn de la revolucia afero, kiuj neniam ŝanĝos sian koloron por ke ne okazu "paca evoluo" en la dua aŭ tria generacio vane dezirata de la imperiistoj. En la socialisma socio, ekzistas ankoraŭ klasoj kaj klasbataloj, kiuj ne povas ne influi la infanojn. Tial la edukado al ili pri klasoj estas tre grava. La lernejoj, familioj kaj la tuta socio faras siajn kontribuojn por plenumo de tiu ĉi nobla tasko.

Nuntempe, en la tuta lando sin trovas ne nur miloj kaj dekmiloj da gvidantoj de infanoj, kiuj amas per la tuta koro socialismon kaj la infanaron, sed pli kaj pli multe da veteranaj laboristoj, komunistoj, malriĉ-kamparanoj kaj dommastrinoj, kiuj fariĝis volontulaj gvidantoj por helpi al infanoj relerni siajn lecionojn kaj fari diversajn utilajn agadojn. Ili rakontas pri re-

Junpioniroj faras diversajn ŝipo-modelojn en la Ŝanhaja Palaco por Geknaboj.




Lernantinoj praktikas la principon de hidroelektra produktado en la Hangĝou-a Palaco por Geknaboj.





Ŝanhaja Palaco por Geknaboj.



voluciaj bataloj, kaj pri la historio de la ĉinaj laboristaj kaj kamparanaj amasoj suferintaj la subpremadon kaj ekspluatadon de imperiismo, feŭdismo kaj burokratkapitalismo, ke la infanoj jam en sia juneco konu klare, kiu estas amiko, kiu estas malamiko, kiu estas samcelano, kion oponi kaj kion subteni.

Ankaŭ la familia edukado al la infanoj komencis sian revoluciecan ŝanĝiĝon. En la malnova Ĉinio, la infanoj estis proprietaĵo de la familio, instrumento por vivtenado de la gepatroj en ilia maljuneco kaj rimedo por glorigi la prapatrojn. Nun pli kaj pli multe da familioj jam komprenis, ke la infanoj estas la daŭrigantoj de la revolucia afero, ke gravajn signifon kaj respondecon la familioj havas en la elkulturado de revoluciaj daŭrigantoj.

Anstataŭ dorloti siajn infanojn, la gepatroj iom post iom turnas siajn zorgojn al kreskado de ilia komunisma moralo, esperante ke iliaj gefiloj fariĝos novtipaj laboruloj kaj tre bone ser-

vos la laboristojn, kamparanojn kaj soldatojn. Multaj familiestroj atente edukas kaj influas la gefilojn per siaj propraj ekzemploj de amo al socialismo kaj laboro. En la urbo Ŝenjang sola en Liaŭning-provinco pli ol 50,000 laboristoj, dommastrinoj kaj ŝtataj funkciuloj propravole laboras kiel volontulaj gvidantoj de infanoj. En Luŝan-gubernio, Henan-provinco pli ol 20,000 maljunaj malriĉ-kamparanoj kaj malsupraj mez-kamparanoj rakontis siajn familiajn aŭ vilaĝajn historiojn de la mizera pasinteco.

Sub la flegado kaj prizorgo de la Partio, la ŝtato kaj la tuta socio la novĉiniaj infanoj sane kaj rapide kreskas kaj manifestiĝis ilia nobla socialisma konscio.

La 16-an de julio, 1963, tri knaboj en la provinco Hejlonggiang klopodis savi vagonaron sen timo pri vivdanĝero. Ilia heroa ago estas multe laŭdata.

Estis post ŝtormo kaj pluvego. La knaboj Ven Kinghaj, Gia Ŝuven kaj Zoŭ Hiangting trovis ke iu fervoja ponto detruigis pro inundo kaj ĝuste tiam fulme alrapidis vagonaro al la detruita ponto. Minacis urĝa danĝero. Sen timo pri frakasiĝo sub la vagonaro la tri knaboj

saltis senhezite sur la trakon kaj eksvingadis siajn ruĝajn koltukojn por haltigi la lokomotivon kun vagonoj. Ekvidinte ilian signalon la lokomotivisto sukcesis bremse haltigi la veturilon nur 30 metrojn antaŭ ili. Kiam la lokomotivisto kaj pasaĝeroj ekvidis la danĝeron ĉe la ponto, ili kun emocio brakumis la knabojn dirante: "Koran dankon pro via savo al ni ĉiuj pli ol tri cent pasaĝeroj. Vi estas vere bonaj knaboj eledukitaj en la nova socio!"

Antaŭ ne longe, en la Aŭtonoma Regiono de Interna Mongolio du mongolaj knabinoj Long Mej kaj Ju Ĵong klopodis protekti la ŝafaron de sia komunumo. Ilia kortuŝa ago ricevas senfinan laŭdon tra la lando. Estis mateno en frua printempo. La 11-jara Long Mej kaj la 9-jara Ju Ĵong paŝtis la ŝafaron de la polkomunumo anstataŭ sia patro kiu devis foriri pro io. En la tagmezo, subite alatakis neĝoŝtormo, la ŝafoj diskuris de konsterniĝo. Por protekti la posedaĵon de la kolektivo, tiuj du knabinoj postkuris 35 kilometrojn luktante la tutan tagon kontraŭ la neĝoŝtormo, sur la stepo kun malvarmego de 37 gradoj C sub nulo, malgraŭ malsato kaj frostoj. Fine ili sukcesis savi la pli ol 380 ŝafojn de la komunumo.

Alia knabino Ŝi Ĝengzi, spite vivdanĝeron elsavis siajn du kamaradojn, kiuj dronis en la torento de Tumen-rivero.

La infanoj de la nova Ĉinio ne nur montris sian heroecon agante en eksterordinara tempo, sed ankaŭ en la ĉiutaga vivo prezentas sin ĉiam zorgemaj pri la kolektivo, kuraĝaj en luktado por justeco, volontaj doni helpon kun plezuro kaj respektaj al maljunuloj, ili ne kaŝas valoraĵojn trovatajn, kaj havas la bonajn kvalitojn de kuraĝeco, honesteco kaj solidareco.

La nova socialisma Ĉinio potenciĝas de tago al tago kaj ankaŭ ĝiaj infanoj sane kreskas en novajn homojn de la socialisma socio.



Sin ekzercas grupo de kordaj instrumentoj.





Grupo de tibetaj popolaj reprezentantoj diskutas la Raporton pri Registaraj Laboroj faritan de Ĉefministro Ĝou Enlaj en la Tria Tutlanda Kongreso de Popolaj Reprezentantoj. Ĉiuj ili estas liberigitaj servutuloj.

GIAGONG:

ANTAŬENMARŜO DE LA TIBETA HISTORIO

SUR la vasta Tibeta Altebenajo, miliono da liberiĝintaj servutuloj kaj sklavoj frakasintaj la katenon de la feŭda servut-sistemo nun verkas, kun obstina revolucia spirito, novan historion de la tibetanoj.

Depost kiam efektiviĝis la demokratia reformo en Tibeto, forpasis ĝis nun nur ses jaroj.

Jarseso ja estas nur momento en la homa historio, sed dum tiu mallonga tempo la tibeta popolo jam marŝis tra pluraj eraoj.

Je la komenco de la demokratia reformo, kiam la servutuloj debutis sur la scenejo de historio, reakciaj servutul-mastroj moke diris: “Kiel la malriĉuloj, kiuj ne povas mastrumi eĉ sian zanba*-sakon, povas mastrumi ŝtatajn aferojn?” Kaj ankaŭ fremdaj reakciuloj kriaciis plenvoĉe ke “okazis homa tragedio en Tibeto”. Sed, la stariĝintaj servutuloj donis al ili firman respondon: sub la gvidado de la Kompartio, ni povis ne nur renversi la tri feŭdsinjorojn** sed ankaŭ krei tute novan socion!

Pudaj, la estro de la Paŝtista Ligo en Laŝi-ŝiango,** Ĝaçian-gubernio en norda Tibeto,

estas ĝuste tia liberiĝinta servutulo kiu persistas en revolucio. En 1959, kiam li laboris en Saŝingka kiel vojfllegisto, bedaŭrinde li estis kaptita de reakciaj servutulaj mastroj. Por akiri de li informon, la reakciaj servutulaj mastroj fortranĉis lian paron da okulgloboj kaj torturis lin. Sed despli firmiĝis lia revolucia spirito. Malgraŭ la perdo de la okulgloboj, li obstine luktis kontraŭ ĉiaj malfaciloj kaj gvidis la malriĉajn paŝtistojn batali kontraŭ la klasaj malamikoj kaj la naturo. La minacoj de la reakciaj servutul-mastroj neniam povis lin timigi; antaŭ la logo de la reakciaj servutul-mastroj li neniam ŝanceliĝis. Li ofte diris al la malriĉaj paŝtistoj: “La reakciaj servutul-mastroj estas nigraj ĝisoste kaj ni devas esti singardemaj

*Zanbao: bakita sekalfaruno kio miksitita kun butero, estas ĉefmanĝaĵo de la tibetanoj.

**Ili estas tri specoj de feŭdsinjoroj, nome: loka feŭdisma registaro, temploj kaj nobeloj. Ili posedis la tutan kamparon kaj plejparton de brutoj de Tibeto antaŭ la demokratia reformo.

***Ŝiango: Ĉina administra unuo sub distrikto.



Dum riĉa rikolto sur draŝejo de Kajsum-kamparo ĉe Najdong-gubernio, Tibeto.

kontraŭ ili eĉ dormante en nokto. La servutul-mastroj fortranĉis miajn okulglobojn kaj malpermesis min revolucii, sed mi revolucios ĝisfine! Ili malpermesis nin stariĝi, sed mi nepre fariĝos mia propra mastro!”

Liberiĝintaj tibetaj servutuloj kaj sklavoĵoj fariĝis, post la demokratia reformo, efektivaj mastroj de la lando.

Foje, en la granda korto de la eksa palaco de la “Montsuda Reĝo” Laĝiari Nangĝieĝiamcoŭ en Laĝiari-ŝiango, Laĝiari-gubernio, mi vidis kortuŝan scenon de elektado. Tiun tagon, portante la portreton de Prezidanto Maŭ en tamtamado kaj tamburado la popolamaso de liberiĝintaj servutuloj kaj sklavoĵoj de la tuta ŝiango ĝojege eniris la grandan korton de la palaco kaj elektis tie siajn gvidantojn. Iu malriĉa servutulo Samdan kun aĝo de pli ol 60 jaroj, diris al mi: “En la malnova socio, ni havis nenian rajton. Ni portis surdorse pezan selon kiel besto kaj tenis almozbovlon en mano. Sed nun ni fine fariĝis mastro kaj transprenis la regpotencon en niajn manojn.”

Nun, en pli ol mil ŝiangoj tra la tuta Tibeto estas jam plenumita ĝenerala balotado kaj ok liberiĝintaj servutuloj kaj sklavoĵoj estas elektitaj kiel reprezentantoj al la Tria Tutlanda Kongreso de Popolaj Reprezentantoj. Tra la tuta Tibeto estas pli ol 17,000 tibetanaĵoj kadroj laborantaj sur diversaj postenoj. El ili estas 1,200 tibetanaĵoj kadroj kiuj laboras kiel gvidantoj en partiaĵoj kaj


registaraj institucioj super la nivelo de distrikto.

Tiuj tibetanaĵoj kadroj, kiuj estis antaŭe malriĉaĵoj servutuloj aŭ sklavoĵoj montris sur sia posteno elstaran kapablon, kio konvinke diris ke ili ne nur kapablas mastrumi, sed eĉ povas mastrumi sufiĉe eminente.

Jangĝian, la partia sekretarino kiu estis antaŭe mizera servutulino en Ŝiartong-ŝiango, Ĉiabdoŭ-gubernio, suferis sub la vipo de servutul-mastro dum la duono de sia vivo. Post la demokratia reformo ŝi fariĝis kadri-no. En kiu ajn kampo mankis akvo, tie ŝi gvidis la amason fosi kanaletojn; en kiu ajn vilaĝo mankis agroj, tie ŝi gvidis la amason kulturi virgan teron; en kiu ajn familio okazis malfaciloj, ŝi ĝin helpis por ilin solvi. Ĝis 1963, la agro-areo de la ŝiango plivastiĝis de la antaŭaj 1,700 ke-oj (unu keo=0.66 hektaro) ĝis pli ol 2,000 ke-oj, kaj la irigaciataĵoj kampoj plimultiĝis de 400 ĝis pli ol 900 ke-oj.

Tibeto, kiu dum la pasinteco stagnadis sub la feŭdisma regado de servutul-mastroj nun jam ekmarŝas al kolektivigo kaj al la nova epoko de socialismo. Ĝis nun tra la tuta Tibeto 84% de la kamparanoj kaj 48% de la paŝtistoj jam aniĝis al interhelpaj produktogrupoj. Per la kolektiva forto ili pene disvolvis la produktadon kaj plimultiĝis la areon de la agroj


Baĝub kaj Suajnam Dorĝaj, infanoj de servutulo kaj sklavo en la pasinto, nun vizitas kune elementan lernejon en Kajsum-vilaĝo, Tibeto.



de la tuta Tibeto je 20%, kaj plialtigis la totalan produktkvanton de grenoj je 52% kompare kun tiu antaŭ la demokratia reformo. La totala nombro de la brutoj plialtigis je pli ol 40%.

Antaŭ la Liberiĝo en Tibeto estis neniuj fabrikoj, neniom da ŝoseo kaj neniuj lernejoj. Hodiaŭ, tra la tuta Tibeto establiĝis jam kelkdek malgrandaj kaj mezgrandaj fabrikoj kaj minejoj, kio malfermis la vojon por la disvolviĝo de la tibeta moderna industrio. Kune kun la disvolviĝo de la moderna industrio de Tibeto, elkreskis ankaŭ ĝia unua generacio de laboristoj. Nun en Tibeto estas jam pli ol 20,000 laboristoj, el kiuj iuj jam fariĝis gvidantoj de fabrikoj. La ŝoseoj ŝanĝis la malfacilan komunikeblecon de multaj lokoj. Nun pli ol 50,000 gefiloj de ekservutuloj lernas en pli ol 1,500 lernejoj tra la tuta regiono.

Sub la gvido de la Kompartio la stariĝintaj servutuloj kaj sklavoj reformas la socion, la naturon kaj ankaŭ sin mem kun obstina revolucia spirito. Per senlaca kaj malcedema lukto ili antaŭenpuŝas la tibetan historion.



En la Lhasa-a Aŭtoriparejo, hana laboristo Jang Giliang (dekstre) fervore helpas al la tibeta laboristino Jangĝian Ĝorgar (maldekstre) lerni manipulon de drilmaŝino.

KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ



ĈINIO REKONIS GAMBION

La 16-an de feb., 1965, la ĉina ĉefministro Ĝou Enlaj kaj la Ministro de Eksterlandaj Aferoj Ĉen Ji telegrame salutis la gambian Ĉefministron David Kvesi Ĝavara okaze de la proklamo de la sendependiĝo de Gambio, sciigante lin ke la ĉina registaro decidis ĝin rekoni. En sia telegramo Ĉefministro Ĝou Enlaj deziris al la popolo de Gambio akiri plian sukceson en sia oponado kontraŭ la imperiismo kaj koloniismo, defendado de sia nacia sendependeco kaj konstruado de sia lando.

SENARENCAJ MALJUNAJ SERVUTULOJ BONE ZORGATAJ

Miloj da senparencaj maljunaj servutuloj en Tibeto, kiuj estis senhelpaj en la malnova socio, nun ricevas varman prizorgon de la

Popola Registaro kaj popolamaso kaj ĝuas feliĉan vivon dum la maljuneco.

Antaŭ la demokratia reformo en 1959, ĉiuloke en Tibeto vidiĝis multe da senparencaj mizeraj maljunuloj. Unuj el ili estis forpelitaj el biendo de servutulo-posedantoj, pro tio ke ili maljunaj kaj senfortaj ne kapablis plu labori, aliaj senhejmiĝis kaj soluliĝis sub la kruela ekspluatado de la sinjoro-mastroj kaj triaj ne kapablis sin protekti kontraŭ naturaj katastrofoj kaj devis disiĝi de siaj edzino kaj gefiloj. Post la demokratia reformo, la Popola Registaro fondis hejmojn por maljunuloj, kaj akceptis en ilin ĉiujn maljunulojn kiuj vagis en la urboj. Ĉiuj solecaj maljunaj servutuloj loĝantaj en la vasta kamparo kaj paŝtregiono ricevis distribuitajn parcelojn, tirbrutojn, domojn kaj aliajn rimedojn de produktado kaj vivo.



GASTURBINA GENERATORO

La unua ĉina gasturbina generatoro kun kapacito de 1,500 kv. sukcese produktiĝis lastatempe en la Nankina Turbin-generatora Fabriko. Tiu ĉi maŝinaro konsistas el turbino, aerkompresoro, brulkamero, generatoro kaj aliaj akcesoraj ekipaĵoj. La rotacia rapideco de la maŝinaro povas atingi 5,000 turniĝojn po minuto.

ULTRASONA RULVELDILO

La unua ultrasona rulveldilo projektita kaj farita de Ĉinio mem naskiĝis antaŭ nelonge en Ŝanhajo. Ĝi kapablas kunveldi du aluminiajn lamenojn kun dikeco egala je nur dekono de la haro. Tiu ĉi maŝino estas elfarita en kunlaboro de la ŝanhaja Universitato de Komunikaĵo kaj la koncernaj fabrikoj.

DE NAJLO-IMPORTO ĜIS MAŜIN-EKSPORTO

EN la Ĉina Foiro de Eksportaj Varoj, okazigita en Kanton en 1964, multaj eksterlandaj komercistoj tre admiris la riĉecon de eksportaj varoj de Ĉinio kaj bonkvalitecon de diversaj maŝinoj, kaj miris pri la rapideco de la progreso de la ĉina industrio. Konsiderante, ke antaŭ 16 jaroj Ĉinio devis importi eĉ najlojn, sed nun ĝi jam eksportas grandtipajn precizajn maŝinojn, oni devas konfesi ke la ĉina industrio vere jam ricevis eksterordinaran disvolviĝon. Kaj tiu disvolviĝo akiriĝis en la senĉesa batalado kontraŭ imperiismo.

Parto de ekspozajoj en la Ĉina Foiro de Eksportaj Komercadoj. Ĉiuj ili estas projektitaj kaj produktitaj de Ĉinio mem.




Antaŭ la jaro 1949, la ĉina internacia komerco estis direktita kaj monopoligita de la imperiistoj dum longa tempo. Ili superregis la ĉinan doganon kaj penetris en ĉiujn lokojn de la tuta lando en komploto kun burokratkompradoraj kapitalistoj. Unuflanke, ili aĉetis agrokulturajn kaj flankokupajn


produktaĵojn kiel krudajn materialojn je malalta prezo, aliflanke ili klopodis per miloj da manieroj dumpingi siajn superflujajn industriajn kiaj agrokulturajn produktaĵojn. Samtempe, ili starigis per siaj privilegioj en Ĉinio bankojn, fabrikojn, entreprenojn..., kaj superregis la ĉinajn merkatojn, direktis la ekonomiajn aortojn de Ĉinio, ke la ĉinaj merkatoj pleniĝis de "eksterlandaj varoj" kaj la enlande fabrikitaj varoj trafis mortan frapon.

En tiu tempo kvankam Ŝanhajo estis loko, kie plej multe koncentriĝis industrioj kaj komercoj, sed fakte multaj el ĝiaj t. n. maŝinaj fabrikoj estis nur kadukaj muntiparejoj por la maŝinoj importitaj de imperiistoj. Tiam oni povis produkti ne pli ol 60-gaŭĝajn kotonŝpinaĵojn kaj eĉ tion povis fari nur fabrikoj de eksterlandaj kapitalistoj. La kudromaŝinaj fabrikoj povis nur munti aŭ ripari. Koncerne la kemian industrion, ni prenu sulfuracidon kiel ekzemplon: dum pli ol 80 jaroj oni produktis sume nur 50,000 tunojn — unuvorte, ĉio ĉefe dependis de importado, eĉ unu najleton oni devis importi.


Post la establiĝo de la nova Ĉinio, ni reprenis la doganon, abolis ĉiujn privilegiojn de fremduloj en Ĉinio kaj radikale ŝanĝiĝis la karaktero de la internacia komerco.

La ĉina industrio sub la ĝusta gvido de la Popola Registaro kaj sin apogante sur siaj propraj fortoj rapide forigis la postigintan fizionomion, kiu ekzistis antaŭ la Liberiĝo. Kaj Ŝanhajo rapide fariĝis sinteza industria bazo, kies malpeza industrio, ŝpinteksa, kemia, metalurgia,





Bormašino Tipo T-611, kiun ni devis importi el eksterlando en la pasinto, estas nun projektita kaj fabrikita de ni mem.



Altpreciza 36-milimetra tureta tornilo, tipo C336-1.


meĥanika kaj aliaj industrioj ĉiuj ricevis tre grandan disvolviĝon. La malpeza industrio povas ne nur amasfabriki kudromaŝinojn, biciklojn k. s., sed ankaŭ produkti gravajn ĉiutage necesajn industriajn produktaĵojn, multaj el kiuj estis importitaj en la pasinteco; la ŝpinteksa industrio ne nur povas produkti 300-gaŭĝajn ŝpinaĵojn, sed ankaŭ povas produkti rafinitajn ŝpinaĵojn kaj ŝtofojn el kemiaj fibroj; la kemia industrio jam povas produkti 50,000 tunojn da sulfuracido en nur kelkaj monatoj, kaj multajn specojn de plastaj objektoj. En la metalurgia industrio la kapablo de ŝtalprodukto kaj laminatado pligrandiĝis ne kelkoble, sed kelkdekoble aŭ kelkcentoble en komparo kun tiu antaŭ la Liberiĝo. Nun Ŝanhajo jam povas produkti centojn da specoj de ŝtalo kaj milojn da specoj de ŝtalaj materialoj. Kaj ĝia maŝinfabrika industrio, ne nur povas produkti grandtipajn precizajn ekipaĵojn, sed jam disvolviĝis de produkto de unuopaj maŝinoj ĝis fabrikado de kompletoj da maŝinoj.

Krom kontentigado al la bezonoj de la produktado kaj vivo de la vastaj popolamasoj enlande, multaj el la produktaĵoj jam eksportiĝas al diversaj lokoj de la mondo. Sekve de la altiĝo de la internacia pozicio de Ĉinio pli kaj pli multaj landoj kaj regionoj deziras disvolvi ekonomiajn kaj komercajn rilatojn kun Ĉinio. En la jaro 1952 industriaj produktaĵoj de Ŝanhajo eksportiĝis nur al pli ol 40 landoj kaj regionoj, sed nun jam al pli ol cent. La suma eksportvaloro de la ŝanhaja haveno dum la periodo de la Unua Kvinjara Plano (1953-1957) jam havis grandan kreskon kompare kun tiu dum la periodo de restarigo de la nacia ekonomio (1950-1952), kaj tiu de la periodo de la Dua Kvinjara Plano (1958-1962) ankoraŭ pli multe kreskis ol tiu dum la periodo de la Unua Kvinjara Plano.

Sekve de la disvolviĝo de la industria kaj agrokultura produktado ankaŭ la konsisto de la eksportaĵoj ŝanĝiĝis. En la komenco de la fondiĝo de la nova Ĉinio la eksportaĵoj konsistis ĉefe el greno, sojo, manĝaĵoj, silko, teo, tabako, porkoharegoj kaj aliaj produktaĵoj de agrokulturo kaj ĝiaj flankaj okupoj kaj metiartaĵoj. Ekde 1954 krom tio, ke daŭre plimultiĝis la jam eksportataj agrokulturaj kaj flankokupaj produktaĵoj, kaj metiartaĵoj, Ĉinio komencis eksporti pogrando ankaŭ ŝpinteksaĵojn kaj malpezindustriajn produktaĵojn inkluzive ŝpinaĵojn, ŝtofojn, kudromaŝinojn, biciklojn En 1957 la proporcio de la eksportaj industriaj produktaĵoj jam atingis pli ol 80% de la eksportaĵoj. La eksportitaj de Ĉinio produktaĵoj de malpeza kaj ŝpinteksa industrioj ĝuas varman akcepton de la konsumantoj en diversaj lokoj pro siaj bona kvalito, fortikeco, beleco kaj malalta prezo, kaj ĝuas altan prestiĝon en internaciaj merkatoj.

Ĉinio nun eksportas eksterlanden ne nur produktaĵojn de malpeza kaj ŝpinteksa industrioj, sed ankaŭ komencis eksporti produktaĵojn de pezindustrio, inkluzive ŝtalaĵojn, ilmaŝinojn, kaj maŝinojn ŝpinteksajn, paperfabrikajn kaj presajn.

Tiuj atingoj estas brila sukceso akirita de la ĉina laboristaro en praktikado de la ĝenerala linio konstrui socialismon multe, rapide, bone kaj ekonomie kaj tio estas konkreta enkorpiĝo de la politiko de Ĉinio sin apogi sur siaj propraj fortoj kaj strebi al prospero kaj potenciĝo de la patrolando. Sed la ĉina laboristaro neniam forgesos la historion, ke "eĉ najlon oni devis importi", tio instigos ilin marŝi konstante kaj senlace antaŭen al la modernigo de industrio.



La Pekina Aerodromo plej moderne ekipita por civila aviado.

LA CIVILA AVIADO DE ĈINIO

ĈONGHI

LA civila aviado, facile kompreneble laŭ la vortoj, estas instrumento de popola komunikado kaj transportado en aero.

Tamen, en la malnova Ĉinio la tiel nomata civila aviado en fakto estis instrumento de Ĉiang Kajŝek kaj burokrataj kapitalistoj por konduki civilan militon, urĝe transporti armeajn provizaĵojn al fronto, kaj gajni profitegon tra spekulacio. Preskaŭ ĉiujn aeroplanojn kaj grundekipaĵojn ili forrabis dum sia plena disfaliĝo, kaj la aerodromoj estis severe detruitaj.

LA CIVILAN AVIADON RESTARIGI KUN MALPLENAJ MANOJ

Post sia fondiĝo, kun malplenaj manoj la nova Ĉinio pene restarigis sian civilan aviadon sub la revolucia spirito sin apogi sur siaj propraj fortoj. Dum la pasintaj dekelkaj jaroj ĝi jam akiris grandan sukceson.

Ĉiujare la popola registaro elspezas grandan sumon por konstrui kaj pligrandigi civilajn aerodromojn, aerocentrojn, institutojn de aviado, riparajn fabrikojn, ktp. En 1964, per niaj propraj mezurado, projektado kaj konstruado sub la forta subteno de rilataj organizoj, la du internaciaj aerodromoj en Ŝanhajo kaj Kantono estis pligrandigitaj kaj komencis sian funkcion en malpli ol kvar monatoj. La amplekso kaj la kvalito de la ekipaĵoj de la aerodromoj atingis internacian nivelon.

La aeroplanoj, kiel la ĉefaj ekipaĵoj de la civila aviado, konstante plimultiĝas dum ĉi tiuj jaroj, kaj la tipoj de aeroplanoj renoviĝis de tempo al tempo. Nun, en la gravaj aerolinioj, turbina helicaĵaj pasaĝeraj aeroplanoj iom post iom anstataŭis la dizelajn, sekve oni kreis pli favoran kondiĉon

por mallongigi la tempon de veturado kaj plibonigis la servolaboron.

Ankaŭ la kresko de la flugistaro kaj personaro de aliaj koncernaj teknikoj estas tre rapida. Multaj flugistoj jam ellernis la teknikojn de flugado en komplikaj veteroj kaj dum noktoj. Ili jam plenumis multfoje taskojn de transoceana flugado kaj diversaj aliaj komplikaj flugadoj. En 1956 kaj 1960, ĉinaj flugistoj de civila aviado tra diferencaj aerolinioj, dufoje transflugis la altebenajn de Kinghaj kaj Tibeto, la tiel nomatan "malpermesitan regionon en aero", kaj plenumis la taskon de provflugado al Lhasa en Tibeto. Post la Liberiĝo, la multnombraj teknikistoj kulturitaj de la institutoj de aviado senĉese injektis novan sangon al la trupo de teknikistoj por civila aviado. Ili ludis gravajn rolojn sur siaj postenoj.

GRANDA DISVOLVIĜO

Nuntempe, la civila aviado de Ĉinio jam kompletigis sian unuan paŝon. En aera transportado pli ol kvindek enlandaj linioj jam formis aviadan reton kun Pekino kiel sia centro. Multaj montaj regionoj kiuj estis izolitaj en la pasinteco kaj la landlimaj regionoj malproksimaj nun estas facile atingeblaj en nur kelkaj horoj. La aerolinioj kondukas nun okcidente ĝis la montpiedo de Mustag, norde ĝis la bordo de Hejlong-rivero, sude ĝis la suda bordo de Kjongĝoŭ-markolo.

La internaciaj aerolinioj jam nombriĝas kvin, t. e. ĉini-koreia, ĉini-vjetnamia, ĉini-sovetia, ĉini-mongolia kaj ĉini-birma, kaj rektaj civilaj aerttransportaj servoj estas malfermitaj inter Ĉinio kaj la aviadaj entreprenoj de Pakistano, Kamboĝo

kaj Indonezio. Krome, Ĉinio establis rilaton de komerca agento pri civila aviado kun Kubo, Rumanio, Pollando, Ĉeĥoslovakio, Hungario, la Germana Demokratia Respubliko, Svisio, la Unuigita Araba Respubliko, Nederlando, Francio k. a. sume pli ol dudek landoj.

La longeco de la civilaj aerolinioj atingis pli ol tridek naŭ mil kilometrojn. La kvanto de transportado kreskas jaron post jaro. Dum la pasintaj dekelkaj jaroj nia civila aviado servis multajn fremdlandanojn kiuj venis al nia lando kiel honoraj gastoj aŭ por turisma ĝuo, kadrojn rapidantajn al diversaj lokoj por partopreni konstruajn laborojn, vojaĝantojn el diversaj profesioj kaj grandan kvanton da materialoj kaj ekipaĵoj urĝe bezonataj de industria aŭ agrikultura konstruo, kio multe kontribuis al la konstruo de nia lando, internacia ekonomio kaj kultura interfluo.

En la sfero de speciala aviado jam komenciĝis preventado kaj eliminado de malutilaj insektoj kaj plantaj malsanoj, sarkado, sterkado, semado, inspektado kaj protektado de arbaroj, termezurado, esplorado de mineraloj, ktp. sume dekoj da servospecoj. Ili funkcias en dudek kvar provincoj, municipoj kaj aŭtonomaj regionoj.

ANTAŬ ĈIO SEKURECO

La laborantoj de civila aviado de Ĉinio ĉiam estas tre zorgemaj pri la sekureco en flugado, ili serioze observas diversajn statutojn, regulojn kaj aranĝojn por garantii sekuran flugadon. Ĉiu aeroplano devas ricevi severan kontrolon antaŭ flugo. Ekflugo estas permesata nur en la kondiĉo de "kvar sen-oj", t. e. sen paneo, sen difekto, sen



Civila flugmaŝino disŝutas insektomortigilon sur plantojn en forstejo.


eksteraĵo, sen rustkorodo kaj petrola feĉo. Ankaŭ ĉiu flugisto devas fari sufiĉan preparon antaŭ flugado, kaj nur post kiam la rilataj gvidantoj konfirmas ke ĉio estas konforma al la postuloj, li estas permesata ekflugi. Pro tio, nia civila aviado ĉiam tenas bonan rekordon en sekura flugado.

En ŝarĝtransportado, por sekure kaj rapide sendi la ŝarĝojn al la cellokoj, kaj garantii la kontentigon de la bezonoj de ricevantoj, la laborantoj de aertransporto, ĉiam kaj ĉiel rapide transportas la ŝarĝojn sen manko, sen eraro kaj sen difekto. Pro tio, la en-kaj ekster-landaj vojaĝantoj kaj komisiantoj ĉiuj ĝenerale estas tre kontentaj pri la servo de nia civila aviado.

La civila aviado de la nova Ĉinio, sub la korekta gvidado de la popola registaro, antaŭenmarŝas per firmaj paŝoj, por pli multe kontribui al la socialisma konstruado, al la popola vivo kaj al la plifirmigo de la amikeco inter la diverslandaj popoloj.



Direktejo de la Pekina Aerodromo.



Nova ŝtupara kamparo de fruktarboj de Delisi-komunumo.

Ŝanĝoj en la Fruktoproduktejo

LI GIE

LA FRUKTOĜARDENOJ MULTE ŜANĜIGIS

Fu-gubernio en Liaŭdong-duoninsulo de la Nordoriento de Ĉinio estas fama produktejo de pomoj. En la komunumoj, kiuj kulturis ekskluzive fruktarbojn, ĉie kreskas fruktarboj. En la komenco de ĉiu aŭtuno, oraj kaj ruĝaj pomoj pendas sur la branĉoj kun densaj verdaj folioj. Delisi-komunumo, kiun mi vizitis en la pasinta aŭtuno, vere meritas la nomon "Komunumo de Pomoj". Aparte rimarkinda estas tio, ke ne nur la junaj arboj nove plantitaj sur montodeklivoj kreskas bonege, sed ankaŭ la jam maljuniĝintaj arboj estas ornamitaj de densa foliaro kaj riĉaj fruktoj.

La fruktarbaj kulturistoj ĉiuj diris: "Bonan rikolton ni havos ankaŭ ĉijare, kaj ankaŭ la nova produktoplano de 7,000 tunoj da pomoj estos superplenumita."

Laŭ rakonto de Cang Enĝi, sekretario de la partia komitato de la komunumo, oni komencis kulturiti tie fruktarbojn jam en 1908. Tiam la japanoj okupis la tian teron kaj devigis la popolanojn kulturiti fruktarbojn por ili. Bienuloj kaj riĉkamparanoj en la najbareco sekvis ilian ekzemplon

kaj dungis jarlaboristojn por kulturiti por ili fruktarbojn. Sub la duobla premado kaj ekspluatado de la japanaj invadantoj kaj riĉkamparanoj kaj bienuloj, la vasta kamparanaro vivis mizere kiel ŝarĝbrutoj.

En la komenca periodo post la Liberiĝo, restis tie nur 97,000 fruktarboj. La malriĉaj kaj la submezaj kamparanoj, kiuj ricevis fruktoĝardenojn en la agrara reformo, ankoraŭ ne mastris la kompletan teknikon de fruktarba kulturado kaj pligrandigis fruktarbaj malsanoj. Unu arbo produktis meznombre nur pli ol 25 kg. da pomoj el kiuj nur 10 procentoj estis unuaklasaj produktaĵoj. La renversitaj bienuloj tiam asertis malice: "Vidu mizerulaĉoj, la arboj baldaŭ velkiĝos kaj fariĝos brulligno sub via mastrumado....."

Sed la faktoj kontraŭis iliajn dezirojn. La vastaj amasoj de kamparanoj, malriĉaj kaj submezaj, nun ne nur ellernis mastrumadon sed ankaŭ akiris progresan sperton de kulturo sub la gvidado kaj subteno de la registaro kaj dank' al la kolektiva forto. Speciale post la komunumiĝo la produkto de fruktoj ĉiam marŝas antaŭen. La fruktarboj de la tuta komunumo rapide multiĝis ĝis pli ol 240,000, t. e. 2.5 obloj de tiuj en la periodo de la

KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ



2,289 FORNOJ DA ŜTALO EN KONTINUO

Antaŭ nelonge, la Martin-fornego N-ro 2 de la Tiangin-a Ŝtaluzino kontinue produktis 2,289 fornojn da ŝtalo kaj kreis novan rekordon en ŝtalfandado. La fornego estas teg-

mentita per magnezitaj brikoj kreitaj de Ĉinio. Kaj pli ol 99% de la ŝtalintoj estas laŭnormaj. En la pasinteco, tiu fabriko fandis ŝtalon per Martin-fornego el importitaj fajrorezistaj brikoj, kiu povis nur elfandi 2-300 fornojn da ŝtalo en kontinuo.

400-TUNA PREMMULDA MAŜINO PROVFARITA

Lastatempe la Ŝanhaja Gismaŝina Fabriko sukcesis mem projekti kaj

prove elfari 400-tunan malvarmĉamban premgismaŝinon. En la pasinteco, la plej granda kunprema forto de la premgisaj maŝinoj produktitaj de tiu fabriko estis 120 tunoj kaj kapablis nur premgisi kompare malgrandajn maŝinpartojn. La nove farita premgisa maŝino havas kunpreman forton de 400 tunoj kaj povas premgisi kompare grandajn pecojn kiaj rotoron de elektromotoro kun kapacito de 20 kv. k. a.

establiĝo de la nova Ĉinio. La produktado de pomoj leviĝis kaj en kvanto kaj en kvalito; unu arbo meznombro produktas 47.5 kg. ĉiujare kaj la unuaklasaj fruktoj jam atingis pli ol 83 procentojn.


POR LA INTERESOJ ESTONTAJ

“Por la bono de la venontaj generacioj, por meti bazon de komunisma konstruado!” Jen estas la nobla celo de la fruktARBaj kulturistoj de Delisi-komunumo. Antaŭ kvar jaroj, la frukt-ARBOJ suferis de sinsekvoj da pezaj naturaj katastrofoj kaj plagis putra malsano (*Valsa mali*). La arboj estis malfortigitaj, sed ili ankoraŭ produktis multajn fruktojn.

Ĉu oni devas restigi malpli da fruktoj por protekti la arbojn, ĉu oni devas restigi kiel antaŭe pli da fruktoj, ne konsiderante la sanon de la arboj? La kadroj kaj anoj de ĉiuj produktaj brigadoj arde diskutis pri tio. La vastaj malriĉaj kaj submezaj kamparanoj kaj la estraro de la komunumo ĉiuj opiniis, ke oni ne devas neglekti la estontajn interesojn de la komunumanoj kaj zorgi nur pri la nunaj profitoj, kaj elmetis la klaran principon “antaŭ ĉio la arboj devas esti protektataj”. La kulturistoj limigis la produktokvanton kaj sterkis la arbojn. Post pli ol tri jaroj de atentema flegado, la fruktARBaj de la komunumo plejparte resaniĝis kaj kreskas bonege.

Grandaj sukcesoj estis jam atingitaj ankaŭ en kapitala konstruado. Hodiaŭ, enirinte la montodeklivajn fruktĝardenojn, oni povas vidi ĉie vicon sur vico de ŝtup-kampoj; putoj kaj artefaritaj lagetoj troviĝas dise kiel stelaro; larĝaj vojoj serpentumas sur la montetoj por faciligi la trafikon dum produktado.

La komuna akumulo de la kolektivo ĉiam pligrandiĝis. Ĝis 1964, Delisi-komunumo jam akumulis pli ol 1,640,000 juan-ojn, t. e. pli ol kvar oblojn de la sumo akumulita dum la periodo de supera kooperativo. Dank’ al tio, la komunumo



Ĝang Ginhou (maldekstre), specialisto en fruktARBA kulturo de Delisi-komunumo interkonsiliĝas kun sia kolego Ĝang Guşun kiel preventi malsanon de pomoj.

povis aĉeti unujn post aliaj grandtipajn maŝinojn kaj motorojn kaj rapide pligrandigi reprodukon.

KRESKO DE NOVAJ TEKNIKAJ FORTOJ

La kulturado de fruktARBaj bezonas tutan serion de kompleksaj teknikoj. Post la fondiĝo de la komunumo, la estraro de la komunumo elektis la klerajn gefilojn de malriĉaj kaj de submezaj kamparanoj, kiuj amas la Partion, laboron kaj la kolektivon, por ilin trejni en la ĝardenoj. Estas nun en la tuta komunumo pli ol 500 teknikistoj, t. e. pli ol sepoble pli multe kompare kun la teknikistaro de la komenca periodo post la Liberiĝo. Tio ne nur havigis al la brigadoj pli solidajn teknikajn fortojn, sed ankaŭ ebligis ilin sendi parton de la teknikistoj por helpi al la frukto-produktado en aliaj lokoj. Kaj la ordinaraj kulturistoj de la komunumo jam scipovas pli ol dek ĝeneralajn teknikojn.

Delisi-komunumo jam plenkreskiĝis. Ĝi bonvenigos la belan komunisman morgaŭon kun pli granda strebado kaj pli abundaj fruktoj.

KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ

NOVA SPECIO DE SORGO ELKULTURITA

En Liaŭniang-provinco oni sukcese kulturis novan specion de multspika sorgo. Ĝia produkta kvanto po area unuo plimultas duonoble ol la loka specio de ordinara sorgo. Tiu ĉi nova specio estas sukcese elkulturita de prof. Gong Gidaŭ de la Ŝenjang-a Agromonia Kolegio per sistema selektado


dum 5 jaroj. Dum sia elkulturado de la nova specio, prof. Gong ricevis helpon de Huang Juanling, labormodelo en agrokulturo de Gianĉang-gubernio, Liaŭning-provinco, trovis konvenan metodon por kulturado kaj sukcesis.

SUBAKVA ELEKTROVELDO

Ĉina institucio de komunikaj aferoj trovis novan metodon por subakva elektroveldo, kio kreis pli

oportunan kondiĉon por elakvigi surfundiĝintan ŝipon, ripari ŝipojn kaj subakvajn konstruaĵojn. Tiu veldado estas farata subakve de veldisto kun speciale farita veldpinĉilo. La uzata fandaloja stangeto estas ŝmirita per aparta substanco. Ĝi produktas gason dum brulado kaj formas gasosakon kiu povas forigi la akvon inter la pinto de la veldstangeto kaj la veldata objekto kaj tiel sukcesigi la laboron.

Kamparo sur la Vojo de Elektrigo kaj Mekanikigo



La Bejie-a Elektro-transformejo de Giangmen liveras elektron por industrio kaj agrokulturo de Ĝongŝan-gubernio kaj aliaj 4 urboj.

Antaŭ kelke da tempo mi ree vizitis Ĝongŝan-gubernion, provinco Guangdong kie mi estis antaŭ longe. Mi ja ne atendis ke tiu loko, kiu suferadis de pezaj katastrofoj antaŭ la Liberiĝo, nun jam fariĝis tiel belaspekta, kaj tiel rapide fariĝis fame konata “grenejo” en Guangdong-provinco.

NOVA FIZIONOMIO DE LA KAMPARO PRO AKVOUTILIGA KONSTRUADO

En Ĝongŝan-gubernio, etendiĝas vastega areo de fekunda tero. Laŭ la kondiĉoj geografiaj ĝi estas grenproduktejo, aparte favorata de la naturo. Sed antaŭ la Liberiĝo, kaŭze de manko de akvoutiligo, la bonaj kampoj grave detruigis de trosekeco kaj inundoj tiel, ke la produktokvanto de greno estis tre malalta, ke la terkulturistoj dronis en mizeroj.

Post la Liberiĝo, la terkulturistoj en Ĝongŝan-gubernio surpaŝis la vojon de kolektivigo. Dank’ al helpo de la ŝtato kaj sia propra kolektiva forto, la terkulturistaro de la tuta gubernio, apud la maro kaj riveroj, sinsekve konstruis dek sep grand-tipajn interligitajn digojn por akvoutiligo, kies diglinio longas entute je pli ol kvarcent kilometroj. Tiuj interligitaj digoj sukcese protektas la kampojn de superakvego. Dum la konstruado de la grand-tipaj interligitaj digoj por akvoutiligo, oni faris en la digoj multajn novajn kluzpordojn, dragis la riveretojn interne de la kadro de la digoj, vaste starigis kluzpordetojn, por ebligi drenadon kaj irigacion. En la montetaj distriktoj de la gubernio, oni konstruis sesdek ok artefaritajn lagojn kaj akvorezervejojn; en la lokoj apud la maro, oni konstruis barojn, kiuj protektas ĉemarajn kampojn kun areo de cent tridek mil muoj (unu muo egalas al 1/15 hektaro) de la tajdo. La superakvegoj en 1959 kaj 1962, la interligitaj digoj digis kaj tiel sekurigis la loĝantaron kaj la kelkcent milojn da muoj da agrikulturaj plantoj.

KONSTRUADO DE ELEKTRAJ PUMPSTACIOJ

Surbaze de la akvoutiliga konstruo, en la tuta gubernio oni konstruis grandan nombron da elektraj pumpstacioj. En la jaro 1959 Kantono komencis liveri elektron al la delto de la Perlo-rivero kaj la ŝtato sendis ĉi tien multnombrajn transformatorojn, altatensiajn elektrofadenojn, elektromotorojn, pumpilojn ktp. el Kantono, Ŝanhajo kaj aliaj urboj por helpi la kamparanojn konstrui la unuajn elektrajn pumpstaciojn. En la lastaj kvin jaroj oni konstruis en kvin periodoj tricent okdek kvin elektrajn pumpstaciojn en ĉiuj partoj de la gubernio, kiuj povas dreni kaj irigacii areon de pli ol sepcent okdek mil muoj. Nuntempe la sesa konstrua periodo ankoraŭ daŭras. Post ĝia finiĝo la areo de profitantaj kampoj pliiĝos je ĉirkaŭ sepdek mil muoj.

Tiuj elektraj pumpstacioj liveras elektron ankaŭ al la kamparo por senŝeligi rizon, degrajnigi, kaj nokte lumigi la domojn de la kamparanoj.

SENĈESE PLIVASTIĜAS LA GRUNDO PERMAŝINE KULTURATA

Dum nia restado en Ĝongŝan-gubernio, mi foje vizitis la stacion de agrikulturaj maŝinoj de Ŝalang.

Tiu stacio estis establita en la vintro de 1954. En la komenca periodo post ĝia fondiĝo tie estis nur tri traktoroj kaj la plugita areo de ili estis nur pli ol kvinmil sescent muoj. Hodiaŭ, tiu stacio jam disponas pri tridek ses traktoroj, kaj ilia plugareo grandiĝis pli ol dekoble.

Sekve de la establiĝo de tiu stacio, ankaŭ multaj aliaj komunumoj starigis la siajn. En la tuta gubernio nun estas jam pli ol tricent okdek normaj unuoj da traktoroj. La areo de permaŝine plugata tero en la gubernio jam plivastiĝis ĝis pli ol kvarcent mil muoj, t. e., pli ol triono de la tuta areo de rizkampoj en la gubernio.

Hodiaŭ Ĝongŝan-gubernio jam elŝiris sin el la pasintaj mizero kaj malfeliĉoj, kaj marŝas antaŭen sur la vojo de elektrigo kaj mekanikigo.

RAKONTO PRI BLINDAJ GEEDZOJ

EN la malnova Ĉinio, se blindiĝis iu malriĉa kamparano, do tuj trafis lin mizera sorto: malsano, malsato kaj almozpetado, kaj finfine li devis morti nerimarkite eble en frosta vintra tago, kuntiriĝante en stratangulo.

Sed nun en la liberiĝinta Ĉinio, tute alia estas la sorto de tia perdinto de vidkapablo.

Jen estas vera rakonto pri malriĉ-kamparanaj geedzoj, kiuj blindiĝis sed poste denove ricevis vidkapablon sub la prizorgo de la Kompartio, la registaro kaj la kolektivo.

AMBAŬ GEEDZOJ BLINDIĜIS

En la Kvina Produktogrupa de la Unuiĝa Produktobrigado de Janggiahi-komunumo de Hjupugubernio, Hunan-provinco, vivas paro de malriĉ-kamparanaj geedzoj.

La edzo estas nomata Nje Minghing. Lia maldekstra okulo vundiĝis kaj perdis vidkapablon pro bombardo de usona armeo, kiam li partoprenis en la Milito por Rezisti Usonan Agreson kaj Helpi Koreion. Post la milito li revenis al sia hejmvilaĝo por la socialisma konstruado, sed malfeliĉe ankaŭ lia dekstra okulo blindiĝis pro katarakto en la jaro 1956.

Lia edzino Du Mejjing plenumis sian devon lin prizorgi. Kiu atendis, ke aldoniĝis alia malfeliĉaĵo. En 1957, mortis ŝia tria infano pro malsano nur kelkajn tagojn post sia naskiĝo. Ankaŭ la edzino blindiĝis post tro multa plorado.

PRIZORGO DE KLASFRATOJ

Informiĝinte pri la suferoj de la geedzoj, la samvilaĝanoj tuj etendis al ili helpajn manojn.

Kian Gibo, la sekretario de la partiĉelo de la produktobrigado, ilin vizitis. "Estu trankvilaj," li diris al la geedzoj, "ni povas venki ĉian ajn grandan malfacilon, ĉar ĉe ni estas Kompartio kaj Prezidanto Maŭ, kaj ankaŭ niaj kolektivaj fortoj. Certe ne mankos al vi manĝaĵoj kaj vestoj, nur se mi ilin havas!"

Sekve de tio, unu donacis al la geedzoj kokon kaj ovojn, alia porkaĵon kaj porkan hepaton, kaj tria brunan sukeron kaj gluecan rizon. Mo Lamej, iu kamparanino, helpis ilin prepari manĝaĵojn, varti la infanojn, lavi vestojn kaj fliki difektitajn ŝuojn kaj ŝtrumpojn, traktante ilin kiel siajn familianojn.

Ĉiufoje dum distribuado, la kadroj portis al la hejmo de la geedzoj grenon kaj oleon kaj krome ankaŭ monon. Ili ricevis ankaŭ diversajn vivne-

cesaĵojn kaj krommanĝaĵojn kiel ekzemple kotonon, sukeron, kapsikon kaj kolokasion*, same kiel aliuloj. Utiligante siajn liberajn horojn samvilaĝanoj konstruis por ili novan domon duĉambran, sub la alvoko de la produktogrupa. Por faciligi al ili la ĉiutagan vivon, matene oni ofte vektportis por ili plenan barelon da akvo nerimarkite, kaj vespere revenante post sia laboro oni ankaŭ kunportis faskojn da brullignoj al ilia hejmo.

La klasfrateco de la laboranta popolo kaj la nova moralo de la nova socio varmigis, kiel brilanta suno, la korojn de la geedzoj.

HELPI ILIN RICEVI KURACADON

Ĝaŭ Ĉenggin, la sekretario de la partia komitato de la komunumo, aŭdis ke blindiĝintaj okuloj estas kuraceblaj se ili ankoraŭ kapablas larmi kaj dolori kaj juki. Li trovis ke la okuloj de Du Mejjing estas ĝuste en tia stato, tial li pensis, ke ŝiaj okuloj estas kredeble kuraceblaj. Li do konsiliĝis kun kadroj de produktobrigadoj kaj produktogrupoj, aktivuloj el malriĉ-kamparanoj kaj malsupraj mezkamparanoj. Ili ĉiuj diris, ke la kolektivo devas aranĝi la kuracadon por Du Mejjing. Post diskutado la kongreso de la komunumanoj decidis, ke oni sendu Du Mejjing al la gubernia hospitalo kaj ricevu kuracadon tie tute je elspezo de la bonstata fonduso de la produktobrigado. Krom tio oni ankaŭ sendis membrinon por flegi Du Mejjing en la hospitalo.

Oni diagnozis, ke la kaŭzo de ŝia blindiĝo estas entropio, leŭkomo, triĥiazo kaj aliaj okulmalsanoj kaŭzita de grava trakomo. Post zorgema kuracado inkluzive du fojojn da operacioj la okuloj de Du Mejjing finfine resaniĝis. Kiam la partisekretario de la komunumo alvenis en la hospitalon por ŝin vidi, ŝi diris larmante pro ekscitiĝo: "Ho, kamarado sekretario, min savis nia Partio, nia Prezidanto Maŭ!....."

Post tio la partia komitato de la komunumo konsilis sendi ankaŭ la edzon al la hospitalo por kuracado je elspezo de la registaro. Tion konsentis la Popola Komitato de Hjupugubernio.

Ankaŭ la dekstra okulo de la edzo resaniĝis post sukcesa operacio.

En la varma granda familio — la popolkomunumo de la nova Ĉinio, tiu paro de geedzoj havas kaj havos vivon tiel plenan de lumo kaj ĝojo, ĝuste kiel iliaj resaniĝintaj okuloj.

*Manĝebla tubero simila al terpomo de la samnoma planto.

KULTURA HUSARO

ĜANG ĜONGBI



“Ulanmuĉer”-anino
Song Ĝengju dan-
cas kun bovloj.

EN la norda parto de Ĉinio, sur la vasta stepo de la Aŭtonoma Regiono de Interna Mongolio, oni ofte trovas grupeton kaj grupeton da gejunuloj veturantaj per ĉevalĉaroj aŭ rajdantaj sur kameloj. Ili rondiras de unu komunumo al alia kaj de unu mongola tendaro al alia por prezenti al tieaj kamparanoj kaj paŝtistoj siajn programojn de kantoj, dancoj kaj aliaj amuzajoj, kontentigi iliajn postulojn en la kultura vivo kaj dissemi la revolucionan kulturon de socialismo. Ili estas ĝuste la fame konataj “ulanmuĉer” — kultura husaro de la Aŭtonoma Regiono de Interna Mongolio.

TUTKORE POR LA POPOLAMASO

“Ulanmuĉer” signifas en la mongola lingvo: ruĝa kultura trupo.

La kulturaj trupoj distingigas per tio ke malmultaj estas iliaj membroj, ĝenerale ĉiu trupo konsistas el nur 12 personoj; simplaj estas iliaj scenejaj instrumentoj, por transporti kiujn kune kun iliaj pakajoj kaj muzikiloj unu ĉaro jam sufiĉas, kaj ili faras rondiran prezentadon kaj penetrigas en la popolamason, kiel ilia slogano deklaras: “Kie estas plej dezerte kaj mizere, tien ni iru por prezenti niajn kantojn kaj dancojn.” Kaj plie, ĝuste kontraŭe al ilia nemulteco de personoj, iliaj prezentadoj estas tre buntaj kaj variaj.

Dum la lastaj jaroj, kaj la paŝtistoj loĝantaj sur la malproksimaj stepoj, kaj dahuroj loĝantaj

apud Nengiang-rivero, kaj ovenkeoj loĝantaj borde de Hujhe-rivero, kaj olunĉunoj loĝantaj en la granda Hing-an-montaro kaj landlimaj gvardianoj ĉiuj havis okazon spekti programojn de “ulanmuĉer”. Ili volonte prezentas programojn eĉ por nur kelkaj personoj, se tion ili bezonas.

Iufoje la “ulanmuĉer” de la Maldekstra Flago* de Alaŝan finis sian prezentadon ĉe Ŝiret Produkta Brigado kaj estis preta iri al alia komunumo en la sekvanta tago. En la noktomezo, kiam ili estis jam dormantaj, subite alvenis al ili ses malfruiĝintaj paŝtistoj por spektadi iliajn programojn. Tion sciinte la trupanoj tuj leviĝis kaj malvolvis la pakitajn kostumojn kaj rekvizitojn, kaj prezentis por ili siajn elstarajn programojn.

Kiam la “ulanmuĉer” de la Unuigita Darĥan-Momengan-flago faris prezentadon ĉe Mandor-Komunumo, sendito de blinda maljunulino transdiris al la aktoroj ke ŝi tre deziras aŭskulti kantadon de “ulanmuĉer”. Ili do sendis tri aktorojn en ŝian tendon por plenumi ŝian deziron. La maljunulino emocie altiris ilin al si kaj diris palpante iliajn manojn: “Vi estas bonegaj infanoj edukitaj de Prezidanto Maŭ, vi vere komprenas la kordeziron de paŝtistoj!”

Por pli bone servi al la kamparano kaj paŝtistaro, kaj provizi ilin per riĉa spirita nutraĵo, la “ulan-

*Flago: administra unuo de la Aŭtonoma Regiono de Interna Mongolio, simila al gubernio.

muĉer”-oj ĉiamaniere disvastigas la enhavon de siaj laboroj por kontentigi la postulojn de la kamparanaro kaj paŝtistaro en kultura vivo. Multaj membroj de “ulanmuĉer” kunportas kun si aŭ stereoskopon aŭ transistoran radioricevilon, kaj ĉie, kien ili alvenas, regalas la kamparanojn kaj paŝtistojn rigardi bildojn pri Pekino, la ĉefurbo tagnokte sopirata de la lastaj, kaj aŭskulti la voĉon elsenditan de Pekino.

“Ulanmuĉer” tutkore klopodas por servi al la popolamaso kaj la lasta prenas ilin kiel siajn intimulojn. Iufoje la “ulanmuĉer” de Otog-flago veturis al iu produkta brigado por prezento kaj survoje trapasis vastan dezerton. Ĝuste kiam ili malfacile antaŭen moviĝis sur varma sablejo sub la flamanta suno, subite ili vidis strion da fumo levigantan nemalproksime en la fronto. Ĉiuj ekmiris: ĉu sin trovas loĝantoj eĉ en tia loko? Ankoraŭ iom irinte ili ekvidis kvin-ses paŝtistojn starantajn sur alta sabloamaso kiuj salutis al ili mansvingante. La kaŭzo klariĝis ke informiĝinte, ke la “ulanmuĉer”

Dum prezento de “ulanmuĉer”.



Prezento de teatraĵo.

preterpasos ĉi tie, la paŝtistoj speciale alvenis por ilin atendi kun pretigita laktoteo.

Kiam “ulanmuĉer” devis translokiĝi aliloken por prezento, ofte la paŝtistoj ĝin akompanas por longa distanco tirante siajn ĉevalojn. Kaj kiam la trupanoj dormis gaste en tendoj de paŝtistoj, la mastroj ofte propramane kovris ilin per siaj plej bonaj lanaj kovriloj. Iufoje, unu maljunulino varme invitis kelkajn trupaninojn dormi en ŝia tendo. Timante ke ili malvarmumiĝos endormiĝinte, ŝi maldormis la tutan nokton por ilin zorgi. Tion rimarkinte la knabinoj estis tiel kortuŝitaj, ke neniu povis endormiĝi. Sed la maljunulino diris kun rideto: “Infanoj, dormu trankvile! Kiel ĝoja mi estas ke vi venis al ni!”

ĈIU FAKULO SAMTEMPE PLURKAPABLULO

Kiel la kultura trupo “ulanmuĉer”, konsistanta el ne pli ol 12 personoj, povis fari siajn programojn variaj kaj bonvenigataj de la kamparanaro kaj paŝtistaro? Tio ja estas malfacila. Sed dank’ al tio ke ili havas entuziasmon servi tutanime al la popolamaso, ili trovis rimedon por venki la malfacilojn. Tio estas “Ĉiu Fakulo Esti Samtempe Plurkapablulo”. Ĉiu trupano kapablas aktori post alivestiĝo kaj muziki kun instrumento en la manoj. Ili ĉiuj scipovas kanti, danci, deklami kaj ludi diversajn muzikilojn.

Darma, unu el la trupanoj de la “ulanmuĉer” de Otog-flago, antaŭe estis violonisto, sed post kiam li ekkomprenis ke ĉiu fakulo nepre devas akiri plurajn kapablojn, por pli bone servi al la



Krom prezentadon "ulanmuĉer"-anoj ankaŭ faras malgrandan ekspozicion de bildoj de socialisma edukado.

popolamaso, li do fervore eklernis ĉiun arton kiun li renkontis kaj klopodis majstriĝi en ĝi. Ekzemple por ellerni desegnadon de magilanternaj bildoj li utiligis ĉiun okazon por peti instruon de spertuloj kaj ofte diligente lernadis kaj sin ekzercadis. Ĝuste kiel proverbo diras: "Ferstango iĝos pinglo eta post frotad' ripeta". Nun li scipovas ne nur desegni magilanternajn bildojn, sed ankaŭ fariĝis lerta en kantado, dancado kaj ludo de ĉevalkapa kordinstrumento.

Kaj en la sama trupo sin trovas junulino nomata Urgemul, elstara membro de la Ĉina Komunista Junulara Ligo. En 1961, la gvidantaro asignis al ŝi la taskon lerni ludon de trikor-do**. Tiam iuj spertuloj opiniis, ke ŝiaj fingroj estas kompare mallongaj, tial estas malfacile por ŝi mastri plukan muzikilon. Sed ŝi konstatis ke por plej bone servi al la kamparanaro kaj paŝtistaro ŝi nepre devas ellerni la ludon de trikor-do. Tial en severe frostaj tagoj ŝi ĉiutage ŝtele leviĝis antaŭ la krepuskiĝo kaj eliris al la kampoj por ekzerci siajn fingrojn. Nun la solo de ŝia trikor-da ludo fariĝis jam ŝatata programero de la kamparanoj kaj paŝtistoj kaj estas disaŭdigita de la Centra Popola Radiostacio.

SEMANTOJ DE LA SOCIALISMA KULTURO

En la Aŭtonoma Regiono de Interna Mongolio sin trovas sume pli ol 30 tiaj "ulanmuĉer"-oj. Tiuj pli ol 30 profesia trupoj ja ne

sufiĉas por kontentigi la postulon de kultura vivo de la grandnombraj kamparanoj kaj paŝtistoj en la vasta regiono. Tial la "ulanmuĉer"-oj ankaŭ serioze helpadas la popolamasojn disvolvi postlaborajn literaturajn kaj artajn aktivadojn.

Depost 1957 la trupoj de la "ulanmuĉer" de la Ŝulun-ĥuk-Flago helpadis la popolamasojn disvolvi postlaborajn artajn kaj literaturajn aktivadojn ĉie kien ili alvenis. Ili starigis unu post alia jam 14 kursojn por eduki aktivajn amatorojn en literaturaj kaj artaj aktivadoj kaj eledukis pli ol 280 aktivulojn. Nun en la tuta flago fondiĝis pli ol 60 amatoraj rondoj de prezentado kaj verkado. Sub la helpo de "ulanmuĉer" ili ellernis kantadon kaj dancadon, kaj kapablas sendepende organizi prezentadojn. Ili povas aktive aranĝi siajn literaturajn kaj artajn agadojn konforme al la bezono de la kerna laboro de la Partio kaj jam fariĝis grava forto en semado de socialisma kulturo sur la stepo de la Aŭtonoma Regiono de Interna Mongolio.

KULTURIĜI EN FIZIKA LABORO

La trupoj de "ulanmuĉer" estas ne nur kulturaj laborantoj, sed samtempe ankaŭ fizikaj

***Trikor-do: Pluka instrumento kun tri kordoj.*

Membroj de "ulanmuĉer" gastas ĉe la paŝtisto Jajŝi.



laboruloj en intima interligo kun la popolamaso. Kie ili laboras, tie ili partoprenas fizikajn laborojn. Draŝado, melkado, fojnkolektado, paŝtado, deprenado de ŝaflanugo, tondado de lano ktp. ĉiuj estas same bonvenaj laboroj por ili. Ĉe kiu produkta brigado ili gastis, kiel ties anoj ili laboris. Ĉe kiu familio ili loĝis, por tiu ili portas akvon, balaas, flikas aŭ lavas vestojn.

Multaj trupanoj renkontis nemalmultajn malfacilojn en la komenco de fizika laboro. Tujaa kaj Song Ĝengju, ambaŭ trupaninoj de la “ulanmuĉer” de Onniut-flago, unuafoje partoprenis deprenadon de ŝaflanugo en Ĥajls-komunumo. Kiam ili entuziasme alvenis antaŭ la ŝafejon kun rastiletoj en la manoj, ili tute ne sciis kiel agi kun la viglamovaj ŝafoj. Penlaborinte tuttage, kun ŝvito tra la tuta korpo ili sukcesis kolekti la lanugon de nur sep ŝafoj, kio egalas nur duontagan laborkvanton de unu paŝtisto. Sed la du knabinoj ne malkuraĝiĝis, ili persiste lernis kaj finfine ellernis la arton kaj kreis la rekordon ĉiutage prirasti po 17 ŝafojn. Pro tio ili estis honore titolitaj kiel elstaraj plenumantoj de laboro.

Tra la partoprenado de fizikaj laboroj la trupanoj de “ulanmuĉer” asimilis al si la pensojn kaj klasanton de la laboranta popolo, kaj dank’ al tio ili pli bone komprenas kiel oni povas plej bone servi al la laboranta popolo.

Penetriĝi en la popolamason kaj partopreni fizikajn laborojn ankaŭ riĉigis iliajn verkadon kaj prezentadon, kaj havigis al ili neelĉerpeblan fonton

de literatura kaj arta kreado. Multaj el la programeroj estas verkitaj de ili mem laŭ siaj propraj spertoj pri lokaj novaj homoj kaj aferoj. Tiuj programeroj bone respegulas la nuntempan vivon kaj kuraĝigas kaj antaŭenpuŝas la kurantajn klasbatalojn kaj produktobatalon. En 1963, Ĥajls-komunumo de Onniut-flago decidis fosi feliĉan riveron por alkonduki la fluon de Ŝirmuren-rivero en la sekegan stepon. La trupanoj de “ulanmuĉer” ĝustatempe verkis kaj publike prezentis la teatraĵon “Apud Ŝirmuren-rivero”, kiu kuraĝigis la homojn superregi la naturon kun pli da memfido. Pasinttempe vidinte ilin ludi rolojn de laboristo, kamparano kaj soldato, paŝtistoj ofte diris: “Ludo energia, sed ne versimila, do ne tre interesa!” Nun tra la laborado kaj vivado kun la kamparanoj kaj paŝtistoj, iom post iom ili asimilis al si la pensojn, sentojn kaj temperamenton de la laboranta popolo, kaj la figuroj rolitaj de ili, fariĝas vivecaj kaj versimilaj kiaj povas bone respeguli la realon.

“Ulanmuĉer”, la literatura kaj arta husaro sur la stepo, vere praktikas la direkton ke literaturo kaj arto servu al la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj, kaj kreis taŭgan organizan formon kaj labormanieron de la direkto. Nun ĝi ne nur fariĝis jam ruĝa flago de la socialisma kultura revolucio sur la stepo de la Aŭtonoma Regiono de Interna Mongolio en la norda parto de Ĉinio, sed ankaŭ lerninda ekzemplo por la kulturaj laborantoj tra la tuta lando.

Membroj de “ulanmuĉer” veturas por prezento en popola komunumo.



Konstrui Novan Doman

BAJ JONG

Onklo Vu volis konstrui novan domon.

Delonge li devis tion fari. Lia malalta domo kun kelkaj ĉambroj jam ne povis provizi sufiĉan spacon al lia tuta familio de sep personoj kaj la pli kaj pli multiĝantaj posedaĵoj. La vizitantoj tion rimarkintaj kutime konsilis al Onklino Vu:

“Via domo preskaŭ fariĝis tenejo! Konsiliĝu kun Onklo Vu por konstrui novan. Se vi bezonas helpon, jen ni pretas. Kial timi malsukceson, se multaj vin helpos?”

“Prave! Dankon pro via konsilo! Ankaŭ via onklo pensas pri tio!” Onklino Vu ĉiam tiel dankis ĉiujn tiajn bonkorulojn.

Tamen, eble vi miros: Ili nur volis kaj volis. Forpasis jam pluraj jaroj, sed la domon ili ankoraŭ ne konstruis. Ĉu mankis al ili mono, materialoj aŭ tempo? Tute ne. Depost la fondiĝo de la popola komunumo, la vivnivelo de Onklo Vu ĉiam plialtiĝas. Por ne paroli pri konstruo de unu domo, eĉ konstrui plurajn estis neniom malfacile por li. Pro kio do la konstruado ankoraŭ ne komenciĝis? Estis ja alia kaŭzo. Onklo Vu estis bredisto kaj li dediĉis preskaŭ sian tutan koron al la azenejo kaj ĉevalejo!

Ni menciui la okazajon en la dekdua lunkalendaro monato de la antaŭlasta jaro. Preskaŭ pretaj estis jam ĉiaj materialoj por la konstruado kiaj traboj, brikoj, ruĝaj tegoloj k. c. Oni jam atendis la komenciĝon de la konstrulaboro. Sed ĝuste tiam la produkta grupo aĉetis du bovojn kaj krome la ĉartira Gri-zulo naskis ĉevalidon. Nu, la pli-prosperiĝo en la stalo tre ĝojigis Onklon Vu, kaj rimarkigis lin, ke oni devas konstrui novan stalon. Sed estis neeble tuj akiri

konstruajn materialojn, kion fari do? Li decidis mem solvi la problemon. Kelkajn tagojn poste, subite malaperis pli ol duono de liaj traboj k. s. materialoj. La filo kaj bofilino estis sufiĉe saĝaj kaj ĉiam komprenis la intencion de Onklo Vu. Rimarkinte tion ili ŝajnis ke ili nenion vidis kaj intence lin “ŝirmis”. Nur Onklino Vu sola ne rimarkis tion. Kiam ŝi tion malkovris, la nova stalo ĉe la okcidenta vilaĝfino estis delonge finkonstruita. Tiu ruzo de la aĝulo forte kolerigis lian maljunan kunulinon, tamen ĝi ricevis laŭdon de la komunumo. Laŭdmenciilo de “Modela Bredisto” estis gluita super la lito de Onklino Vu kaj ankaŭ la mono por kovri la koston de la materialoj estis donita en ŝiajn manojn.

Vidinte ke Onklo Vu estas laŭdita, ankaŭ Onklino Vu sentis sin honorita. Tial post tio, se iu konsilis al ŝi konstrui novan domon, ŝi ĉiam diris:

“Mia frato, por la konstruado ni atendu ankoraŭ kelkajn jarojn. Se nur en la domon ne trafluetas pluvejoj nek enblovas vento, ni loĝados tiel longe kiel eble!”

Sed ĉi tiun fojon, Onklo Vu efektive volis konstrui por si novan domon. De la lasta vintro la patro kaj filo okupiĝis pri hakado de arboj, kaj farado de brikoj. Kiam venis printempo, ĉio estis jam preta. Onklino Vu aparte amasigis en poto dekojn da ovoj, por regali siajn najbarojn dum la konstruado de la nova domo.

Kia hazardo ke subite tiam ilin atakis torenta pluvego, kiu damaĝis la domon de Avino Ŝan, membro de kvin garantioj*, tiel ke la muroj kliniĝis. Tio bezonis urĝan riparadon.

Antaŭ elkrepuskiĝo la produkto-grupestro jam alvenis al ŝia hejmo kun grupanoj malgraŭ la pluvego.

Aŭdinte tion, Onklo Vu neniel povis trankviliĝi. Li ĉirkaŭiris foj-refoje la amasojn de siaj traboj, brikoj kaj tegoloj kaj revenis en sian domon. Balbutante li diris al sia edzino:

“Vidu, kia malfeliĉo trafis Avinon Ŝan! Krome... krome ŝi estas membro de kvin garantioj... ni... ni...”

“Kial ankoraŭ ‘ni... ni...’? kiam membro de kvin garantioj troviĝas en malfacilo, ĉiu devas doni helpon. Maljunulo, disponigu niajn materialojn!” Ĉiu vorto de Onklino Vu sonis klare.

“Prave, oni uzu la niajn!” ĝojis Onklo Vu ekster-atende. Li prenis du lignopecojn per ambaŭ manoj kaj iris al la hejmo de Avino Ŝan. Liaj filo kaj bofilino ekrigardis unu la alian kaj lin sekvis portante brikojn.

* *Membro de kvin garantioj: Komunumano senlaborforta ĝuas la kvin garantiojn pri manĝo, vesto, hejtaĵo, edukado de siaj idoj kaj senpaga enterigo post sia morto.*



Ilustris Vu Ging'bo

POR SAVI INFANETON DE LABORISTINO

Estis la 8-a de junio de 1964. Sur la Ĉengdu-Ĉongking-a Fervojo flugis al Ĉongking pasaĝera trajno n-ro 307.

Subite el la laŭparoliloj eksonoris la voĉo de la ĉefkonduktoro: "Atentu, atentu la tuta konduktoraro! En nia vagonaro estas malsana bebo en danĝero, kiun ni devas sendi al Ĉongking kiel eble plej rapide por urĝa kuraco. Nun mi ordonas vin tuj ekagi: malfermu la du pordojn de ĉiu vagono je ĉiu haltejo, rapidigu la el-kaj en-vagoniĝon de la pasaĝeroj, elŝparu ĉiun ŝpareblan minuton kaj sekundon por savi la vivon de laborista infano!"


Kaj la tuta konduktoraro tuj ĵetis sin en la lukton por savi la junan vivon.....

La lokomotivisto rapidigis la trajnon je ĝia plena vaporo kun pli atenta esplorado pri la vojo; la hejtisto flamigis la fajron ĝis pleja ardeco, vigle svingante la ŝovelilon kaj enforigante karbon rapide kaj simetrie; la konduktoroj de tempo al tempo demandis la pasaĝerojn pri iliaj cel-stacioj kaj zorgis ke ili elvagoniĝu rapide, senerare kaj sekure. La radioparolistino foj-refoje antaŭsciigis pri ĉiu atingota stacio por ke pasaĝeroj plifruie sin pretigu por elvagoniĝo. Eĉ pasaĝeroj iris unu post alia al la vagono de la malsanuleto por iel helpi al la patrino kaj la bebo.

Dume en la vagono n-ro 3 juna flegistino streĉe provizis oksigenon al la malsana bebo kun fermitaj okuloj kaj pala vizaĝo. La patrino Giang Tingjuan sidis senmove kvazaŭ stulta kun sia infaneto en la brakumo.

Animstreĉiĝo kaj malĝojo simple senprudentigis la patrinon, kiu estis laboristino de la Ferbetonfosta Fabriko sub la Buroo de Minaj Aferoj de Jongĵong, Siĉuan-provinco. Jen kio okazis: Hieraŭnokte ŝia pliaĝa filo glutigis al sia frateto malpli ol duonjara grajnon de pizo, kiu, ŝvelinte, obstrukcis la bronkon kaj estigis sufokadon. Ŝi konsterniĝis, ĉar forestis ŝia edzo kaj fulmotondris. Akompanate de najbaroj ŝi sin turnis kun la bebo al la Kombina Hospitalo de la Mindistrikto. Per X-radia esploro oni konstatis, ke en bronko de la bebo troviĝas fremdaĵo kiun eligi oni tamen ne povis. Por peti helpon de iu arma hospitalo en Ĉongking ŝi devis ekveturi kun la filo per la trajno sub akompanado de speciale asignita flegistino Huang Ĝiĉin. Nun ŝi jam estis en la vagonaro, sed la filo restis en danĝero, tial ŝin regis malĝojo kaj maltrankvilo. Eĉ kiam la ĉefkonduktoro Zeng Mejfang venis antaŭ ŝin kaj demandis ĉu ŝi bezonas ian helpon, ŝi respondis nur per larmoj, fikse rigardante sian infanon.

La infano tute resaniĝis sub flegado de iu arma hospitalo en Ĉongking.



TELEFONADO, DEPEŜOJ

Kiam la flegistino Huang informiĝis, ke la trajno atingos Ĉongking ne pli frue ol 17.05, ŝi nereteneble ekkriis de surpriziĝo, ĉar la kunportata oksigeno elĉerpiĝos je 16.30. La patrino svenis. Ŝi revenis en sin nur post urĝa savado fare de la samvagonaj pasaĝeroj.

Kun scienco de komunisto, la ĉefkonduktoro Zeng dividis la zorgon kaj la malĝojon de la flegistino kaj la patrino. Konsiderinte pri ĉiaj eblaj okazoj, li tuj ekprenis rimedojn.

Kiam la trajno atingis Jongĉuan, li la unua saltis el la vagonaro, kuris rekte al la stacia administrejo kaj tie li ekspedis la unuan depeŝon al la vagonar-ekspedejo de la Ĉengdu-a Fervoja Buroo, petante ke la dudek stacioj de Jongĉuan ĝis Ĉongking klopodu por ke la trajno atingu Ĉongking kiel eble plej frue antaŭ la fiksita horo.

Por garantii la sekurecon de la bebo, antaŭ ĉio estis necese akiri oksigenon. Kaj kiam la trajno haltis ĉe la stacio Lingiangĉang, li ekspedis al la estro de la Ĉengdu-a Fervoja Buroo la duan depeŝon petantan ke tiu ĉi sciigu al la Giulongpo-a Fervoja Hospitalo sendi oksigenon al la vagonaro....

Kiam la trajno atingis la stacion Langantan, li pensis ke post elvagonigo de la infaneto, ĝi devos esti senprokraste sendita en la hospitalon. Li tuj ekspedis la trian depeŝon petantan ke la Ĉongking-a Stacio sciigu la armean hospitalon sendi ambulancan al la stacio.....

Sepfojojn Zeng Mejfang telefonis kaj telegrafis al Ĉongking kaj Ĉengdu en la daŭro de mallonga tempo.

TEMPO — VIVO

Anhelante la trajno rapidegis antaŭen.....

En Ĉengdu, farinte decidon la estro de la Fervoja Buroo donis ordonon: “Por savi la vivon de la laborista infano, la trajno n-ro 307 veturu libere de la templimigoj!”

Kaj la laborantoj de la vagonar-ekspedejo tuj denove ellaboris specialan horaron, por ke ĉiuj trajnoj cedu vojon al la trajno n-ro 307....

Kaj ĉe la dudek stacioj de Jongĉuan ĝis Ĉongking, centoj da laboristoj kaj oficistoj tuj sin ĵetis en la vivosavan lukton: la biletvendistoj antaŭtempe vendis la biletojn por trajno n-ro 307, dum la biletkontrolistoj, deĵorantoj kaj relŝanĝistoj kaj ĉiuj vagonarakceptantoj iris sur siajn postenojn antaŭ la fiksita horo.....

Kiam la trajno eniris Ĝujanghi-stacion, la staciestro diris al Zeng Mejfang: “Ordonon la buroestro jam donis, kaj la sekvaj stacioj jam faris ĉion necesan por fruigi la trajnon n-ro 307.”

Kiel emocia estis la novaĵo! La pasaĝeroj kortuŝiĝis ĝis larmoj, kiam ili propraokule vidis

la senprecedencan zorgadon montritan de la dekoj da stacioj por unu malsana infaneto de ordinara laboristino. Pro tia klasa frateco la patrino de la malsanuleto, Giang Tingjuan fine reakiris sian konscion el la sveniga malĝojo.

OKSIGENO — VIVO

Refoje ekbategis la koro de la flegistino Huang, kiu zorgadis pri la provizado de oksigeno al la pacienteto, ĉar la oksigeno tuj elĉerpiĝos kaj ankoraŭ ne venis la petita oksigeno, kiun devis liveri iu el la preterpasitaj stacioj.

Laŭ dufoja telefonado, la direktoro de la Fervoja Hospitalo de Giulongpo dume jam sendis kuraciston kaj flegistinon kun du boteloj da oksigeno, flugrapide veturi per ambulanco al la stacio Giulongpo. Por atingi la trajnon pli frue, la ambulanco kuris renkonte al ĝi kaj ĝin kaptis ĉe la stacio Funiuhi trans la stacion Kiezihi. En tiu tempo la trajno ĝuste eniris la stacion. La kuracisto Ma, kun ŝvitoplana vizaĝo, saltis en la vagonaron kaj enmanigis la oksigenujojn al la flegistino. Tiu ĉi prenis ilin per ambaŭ manoj, kaj diris nur post momento: “Gekamaradoj, kiel bonaj vi ja estas!”

LA BEBO ESTIS SAVITA

La trajno, kiel muĝanta drako, rekte flugis al la Ĉongking-a Stacio.....

Antaŭ du horoj, ĝiaj staciestro, pasaĝervagonaraj deĵorantoj, servantoj, telefonistoj k. a. jam faris kontakton kun la armea hospitalo tra multaj telefonoj.....

La ĉefkuracisto de torinolaringologio, armea kuracisto Li Ĝihin, kune kun du aliaj kuracistoj kaj tri flegistinoj rapidis al la stacio, kunportante tutan operaciilaron por tuj fari operacion ĉeloke en okazo de graviĝo de la malsano. Krome ili jam akiris konsenton de ĉiuj apudvojaj hospitaloj pretigi sian operaciejon por urĝa savo okaze de malboniĝo de la malsano de la bebo en la ambulanco.....

Fine, la trajno n-ro 307 atingis la fin-stacion — Ĉongking, 40 minutojn antaŭ la fiksita horo. Kiam la patrino kun sia infaneto en la brakumo suriris la kajon, la militkuracistoj tuj helpis ŝin eniri la ambulancan, kiu fulmrapide veturis al la armea hospitalo....

Karaj legantoj! Eble vi maltrankviliĝas pro la danĝero de la bebo? Nu, mi diru al vi la lastan novaĵon: Ĝi — la estonta ordinara laborulo jam resaniĝis dank’ al la kunaj klopodoj. Nun ĝi jam estas tiel vigla kaj sana, ke se oni ĝin amuzas, ĝi tuj eksplodas per sonoraj ridoj. Ĝi ridas tiel naive kaj hele kvazaŭ pro admiro pri la printempo de la popola respubliko!



Printem

Kiom Grasdikaj la Porkidoj!

Pentris Hing Fej (6 jara)





Anasidoj

Pentris Sun Ju (8 jara)

Ekskurso

Pentris Vang Ljuhia (9 jara)



Mi Servas en la Palaco por Geknaboj

Vang Ljuhia



綠霞画




解放军真正好

徐迪画 1964.3月20日



Nova Moro de Geknaboj



La heroaj fratinetoj Long Mej (dekstre) kaj Ju Ŝong ripozas en hospitalo post vundiĝo de frosto pro la tutnokta luktado kontraŭ neĝostormo sur la vasta stepo de Interna Mongolio por protekti la ŝafaron de la komunumo.



Lernanto Jang Juping (maldekstre) trovis 307 juanojn kiujn li redonis post serĉado al la perdinto Fan Ĝoŭ (dekstre). Jen kun dankoj ŝi honoras la knabeton per ruĝa floro.

IUTAGE, blindulo kun bastono en sia mano iris laŭ strateto en Pekino. Sepjara knabo iris antaŭ lin kaj diris: “Ĉu mi povas helpi al vi?” Ridetante, la homo baldaŭ malaperis en la fabrikon por blindulaj laborantoj kondukate de la knabo.

Bonaj servoj faritaj de geknaboj estas familiara vidaĵo en ĉinaj urboj nuntempe. Vizitantoj al la Dongdan-parko en Pekino ofte vidas dekjarulojn kun ruĝa koltuko de Junaj Pioniroj, akvumantajn la florojn kaj arbustojn. Tiuj ĉi geknaboj, el la elementa lernejo sur la proksima Ĉongven-strato, prenas helpon al la ĝardenistoj post lernejaj horoj kiel honoraĵon. En la varmegaj someraj posttagmezoj, geknaboj el la Dua Elementa Lernejo alportas malvarman trink-akvon al la trafikaj policianoj sur Ĉienmen-strato. Tiuj el Ŝijan-lernejo iras regule al trolebusa haltejo por helpi balai la plankojn de trolebusoj kaj purigi la vento-ŝirmilojn.

Maljunuloj kaj vidvinoj, kiuj ne havas proksimajn parencojn por ilin zorgi, ricevas specialan prizorgon. Lernejaj geknaboj laŭvice vizitas iliajn hejmojn kaj helpas al ili ordigi la ĉambrojn aŭ faras aliajn dommastrumojn.

Neniu tago pasas sen rakontoj pri geknaboj kaj iliaj bonfaroj en la tagjurnaloj kaj radiaj programoj. Dum la unuaj kvin monatoj de 1964 sole, 106,000 bonfaroj de lernejaj geknaboj en la urbo Ŝenjang, nordorienta Ĉinio, estis notitaj.

Junula krimo, kiu plagas urbojn en multaj partoj de la mondo, fariĝas tre malofta en Ĉinio nuntempe. En la pasintaj kvar monatoj neniu sub la 18-jara aĝo krimis en Niugie-distrikto kun 50,000 loĝantoj, Pekino. “Male,” diris ĉefpolicisto Hia Ĉi de la distrikto, “dekjaruloj alportas al la policejo brakhorloĝojn, mansakojn kaj aliajn objektojn, kiujn ili trovis en publikaj lokoj, tiel ke iliaj posedantoj povu esti trovitaj.”

“Kelkaj geknaboj alportas al la policejo nur unu aŭ du cendojn trovitajn sur la strato,” aldonis la ĉefpolicisto.



Gelernantoj en Ŝanhajo lavas tukojn kaj matojn por infanĝardeno en la tago de publika laboro dum somera libertempo.

La ĉefpolicisto varme laŭdas la gepatrojn, kiuj tiel serioze edukas siajn infanojn. “Kelkaj cendoj ne signifas multe,” li diris, “sed alporti al ni eĉ la plej malgrandajn objektojn trovitajn havas grandan valoron en instruado al infanoj esti honestaj kaj malegoismaj.”

Ĉinaj geknaboj havas tiujn ĉi bonajn kvalitojn pro la zorgo, kiun la tuta socio alprenas en edukado de morale sendifekta, socialistanima juna generacio. En lernejo, morala eduko estas akcentata tiel multe kiel libro-scio kaj fizika kulturo. La lernejo, la gepatroj kaj la ĝenerala publiko kunlaboras por doni al la juna generacio ĝustan edukadon.

Infana eduko ja fariĝas ĉies prizorgaĵo. Presejoj eldonas nur sanajn legaĵojn por la infanoj. Filmfarejoj

faras filmojn kiuj pliigas la sciojn de infanoj kaj helpas altigi iliajn moralajn nivelojn.

Granda nombro da palacoj kaj amuzejoj por geknaboj establitaj de la registaro en urboj kaj urbetoj donas al la junuloj ŝancojn por pasigi siajn liberajn horojn per ludoj kaj aliaj sociaj aktivadoj. Miloj da veteranaj revoluciuloj, laboristoj kaj homoj de aliaj sociaj tavoloj elŝparas tempon por veni al tiaj centroj por rakonti al la geknaboj pri la malfacilaj tempoj kaj bataloj, kiujn la maljuna generacio travivis. Ankaŭ ŝtat-posedataj fabrikoj funkcigas klubojn kaj legoĉambrojn por la infanoj de sia personaro.

Ankaŭ la gazetaro ludas sian rolon per aperigo de artikoloj pri infana edukado. Antaŭnelonge redakcia artikolo en la *Popola Ĵurnalo* akcentis la necesecon por eduki la infanojn en socialisma kaj revolucia tradicioj. Ĝi diris: “Ni kreskigu kaj eduku la pli junan generacion kun granda zorgo, ĉar ili estos tiuj, kiuj puŝos la revolucion antaŭen.”

ĈI JUĈING:

ASTRONOMIA GRUPO DE JUNAJ PIONIROJ


ASTRONOMIA grupo en Nankino, konsistanta el 31 geknaboj, gajnis famon pro sia studado de la ĉielaj korpoj. Ĝi estas unu el la multaj grupoj aŭspiciataj de la “Hejmo de Geknaboj”, kiu organizas varian kaj instruan ekstra-studplanan aktivadon por junaj lernantoj en la urbo.


Tiuj ĉi lernantoj de elementa lernejo, ĉiuj sub la 15-jara aĝo, konstruis post la lernejaj horoj sep teleskopojn, el kiuj la plej granda kun spegulo 27 mm en diametro. Kelkaj el ili estas ekspoziciitaj en Pekino kaj eksterlande.

Anoj de la Astronomia Grupo en la Nankina Domo por Geknaboj faras ĉielgloban modelon.

La ideo de konstruo de la unua teleskopo trafis la geknabojn kiam ili vizitis la proksiman Zigin-montan Observatorion, la plej grandan en Ĉinio. Gvidate de du sciencistoj

laborantaj tie, la geknaboj pririgardis ĉiujn specojn de antikvaj kaj modernaj instrumentoj, inkluzive de unu ring-sfero (angle: armillary sphere) konstruita en 1437 kaj unu ĉiel-





Infanoj de la Astronomia Grupo rigadas ĉinan antikvan astronomian instrumenton.

globon faritan antaŭ tri-cent jaroj. Ilia intereso plialtiĝis kiam ili vidis la universon tra granda teleskopo.

Ilia unua teleskopo de Newton-a tipo estis kompletigita en 40 tagoj, post multe da penado. Ili uzis malnovan akvo-tubon por la aksoj, anstataŭigis feron aŭ ŝtalon per ligno, kaj frotis kaj poluris forĝitajn fotografajn vitroplatojn por lensoj. Dum tiu periodo ili ofte vizitis la Zigin-montan Observatorion por konsiliĝi kun la sciencistoj.

Por havi teleskopon kiu povas celi al iu ajn parto de la ĉielo, la geknaboj poste konstruis alian teleskopon, muntitan ekvatore. Ĝi longas tri metrojn kun grandiga povo de 250 obloj. Per tiu ĉi nova teleskopo ili povis vidi klare la montojn kaj valojn sur la luno, sunmakulojn, satelitojn de Jupitero, nebulozojn, kaj la ringojn de Saturno.

Iom post iom, la geknaboj ne plu kontentiĝis je nura observado. Ili volis fotografi la lunon. Aldoninte simplan elpensadon al la teleskopo, ili turnis ĝin en astronomian fotilon. La unua provo fiaskis, sed akirinte la helpon de specialistoj, ili fine sukcesis. Nun ili jam faris dekduojn da fotoj de la luno, plena aŭ duona, kiuj estis taksitaj de sciencistoj kiel normaj.


Per la scio kiun ili akiris, la grupo skribis libron de 30,000 vortoj pri astronomiaj teleskopoj. Bona vendado inter la junaj legantoj, ĝi estis eldonita en 10,000 ekzempleroj. Ili skribis ankaŭ libreton de scienca fikcio pri vojaĝo al la luno.

La geknaboj ofte ĉestas lekcion pri la strukturo de la universo,

kelkfoje faritajn de profesoroj el la Nankina Universitato. Ili ankaŭ desegnas mapojn de la luno kaj stelaro kaj faras sunhorloĝojn, kaj ĉiel-globojn. Iatempe ili okazigas ekspoziciojn por popularigi scion pri sputnikoj, kiuj altiras multajn junajn

vizitantojn. La datrevenoj de fame konataj astronomoj, inkluzive de la ĉina astronomo Ĝang Heng (78-139 p. K.), elpensinto de ring-sfero, kaj la pola astronomo Copernicus de la dekseca jarcento, estas celebritaj de la grupo.

Scienca laborantino de la Zigin-monta Observatorio en Nankino komprenigas la infanojn pri teleskopo.



KOMPARO DE INFANAĜOJ

HEJMEN reveninte el la lernejo, mi malfermis la pordon senbrue kaj vidis, ke mia patro estas leganta ĵurnalon en la ĉambro. Mi iris rapide antaŭ lin kaj petis lin detale rakonti al mi pri sia infanaĝo.

“Kial? Vidu, kiel urgema vi estas!” Tion dirante, li deprenis mian librosakon.

Mi forviŝis per naztuko la ŝvitgutojn de sur la frunto kaj diris senprokraste: “Ĵus okazis nia junpionira kunveno, ĉe kiu multaj el miaj kunlernantoj faris raporton pri la infanaĝo de sia patro. Post kiam mi parolis, nia gvidanto diris, ke mia raporto estas ne sufiĉe detala. Li do postulis, ke mi vin intervjuu kaj faru detalan noton. Tial, tuj post la finiĝo de la kunveno, anstataŭ ludi piedpilkon mi haste revenis hejmen.”

“O, mi jam scias, vi junaj pioniroj nun faras komparadon de via infanaĝo kun tiu de via patro, ĉu ne?” Saĝa ja estas paĉjo! Antaŭ ol mi detale parolis pri nia aktivado, li jam ĉion eldivenis. Pendiginte mian librosakon sur muron, li diris malrapide: “Se ‘kompari’ vi volas, do vi diru la unua.”

“Mi diru?” mi iom hontiĝis. “Mian infanaĝon vi ja vidis propraokule.”

“Se vi ne diros, kiel ni povos fari komparon?” Paĉjo sidigis min apud lin.

“Nu!” Flanken klininte la kapon mi diris kun ĝeno: “Kiam mi estis kvarjara, panjo enigis min en infanĝardenon. Tie onjoj guvernistinoj flegis nin kiel patrinoj: matene ili nin vestis, nokte ili zorgeme nin enlitigis, en instruhoroj ili lernigis nin kanti, legi kaj dum ripozado ili nin amuzis per glitejo, balanc-boato, konstru-blokoj kaj aliaj ludiloj. Kiam mi estis sepjara, mi komencis viziti elementan lernejon. La instruistoj nin edukas diligente, sed, malgraŭ tio, ni kelkiam ne aŭskultas konsilojn de niaj instruistoj kaj iuj el ni ne estas disciplinemaj dum aliaj ne bone faras siajn ekzercajn taskojn....”

“Nun vi devas paroli pri vi mem.” Interrompante mian parolon, paĉjo min atentigis.

“Pri mi mem?” aŭdinte tion, mi ne scias kial, mi tuj sentis varmon sur la vangoj. Spite hontiĝon mi diris vole nevole: “Kelkiam mi skribis ne nete, kelkiam eraroj aperis en miaj ekzercaj taskoj de aritmetiko kaj krome mi eĉ ricevis noton 2 en

recitado de teksto kaj pro tio min kritikis la instruisto.... Nu, paĉjo, nun jam estas via vico.” Apenaŭ fininte la parolon, mi tuj skuis la brakon de paĉjo por lin urĝi.

“Aj!” Paĉjo ekĝemis profunde kaj diris post momenta silento: “Kiel mi sopiris viziti lernejon en mia infanaĝo! Por kontentigi mian deziron, via avo sukcesis pruntepreni iom da mono post multe da klopodoj, kaj tiel mi povis eklerni en elementa lernejo kiam mi estis okjara.

“En nia klaso estis filo de bienulo, nomita Ge Fuki, kiu ofte ofendis siajn kunlernantojn el malriĉaj familioj. Iutage, senmotive li min batis per la pugno kaj piedo post leciona horo. Ne povante min deteni de kolero, mi repagis lin per klakaj vangofrapoj. Ploreante pro la survangoj li saltis el la klasĉambro, kvazaŭ muso ĉasata de kato. La malriĉaj geknaboj senescepte aplaudis mian kuraĝan ribelon kaj ekstreme ĝojegis.” Paĉjo rakontis kun



Ilustris Ĉen Hivej

pli kaj pli granda ekscitiĝo kaj mi aŭskultis kun pli kaj pli granda ĝojo. Pretervole mi suprenfaldis miajn manikojn kaj kriis: “Paĉjo, lasu min helpi al vi, kaj batu Ge Fuki ĝis duonmorto!”

“Kiel bone estus, se vi povus helpi al mi!” Paĉjo ridis amare kaj daŭrigis sian rakonton per peza tono. “La vangofrapoj ja ĝojigis la malriĉajn geknabojn, tamen sekve de tio mia malfeliĉo venis: nur du monatojn lerninte en la lernejo, mi jam estis elpelita pro tiu okazintaĵo.”

“Fi! Malbeninda bienulido! Paĉjo, kial vi ne faris proteston al la lernejestro?” Kolerege mi piedbatis la plankon kaj rigardadis la indignan vizaĝon de paĉjo.

“Tiam la regpotenco estis en la manoj de la burokratoj kaj bienuloj, kaj tial al la malriĉuloj ekzistis nenia justeco. Elpelite el la lernejo, mi povis nur labori kiel jardungito de granda bienulo Guo Laŭoŭ, kune kun via avo. Ĉiutage, ellitiĝinte tre frue, mi aŭ plugis aŭ sarkis, de mateno ĝis nokto; tiel lacigita, ke mi apenaŭ povis spiradi. En tia situacio, kiel mi kuraĝus ankoraŭ pensi pri lernado?”

“En la jaro 1937, kiam mi estis jam deksejara, la Oka-voja Armeo venis en nian hejmlokon — Luanĉeng, Hebej-provinco. Kvazaŭ ricevante mildan pluvon post longdaŭra trosekeco, mi ĝoje aniĝis al la armeo.” Tion rememorante, paĉjo pugnis sian manon kaj diris kun eksciteco: “Ni marŝis kun la revolucia armeo, venkis la japanajn invadintojn kaj la reakcian Kuomintang-klikon, faligis la bienulojn kaj lokajn tiranojn, kaj sekve la subprematoj forskuis de si la feŭdan jugon. Nun la geknaboj kia vi povas feliĉe lerni en lernejoj kaj fariĝas junaj pioniroj aro post aro. Sed, se vi ne bone lernas laŭ la instruo de Prezidanto Maŭ, kiel vi povos fariĝi defendantoj de la fruktoj de la revolucio?” Fininte la parolon, paĉjo ĵetis al mi intiman rigardon plenan de espero.

Aŭskultante lin, mi sentis, ke la koro forte batas kaj la sango bolas. Profunde gravuriĝis en mian koron la vortoj de paĉjo. Mi pensis en mi: se juna pioniro ne penus havigi al si labor-kapablojn, kiel li povus transpreni sur sin la pezan ŝarĝon de la veterana revolucia generacio, kiam li estos plenkreskinta? Tiel pensinte mi levis la kapon kaj diris decideme: “Paĉjo, mi nepre korektos miajn manojn kaj bone lernos por ne vanigi vian esperon.”

“Ne, vi devas diri: por ne vanigi la edukon de la Partio kaj la instruon de Prezidanto Maŭ.” Korektante mian parolon, paĉjo ĉirkaŭprenis miajn ŝultrojn kaj kune kun mi iris en la internan ĉambron por vespermanĝi.

Post la vespermanĝo, mi skribis sub lampo ĉi tiun paĝon neforgeseblan, en mia taglibro.

LA UNUA TAGO

*Tuj kiam mi el la lernejoj alvenis la fabrikon,
Kondukis min en laborejon majstro la maljuna.
Plenmanon da kemisterko neĝblanka li al mi
prezentis
Kaj min demandis: “Ĉu plaĉas al vi ĉi laboro
nuna?”*

*Karespremante ĝin en buloformon per la manoj,
Knabecon la mizeran ekmemoris mi subite —
En vintro malvarmega, en la neĝa vento frosta,
Kun panjo mi iradis almozpete, malrapide.*

*Kvankam de frostoj miaj manoj etaj ruĝe ŝvelis,
Neĝbulon mane premi tamen ŝatis mi en ludo.
Ho, kiel volus mi, ke ĝi turniĝu en farunon,
Por ke mi ĝin manĝegu for per unu granda gluto!*

*Maŝina bruo rompita la amaran rememoron,
Orelojn miajn frapis voĉo de l' majstro kiel ondo:
“Da kemisterko unu ĝino — tri ĝinoj da nutraĵo,
Ĉi tie estas por agrikulturo la postfronto.”*

*Jen kvazaŭ klara akvo fluus en trosekan kampon,
Pleniĝis tuj de varmo mia tuta kor' interne.
Ha, blanka neĝo ja povas transformiĝi en nutraĵon!
Patrio, batalados mi ĉi tie por eterne!*

Trad. Vang Ĉongfang





HIS- TORIO DE LIBE- RIGITA SERVU- TULO

Tibeta Kantrakonto

Verkita de Tra Phun-cog, estro
de la Hinĝaja Popolkomunumo de
Juŝu-gubernio, de la Juŝua Aŭto-
noma Subregiono de Tibetanoj en
Kinghaj-provinco

Trad. Laŭlum

*La sklava vivo plenas de doloro,
Aŭskultu mian kanton de memoro.
Alies kantoj trilas kun plezuro,
La miaj ploras el malĝoja koro.*

*Gepatroj miaj estis servutuloj
Kaj devis min forlasi al la sorto;
Ne tial, ke min ili ne amegis—
La mastro trovis min nur bub' sen forto.
Forpasis paĉjo en karcer' privata,
Kaj panjon Morto kaptis en bovstalo.
Sklavido devis vivi kiel sklavo—
Heredo mia estis sklav-fatalo.*

*“La lup' kruelas,” “la viper' venenas”,
Kaj multaj diras ke sklavviv' larmplenas.
Sed nur viktimoj mem ja spertis tion,
Pri l' sklava pen' nur sklavo havas scion.
Eĉ la ŝarĝbestoj havas sian ĝojon
Kaj povas iri, halti laŭ la volo;
La sklavo havas ĉiam nur malĝojon,
Sed ne liberon eĉ por ir', parolo.
Fekundan teron plugis mi kun ŝvito,
Sekalamasoj altis kiel montaro,
Penege mi laboris dum tutjaro,
Sed sen buŝplen' da zanbo el sekalo.
Mi zorge paŝtis grasan bov-ŝafaron,
River' da lakto estis mia kreo,
Mi pene laboregis tutan jaron,
Sed ne ricevis buŝon da lakteo.
Fadenojn mi faradis el arĝenta lano,
Sed portis mi nur ĉifonaĵon brunan.
En vintro sopiradis mi printempon,
En pluva tago gajan lumon sunan.
Ja tendojn faris mi el bovoharoj,
Sed devis mi loĝadi ĉe hundstalo.
La stel-ĉiel' sin super mi etendis,
Tutnokte la tagiĝon mi atendis.*

*La mastro kvankam ne laboris,
Sed lia riĉ' amasis monte.
La sklavo spino-rompe penis,
Sed eĉ ne groŝon gajnis konte.
Eltenis mi neĝmordon kaj ventbaton,
Toleris mi frostegon kaj malsaton,*

*Sed murd' al la gepatroj — ja kruelo
Supera al ebleco de tolero!*



*Jarcentojn servis ni ĉevale, bove,
Insultojn, batojn spertis ni sen fino,
L' edzinon kaj infanojn oni de ni rabis!
Ĉu tolereblas tia sanga krimo!
Ni longe atendadis....
Jen venis Kompartio!
Rompiĝis la katenoj,
Ekbrilis sunradioj.
Ho, prezidanto Maŭ,
Vi, kara patro nia,
Kiel ni sklavo povus liberiĝi
Sen saĝa gvido via!*



*Memor' pri nia viv' de tiu horo
Plezuron portas nun al mia koro.
Renversis ni la reakciularon
Kaj prenis en la manojn la ŝtatĉaron.
Mi faris plendon en amaskunveno
Pri la suferoj miaj kun venĝemo.
Levinte l' feŭdan kovron de mil jaroj,
Elfosis ni l' radikojn de krimfaroj.
Post kalkulad' pri l' ekspluato, mi komprenis,
Ke ne l' sinjor' min, sed lin mi vivtenis.
Antaŭe ni sklavadis senesperaj,
Sed nun ni jam fariĝis mastroj veraj.*

*La ĝojkomencon sekvis ĝoj' kreskanta,
L' unuajn ĝojojn sekvis ĝoj' pli granda.
Fondiĝis la Popola Komunumo,
Jubilis la paŝtistoj en sunlumo.
La komunumaj fruktoj ĉiam pli abundas,
Sur montoj grasaj gregoj ĉie dense puntas.
Kaj dum kunveno de l' reprezentantoj
Mi elektiĝis estro de l' gvidantoj.
Hodiaŭ en feliĉ' mi ne forgesas
La nigran pasintecon kaj ne ĉesas
Batali kontraŭ l' mastroj servutulaj,
Ĉar ili estas uloj lup-naturaj.*



*Feliĉon ni akiris malfacile,
Ja sangis pro ĝi multaj pionire.
La idojn miajn ĉi rakont' impresu,
Ke ili klasbatalon ne forgesu.*





ASU BADI

- Ĥore: Ho, Asu Badi,
Ho, vi solulo!
Bonvolu tuj rakonti
Pri viaj tristo kaj plezuro,
Pri via pasintec' kaj via nuno.*
- A: Antaŭ la Liberiĝo, vivis mi en solo
Loĝante en kaverno sur montego.
Sur l' ebenejo monte altis grenamasoj,
Sed en stomako mia ne troviĝis grenereto.
Neniam mi surhavis ŝalon el lanŝtofo,
Sed la ŝafaroj sur la monto multas kiel nuboj.
Se oni povus fari ŝalojn el la musko,
Kaj molaj kaj senkostaj ili estus ekster dubo!*
- B: Ho, kia diro!
En revon vi vin gvidis!
Mi muskan ŝalon
Neniam vidis.*
- C: Kial vi ne vidis?
Nenio stranga ĝi ja estas
Jen kiel belas lia ŝalo!
Per fajre varma ŝalo li sin vestas!*
- Ĥore: Ni ne forgesu, ke ĝi estas el bonfaro Kompartia,
Nekalkuleblaj estas la bonfaroj de Maŭ Prezidanto nia!*
- A: Kiel bonege, se la herboj donus grenon!
Mil mil buŝelojn povus doni unu monto.
Ja kiom multas ĉe ni la montegoj!
Neelĉerpebla estus nia grena fonto!*
- B: Ho, kia diro!
En revon vi vin gvidis!
Mi herbo-grenon
Neniam vidis!*
- C: Kial vi ne ekvidis?
Miopas la okuloj!
Ja kiom da dezertaj montoj iĝis ŝtuparkampoj,
Kaj kiom da mizeraj iĝis trezorujoj!*
- Ĥore: Ĉio ĉi ja fariĝis pro la bona politiko Kompartia!
Nekalkuleblaj estas la bonfaroj de Maŭ Prezidanto nia!*

“Asu Badi” estas tradicia formo de popolokanto de Ji-nacio loĝanta en la Granda kaj Malgranda Liang-montaroj. Origine estis solulo nomata Asu, kiu kantis pri siaj malfeliĉa vivo kaj revoj. La Ji-popolo heredis lian kantformon kaj kantadis laŭ ĝi siajn mizerojn en la malluma socio antaŭ la Liberiĝo. Post la Liberiĝo, la sklavo sin turnis supren kaj komencis sian vivon pli feliĉan ol tiu revita de Asu Badi, kaj iliaj Asu Badi kantoj alprenis novan enhavon. Antaŭe ĝi estis nur solo, sed nun ĝi jam disvolviĝis en tripersona kantrakonto enmiksita per paroloj. Ĉi sube ni prezentu al vi tradukon de unu Asu Badi prezentita dum la Festivalo de Kantoj kaj Dancoj de Nacimalkultaj Amatoroj.

A: *Kiel bonege, se ni povus kapti stelojn,
Ke ili brilu ĉe ni dome kaj ekstere!
Ke ili servu al ni kiel lampoj,
Ke l' noktoj lumu kiel tagoj helaj.*

B: *Ho, kia diro!
Eĉ en frenezon nun vi glitis!
Mi stelajn lampojn
Neniam vidis!*

C: *Ne-vidon vi asertas,
Sed fakto ja mem klaras:
Fondiĝis ĉe ni hidro-elektrejo,
Ĉe ĉiu domo stelaj lampoj aras!*

Ĥore: *Ĉio ĉi estiĝis pro la Ĝenerala Linio partia,
Ne kalkuleblaj estas la bonfaroj de Maŭ Prezidanto nia!*

B C: *Ho, Asu Badi!
Kiel do vi vivas nune?
Amare aŭ miele?
Sciigu, ke ni sentu kune.*

A: *Jen, kia diro!
Vi homoj sen sufiĉaj saĝo-dozoj!
Vastegas la kampar' de l' kooperativo,
Ke turt' ne povas ĝin transflugi sen ripozoj!
Nekalkuleblajn havas nun ni gregojn
Sufiĉajn por plenkovri naŭ montegojn!*

B C: *Ha hej!
Ja kiu atendis tian gregmultiĝon!
Ja kiu atendis tian grandan riĉon!*

A: *Nun marŝas mi sur voj' socialisma,
Mi estas an' de terkultura kooperativo!
La Kompartio estas mia vojgvidanto,
Fortika bazo por mi — nia kolektivo!*

Ĥore: *Jes! marŝas ni laŭ la socialisma vojo,
Ni volas esti membroj eminentaj!
La Kompartio estas nia vojgvidanto,
La ŝtat' por ni — solida fundamento!
Netrotakseblaj estas la bonfaroj Kompartiaj!
Nekalkuleblaj estas la bonfaroj de Maŭ Prezidanto nia.*

Trad. Laŭlum

EN TRIBUNALO DE LA MALAMIKO*

JANG ĜILIN

POST kiam k-do Vang Ĵuofej estis eskortita al Gujsuj, li estis enkarcerigita en la “Unua Modela Malliberejo” por esti juĝota rekte de la reakcia Supera Juĝejo de Sujjuan-provinco. La reakcia Supera Juĝejo forte deziris informiĝi tra la “juĝado” pri la agadoj de la Komunista Partio kaj kie estas la komunistoj. Sed ĉiun fojon kiam okazis juĝado, k-do Vang aŭ propagandis marksism-leninismon aŭ malkaŝis la krimojn de la malamiko, kio tiel konsternis la reakciajn juĝistojn ke ili povis fari nenion alian ol prokrasti la “juĝadon”.

Pli ol unu fojon k-do Vang Ĵuofej diris: Arestite, komunisto devas esti ĉiam preta oferi sian vivon. Nur kun decido de sinofero li povas entrepreni pli firman lukton kontraŭ la malamiko. Iufoje, iu malliberul-amiko lin riproĉis kial li ĉiam diras “malbon-aŭgurajn” vortojn. Li respondis: “Mia amiko, mi ja ne volas morti, sed la reakciuloj ĉiam intrigas por min mortigi. Estante malkaŝa komunisto, mi devas manifesti la noblan fidelecon de komunistoj. Mia konduto havas rilaton kun la prestiĝo kaj influo de la Partio. Mi ne devas postlasi en la socio iomete da malbona impresoj, eĉ erare diskonigita impresoj.”

K-do Vang luktis kontraŭ la malamiko kun decido de sinofero, sed samtempe li ankaŭ tre zorgis pri la taktiko de la luktado. Post kiam li venis al Gujsuj, li ĉiam konsideris la rimedojn, kiujn la malamiko povos alpreni kaj la formojn de lukto kiujn li devas alpreni. Li konjektis ke la malamiko havas nur la jenajn tri rimedojn por trakti la komunistojn: la “malmolan”, la “molan” kaj la “muelan”. Ĝi jam uzis delonge la “malmolan” minacon, kiu hontinde malsukcesis. Tre kredeble ĝi uzos la du aliajn rimedojn, la “molan” allogon kaj la “muelan” turmentadon. Depost kiam li havis interparolon kun “sendito” de la reakcia provinca registaro, li des pli konvinkigis, ke la malamiko uzos la lastajn du rimedojn por lin trakti. Li diris: “Se la malamiko publike min juĝos, mi do transformos la tribunalon de la malamiko en komunisman tribunon, kie mi propagandos la opiniojn de la Partio, kaj malkaŝos kaj frapos la malamikon.”

Efektive la tago kiun k-do Ĵuofej antaŭvidis finfine venis.

Lerninte la lecionojn de la antaŭaj malsukcesoj, la reakcia Supera Juĝejo aktive sin preparis por la “juĝado” kaj kolektis per ĉiuj rimedoj “materialojn” por ruini la Komunistan Partion. Kiam ili pensis ke ĉio

estas bone preparita, ili komencis la reakcian juĝadon. Jen disvolvigis furioza lukto.

La tribunalo estis forte gardita, kun ĝendarmoj kaj policanoj starantaj ambaŭflanke. Sur la podio solene sidis la estro de la reakcia Supera Juĝejo kaj iu juĝisto nomata Gin, kiuj sin vestis per bonzaj roboj (roboj de juĝistoj). Apud ili sidis uloj kiaj skribistoj. K-do Vang estis ordonita sidi en ligna seĝo ĝuste kontraŭ la juĝisto.

Post la laŭkutima demando pri la nomo, juĝisto Gin rekte demandis al k-do Vang Ĵuofej, kiajn faktojn de “krimaj” agadoj li faris post aliĝo al la Komunista Partio. K-do Ĵuofej ĵetis malestiman rigardon al la juĝisto kaj stariĝis:

“Estante juĝisto, ĉu vi konas la leĝojn?”

“Mi demandas vin pri la faktoj de viaj krimoj!” ripetis juĝisto Gin.

“Unue respondu al mi: Kio estas krimo?” plue demandis Ĵuofej al la juĝisto.

“La krimo estas ke vi malobservis la ‘Leĝon de Urĝa Puno kontraŭ Tiuj Kiuj Endanĝerigas la Respublikon’.”

“Kia ‘respubliko’? Ĝi estas nur bando da banditoj kiuj tiranas rajdante sur la dorso de la popolo! La tiel nomata ‘Leĝo de Urĝa Puno’ estas nenio alia ol leĝo kiu protektas la imperiistojn, grandbienulojn kaj egburĝojn! Kiu laboristo, kamparano aŭ alia laboranta popolano partoprenis en la farado de tiu ‘leĝo’? La fakto ke vi efektivigas tian ‘leĝon’ nur signifas ke vi estas instrumentoj de imperiismo, kompradoraro kaj feŭdaj fortoj, ke vi estas iliaj lojalaj lakeoj!”

La severaj, justaj demandoj de k-do Ĵuofej ruĝigis la estron de la reakcia juĝejo kaj juĝiston Gin, kiuj restis senrespondaj dum longa tempo palpante siajn orelojn kaj vangojn. Finfine la juĝisto nur povis diri senrezono:

“Mi ne zorgas pri via argumentaĉo. Ĉiel ajn vi estas krima!”

“Je kio mi estas krima? Mi estas ‘krima’ je tio ke mi kontraŭstaras vian naci-endanĝerigan kaj popolaruinigan krimon! Je tio ke mi oponas vian naci-perfidan kaj al malamiko kapitulacian krimon! Je tio ke mi oponas vian diktatorecan, popol-ekspluatan, popolsubpreman kaj pro subaĉetaĵo leĝ-erarigan krimon! Se vi estus efektive sentimaj herooj, se vi ankoraŭ havus iometon da konscienco, ni kune iru al la publiko kaj petu la popolamason juĝi, ĉu ni komunistoj aŭ vi estas kulpaj je absolute nepardoneblaj krimoj!”

La refuto de k-do Vang Ĵuofej estis tiel fortega ke la teruritaj reakciaj juĝistoj restis gapantaj, eĉ ne sukcesante daŭrigi sian balbutadon. Ili povis nur proklami ĉesigon de la juĝado.

Post tiu ĉi "juĝado" la reakcia juĝejo prokrastis lin juĝi por tre longa tempo kaj ne kuraĝis rekomenci la juĝadon. Al la plurfoja insistado de k-do Vang la reakcia juĝejo restis surda. Post okmonata preparado ĝi finfine komencis alian juĝadon.

K-do Ĵuofej bedaŭris, ke la lastan fojon li ne parolis pri marksism-leninismo kaj la politikoj de la Partio, sekve li decidis, ke li bone priparolos tion ĉifoje. Tial tuj post kiam komenciĝis la juĝado, li kaptis ŝancon por paroli la unua.

"S-roj juĝistoj, vi tre interesiĝas pri la agadoj de la Komunista Partio, ĉu ne? Mi volas priparoli la temon hodiaŭ. Sed, antaŭ ĉio mi devas paroli pri marksism-leninismo..."

"Ni volas informiĝi de vi nur pri la faktoj de la agadoj de la Komunista Partio, sed ne pri ismo."

"Sinjoroj, ĉiuj agadoj de ni komunistoj estas laŭ la bazaj principoj de marksism-leninismo. Se vi volas scii la agadojn de la Komunista Partio, vi devas unue kompreni marksism-leninismen. La Komunista Partio de Ĉinio naskiĝis por kontentigi la bezonojn de Ĉinio kaj fondiĝis laŭ marksism-leninismo."

Aŭdinte tion, la stulta juĝisto haste intermetis, kvazaŭ kaptinte ian kulpigaĵon:

"Prave. Tial la Ĉina Komunista Partio devenas de eksterlando kaj estas direktata de Rusio."

Al lia kalumnio k-do Vang Ĵuofej senprokraste donis fortan rebaton:

"Sinjoro, vi estas laŭlitera papago de imperiismo. Eble vi scias, ke sin trovas nun komunista partio en ĉiuj landoj de la mondo. Ĉar kie ajn ekzistas klas-ekspluatado kaj klas-subpremado, la ekspluatatoj kaj subprematoj tieaj nepre leviĝas por kontraŭstari kaj lukti kaj en la luktado nepre naskiĝas organizoj, kiuj efektive gvidas ilin por gajni venkon. Tiuj organizoj estas la komunistaj partioj de ĉiuj landoj!"

Konsternite dum momento, juĝisto Gin reatakis per senpova argumento:

"Nu, kaj Marks kaj Lenin ja estis eksterlandanoj, ĉu tio ke ĉinoj propagandas la ismon de eksterlandanoj ne signifas perfidon al sia nacio?"

Apenaŭ k-do Vang aŭdis la vortojn "perfidon al sia nacio", li koleregis ĝis liaj okuloj ekflamis. Rekte rigardante la juĝiston, li diris sarkasme:

"Sinjoro juĝisto, vi estas simple ridinda, tiel ridinda ke oni povas vin nur malestimegi. Estas mirinde ke vi estas senscia ĝis tia grado. Al vi mi devas klarigi ian komunan saĝon: Marks estis hebreo en Germanio. Ĉar li estis persekutata tie, li iris al Parizo, kie li partoprenis en revoluciaj agadoj. Poste li vivis en Londono, Britio. Li partoprenis en la laborista movado de Britio. La angla laborista klaso multe ŝatis lin. Laŭ via logiko, do la anglaj laboristoj perfidis sian nacion por Marks? Surbaze de la vero de marksismo, Lenin starigis bolŝevistan partion en Rusio, kaj gvidis la popolon por renversi la reakcian regadon de la caro kaj forpeli la germanajn agresantojn. Ĉu Lenin forpelis la germanojn kaj perfidis Rusion por la germanoj? Sinjoroj, marks-

ism-leninismo estas la vero por la laboranta popolamaso en batalo por sia liberigo. Ĝi disvolviĝas en iu ajn lando kiu ĝin bezonas kaj neniu povas tion malhelpi!"

Parolante ĝis ĉi tie, k-do Ĵuofej ekturnis la paroltemon kaj pafis pli furiozan rebaton kontraŭ la malamiko:

"Rilate al naciperfido, Ĉiang Kajŝek de Kuomintang ja faris grandan nombron da efektivaj naciperfidaj agoj. Ni ne parolu pri la malproksimaj okazaĵoj. Ni komencu de la incidentoj 'Septembro-Dekoka' kaj la 'Januaro-Dudekoka'!..."

La torenta parolado, la trafa analizo kaj la akra rebato de k-do Vang Ĵuofej foj-refoje repuŝis la kontraŭatakojn de juĝisto Gin, kiu tiel hontis ke lia vizaĝo jen paliĝis jen ruĝiĝis kaj li konfuziĝis kvazaŭ sidante sur pingloplena kuseno. Kiam k-do Vang komencis malkovri la naciperfidajn krimojn de Ĉiang Kajŝek, juĝisto Gin estis tiel terurita, ke liaj gapantaj okuloj rigidiĝis kaj poste tuj haste stariĝis kaj ĉesigis la paroladon de k-do Vang:

"Ĉesu, ĉesu! Ne parolu plu! Propagandi marksism-leninismen en Ĉinio estas kontraŭleĝa. Krome, vi agas tiel maldece en la tribunalo kaj insultas la gvidanton de la partio kaj patrio. Nur tio ĉi sufiĉas por vin kondamni."

K-do Ĵuofej diris rikanante:

"Jen montriĝas via vera vizaĝo de lakeo! Vi ne kuraĝas alfronti la veron!"

"Kia ofendo! Kia insulto! La juĝado estu ĉesigita!"

Juĝisto Gin estis tiel kolera ke lia vizaĝo vidiĝis kvazaŭ hepato de hundo. Murmurante kaj viŝante la ŝviton, panike li malsupreniĝis de la juĝista podio.

** Vang Ĵuofej (1896-1946), fama konata politika aktivulo, unu el la plej fruaj gvidantoj de la Komunista Partio de Ĉinio. Li aliĝis al la Ĉina Kompartio en 1922. Arestite en Sujjuan-provinco de la kuomintangaregistaro en 1931, li firme daŭrigis la revolucionan luktadon en la malliberejoj en Sujjuan kaj Tajjuan. En la somero de 1937 li elkarceriĝis. En la Sepa Tutlanda Kongreso de la Komunista Partio de Ĉinio li estis elektita ano de la Centra Komitato. Post la venko de la Kontraŭjapana Rezistmilito li partoprenis en la armistica intertraktado kun Kuomintang. Je la oka de aprilo, 1946, li mortis pro akcidento de aeroplano, kiu falis survoje de Ĉongking al Jan-an. Tiu ĉi fragmento pri lia luktado estas ĉerpita el la libro "Vang Ĵuofej en la Malliberejoj".*

Floretoj

La muelilon tiranta azeno, kvankam eble kun ir-distanco de miloj da mejloj, neniam povos eniri novan limon.

* * *

Akvogutoj povas trabori ŝtonojn, ne nur ĉar ili frapas konstante, sed ankaŭ ĉar ilia celo estas ĉiam la sama.

* * *

Furioza vento povas disblovi sennombrajn sablerojn, sed estas malfacile por ĝi eltiri herbeton profunde enradikiĝintan.

SURPRIZA ATAKO

—Letero el Hanojo

LA vjetnama popolo tradicie celebras kun ĝojo sian Printempan Feston. En la vespero antaŭ la festotago, la Centra Komitato de la Sudvjetnama Naciliberiga Fronto proklamis pafocesisigon en la tuta regiono de Sudvjetnamio dum sep tagoj de la festaj ferioj ekde la nulo-horo de la 31-a de jan. ĝis la 24-a horo de la 6-a de feb. La Liberiga Armeo kaj la popolo de Sudvjetnamio kun fervoro kaj ĝojo ĝuis la Printempan Feston de 1965.

La 7-an de feb., la unua tago post la pafocesisigo, la armita popolo de Sudvjetnamio tuj lanĉis atakojn al la trupoj de Usono kaj ĝia lakeo en diversaj lokoj. En la centra parto, ili ekatakis la strategian pozicion de la malamikoj en Plejku; en la nordo, ili detruis la bazlokon de Vjet-an kaj la "Fermuran Defendlinion" ĉe la norda bordo de la rivero Khoan-ha tiom firme defenditajn de la malamikaj trupoj, ke la usonaj agresantoj kaj ĝiaj lakeoj vekriadis pro teruraj suferoj kaj paniko.

GRANDA VENKO EN PLEJKU

La strategia bazo de Usono kaj ĝia pupo La urbo Plejku en la provinco kun la sama nomo en Sudvjetnamio situas ĉe la kruciĝo de la strategia ŝoseo N-ro 14 en Taj-ngujen-regiono kun la strategia ŝoseo N-ro 19 de Kuj-nhon ĝis Plejku, 220 mejlojn for de Sajgono. Tie estas granda milita bazo de la usonaj agresantoj kaj ĝiaj lakeoj en la centra distrikto de la centra parto. La komandejo de la Dua Armeo kaj la Dua Taktika Regiono de la sudvjetnama puparmeo lokiĝas 3 kilometrojn norde de la urbo Plejku. Sudokcidente de la komandejo estas vicoj da loĝdomoj por la usonaj "konsilantoj", kie loĝas konstante ĉ. mil agresantoj el Usono. Proksime de la ŝoseo N-ro 19, 3 kilometrojn oriente de Plejku estas Holloway-tendejo, grava usona aerarmea bazo, kie restadas ĉ. cent usonanoj kaj la aereskadro de la 52-a Bataliono de la usona aerarmeo.

"La mondo absolute sekura" Ĉar Plejku estis strategia bazloko tiom grava kaj loĝata de tiom multe da jankioj, la tiea gardo ja estis severega. Ĉirkaŭ la komandejo de la puparmeo, la kazerno de la usonaj konsilantoj kaj Holloway-tendejo estas multe da dratbariloj unu post alia en zonoj kun lumraketoj kaj elektrominoj, nombro da tranĉoj kaj fosoj, kaj ekster tiuj ĉi defendiloj, estas

multaj fortikaĵoj dense lokitaj. La malamikoj ankoraŭ timis ke ili ne sufiĉas por ilin sekurigi, ili do forhakis ĉiun arbon ĉirkaŭ la bazloko, starigis "Blankan Zonon" kun larĝeco de 3 ĝis 5 kilometroj. La popolanoj estis pelitaj en la "Strategiajn Vilaĝetojn", kaj neniun fremdan homon estis enlasita en tiun gravan distrikton.

Rilate la gardadon, en la komandejo de la puparmeo staradis bataliono de la ĉefforto kaj soldatoj de la memdefenda trupo. Estas ankaŭ pli ol cent usonaj ĝendarmoj kaj policistoj ekipitaj per modernaj armiloj, kiuj rekte gardas la kazernon de la usonaj konsilantoj kaj la aerodromon. Krome estas speciala usona taĉmento kaj 12 tankoj kiuj tagonokte laŭvice patrolas ĉe la bazloko. Ĉirkaŭ la bazloko de Plejku troviĝas fortega serĉluma sistemo, kaj nokte, hela lumo regas tie. La usonaj agresantoj opiniis ke tia forta defendo estas perfekta kaj tute sekura, tial ili fiere nomis la Plejku bazon "mondo absolute sekura".

Fulma Atako La Liberiga Armeo de Sudvjetnamio, helpate de la popolamasoj en Plejku, lerte enŝteligis en Plejku-distrikton, transpasis la "Blankan Zonon", kaj ĉiujn gardejojn de la malamikoj kaj lokis rapide siajn fortojn proksime al la antaŭfiksita cellokoj.

Je la 2-a horo frumatene de la 7-a de feb., la liberiga armeo direktis siajn diversajn pafilojn en la sama tempo al la stabejo de la pupa Dua Armeo, la komandejo de la pupa Dua Taktika Regiono, la kazerno de la usonaj konsilantoj kaj la aerodromo de la 52-a bataliono de la usona aerarmeo kaj lanĉis ŝtorman atakon. Samtempe ankaŭ la fortikaĵoj ĉirkaŭ Plejku estis atakataj. La malamikoj konsterniĝis de tia subita atako kaj eĉ ne sciis kio estis la ĉefa atakata punkto kaj ne kuraĝis savi unu alian.

Ĉe la ĉielskua bruado el la aerodromo kaj la tenejo, en la incendio ĉe Plejku, kondukate de konsciigintaj patriotaj soldatoj en la puparmeo ĉiuj sturmgrupoj de la liberiga armeo rapide sin ĵetis kiel ferocaj tigroj en la nestojn de la malamikoj, kaj ekstermis ilin unuj post aliaj. Ĉifoje oni atakis tiel rapide, ke ĝi daŭris nur 30 minutojn. Kiam la suno aperis en la oriento, la batalantoj de la Liberiga Armeo jam ĉiuj revenis al sia bazloko kaj neniun perdiĝis.

La atako donis fortan baton al la malamikoj. En la atako sola al la usona kazerno kaj Hollo-

way-tendejo, oni mortigis kaj vundis 357 usonajn agresantojn, komplete detruis iliajn 3 transportajn kaj 4 rekognoskajn aeroplanojn kaj 35 jetohelikopterojn.

TRIUMFO ĈE VJET-AN

La defendlinio "Fera Muro" Vjet-an estas milita bazo de la malamikoj en Kuang-nam-provinco. Ĝi situas supre de alta monto, 8 kilometrojn sude de la gubernio Kueson, apud la Thang-binh-Huu-son-ŝoseo. Tiu ĉi bazloko havas tre fortikan defendan konstruaĵon kun 4 redutoj ĉe la 4 anguloj, interne de kiuj estis pezaj maŝinpafiloj kiuj povis ŝirmi unu alian. Ĉirkaŭ la fortikaĵo estas unu post alia 4 dratbariloj, kaj krome ankaŭ minoj, tranĉe-fosoj ktp. Pli eksteren, sin trovas ankoraŭ du altaj muroj kun interspaco de 20 metroj kaj tuta vico da fortikaj konstruaĵoj. Tie ĉi estas la sidejo de la Tria Bataliono de la Sesa Ĉefforta Regimento de la Dua Divizio de la puparmeo. Iliaj defendaj fortoj inkluzivas, krom la ordinaraj rotoj, taĉmentojn kun 81-milimetraj bomboĵetiloj kaj 57-milimetraj senresaltaj kanonoj, subroton kun pezaj maŝinpafiloj kaj subroton de komunikado. Por plifortigi la defendon de la fortikaĵoj, la malamikoj postenigis ĉi tien taĉmenton provizitan per 155-milimetraj kanonoj por firmiti tiun ĉi lokon. Ĉar la tiea konstruaĵo estis fortika, kun altaj muroj, profundaj fosaĵoj kaj koncentrigitaj paffaĵoj en dispono, tiu ĉi fortikaĵo en Viet-an estis fanfarone nomata de la uson-pupa kliko kiel "Fera Muro" ĉe la norda bordo de la rivero Khoan-ha.

La Batalo en 12 minutoj La popola armita forto ekatakis je la 2-a horo kaj 20 minutoj matene de la 7-a de feb., la militan bazlokon en Vjet-an. Disvolvante sian tradicion "Nepre venku en ĉiu batalo", la Liberiga Armeo rapide rompis du altajn murojn, detruis plurajn dratbarilojn, transpasis la minoterenon, trafiktranĉeon kaj aliajn baraĵojn, en palpebruma daŭro, faris furiozajn atakojn kontraŭ la malamikoj per bajonetoj, maŝinpafiloj, grenadoj k. a. armiloj. En la sama tempo, la liberiga armeo alsturmis de ĉiuj flankoj kaj dispartigis la fortojn de la malamikoj, frakasis ilian komandan sistemon tiel rapide ke ekstermiĝis ĉiuj la malamikoj, kiam ili ankoraŭ ne povis kanoni, radiokomuniki kaj la komandantoj de la uson-pupa armeo ankoraŭ ne povis eĉ doni ordonon.

Ege rapide iris la batalo. Nur post 12-minuta batalo, la Liberiga Armeo jam tute regis la pozicion. Krom 34 malamikoj kiuj kapitulacis ĉeloke, ĉiuj aliaj gardantaj malamikoj estis ekstermitaj. Kaj ĉiuj armiloj de la malamikoj estis deprenitaj inkluzive de du 155-milimetraj kanonoj, du 81-milimetraj bomboĵetiloj, unu 57-milimetra senresalta

Nova Popolkanto:

VOJO DE PRINTEMP-HEROLDO

*Degelas jam la neĝo kaj l' glacitavoloj
en la rivero. Jen paŝsignaj floroj
de l' grupestrino esplorinta ĉe la bordo
elformis vojon de Printempheroldo.
Disfloras tuj paŝsignoj el ĉiu pordo.*

Trad. Laŭlum



kanono, 3 pezaj maŝinpafiloj kaj granda nombro da municio kaj aliaj militaj provizaĵoj.

Dum la Liberiga Armeo atakis la bazlokon en Vjet-an, la popolo de la du vilaĝoj Thang-dong kaj Binh-son apud ĝi kune leviĝis kaj detruis ses "Strategiajn Vilaĝetojn" starigitajn de la malamikoj.

Reatakanta uson-pupa trupo falis en embuskon Je la 10-a horo atm., la uson-pupa kliko kolektis du batalionojn kaj sub la ŝirmado de amfibiaj kirasaŭtoj de la tipo M-113, ekiris de Ŝang-Pinh-gubernio por repreni Vjet-an. Sed antaŭ ol iri longan distancon, tiu trupo jam falis en la embuskan zonon de la liberiga armeo. Ĉiuj sturmogrupanoj de la lasta, post furioza pafado, flugrapide elkuris kiel sagoj el la embuskejo, sin ĵetante al la malamikoj. La komandantoj de la lastaj estis terurigitaj kaj forkuris por sin savi, pli ol du cent malamikaj soldatoj estis mortigitaj aŭ vunditaj kaj unu subtaĉmento kun amfibiaj kirasaŭtoj de la tipo M-113 estis frakasita. La resta malamika soldataro ne sciis kion fari kaj rekuris haste al Tam-ki, urbeto 25 kilometrojn sudoriente de Thang-binh-gubernio.

La venko de la 7-a de feb. severe avertis la usonajn agresantojn: tuj forlasu Sudvjetnamion, alie vi ne forlasos ĝin vivaj.

La Voco de la Popolo de Suda Vjetnamio

Binh Thuan, ...: 1963

Jen estas letero de sudvjetnama popolano, ĉerpita el la libro *Leteroj el Sudvjetnamio eldonita de la Fremdlingva Eldonejo, Hanojo, Vjetnamio*. Kvankam ĝi temas pri aferoj antaŭ 1963, tamen el ĝi niaj legantoj povas informiĝi pri la vera stato de la nuntempa Sudvjetnamio.

La Red.

Karaj kamaradoj,

. . . Dum tiuj mallumaj jaroj, niaj Thuong-nacimalplimulto de la montara regiono de nia provinco ankaŭ multe suferis pro la kruelegaĵoj de la kliko Usono-Dziem. La malamikoj venis al ĉiuj vilaĝetoj kaj invadis ĉiujn domojn. Ili senkompate batis ĉiujn renkontitajn homojn, tute egale, ĉu ili estis maljunuloj aŭ junuloj, viroj aŭ virinoj. Sovaĝaj torturoj okazis surloke: oni elŝiris barbon kaj kapharojn al maljunulo, trenis lian korpon sur ŝtonetoj, kaj frotis liajn sangajn vundojn per salo kaj papriko, — kio bruldolorigis la baraktantan viktimon. Estis virino, kiun laŭvice seksatencis la brutuloj ĝuste antaŭ la okuloj de ŝia edzo. . . Malgraŭ ĉio, ĉiam aŭdiĝis unusola respondo “Mi ne vidas, mi ne konas la Vjet Kong-komunistojn!” Forte indignigitaj, multaj el la viktimoj, kiel Xang jam montris belan ekzemplon de malcedemo. Senĉese blasfemante kontraŭ la kliko Usono-Dziem, li mem tranĉis al si la ventron kaj eltiris ĝian internaĵon, kiun liĵetis al la malamikoj, kvazaŭ dirante al ili: “Mi ĝismorte konservas fidelecon al Onklo Ho!” Estis ankaŭ juna patrino, kiu suferplene forlasis sian karegan bebon por sin ĵeti en abismon, ĉar ŝi preferis morti, ol senhonorigi pro la seksatenco, fare de la usono-dziem-aj krueleguloj. . .

Ja, oni ne povas tutciti multe da aliaj dolorigaj scenoj!

Sed, nuntempe, dum ni skribas, antaŭ ni etendiĝas arakidkampoj kaj patatbedoj, kiuj verde kreskas post la hieraŭvespera freŝa pluvo. Iom malproksime, sur senkultura tereno, niaj partizanoj sin ekzercadas en pafado. Sidante en la ombro de grandaj arboj, la maljunuloj formtranĉas bambupikilojn por ripari la foskaptilojn en sia fortikigita vilaĝo. Ni ne povas kaŝi nian emocion antaŭ la sceno de niaj samlandanoj, kiuj pasiege fordoniĝas al sia laborado.

Ni ankoraŭ memoras, ke iun nokton, dum la pasintaj mallumaj jaroj, ni estis trapasantaj regionon streĉe kontrolitan de la malamikoj en Ham Thuan, kiam subite sur nin saltis de sur densa arbustotufo nigra homa ombro. Ni terurite kredis, ke ni estis enfalintaj en la manojn de l' malamikoj. Sed, tute ne! Antaŭ ni, staris nur maljuna kamparano. Li spiregis kaj, duonridante, duonplorante, diris: “Jen estas vi, miaj kunbatalantoj, kiujn mi senpacience atendis! Nur nun, mi povas renkonti vin!” Poste, la maljunulo milde admonis nin: “Eble vi kredis, ke la ĉitieaj loĝantoj estus

senescepte perfiduloj; tial, vi ne venis kaj jam de pluraj jaroj, vi komunikis al ni neniun novaĵon!” Verdire, tiutempe, la revolucio ankoraŭ renkontis multajn malfacilaĵojn. Pro tio, mankis al ni okazoj senpere renkontiĝi kun la loĝantoj. Plurfoje, kiam trapasante iun vilaĝeton, ni ekvidis movbrilan fajrolumon en kuirrejoj aŭ ekaŭdis balbutvoĉon de buboj, ni havis la ardan deziron halti momenton. Sed fine, ni devis silente preterpasi tiun lokon. Kaj hodiaŭ, ni jam povas, kun granda feliĉo, laŭtvoĉe deklami la konatan version “*En lumo taga ni iras*” . . . * Nur tiuj, kiuj jam plujare vivis en subteraj rifuĝejoj aŭ en mallumaj karceroj kaj, kiuj devas agadi dumnokte, povas funde kompreni la tutan signifon de tiu libera vivo dum sunplena tago. Nuntempe, en niaj vastaj liberigitaj regionoj, okupantaj la duonon de la provinca teritorio, la usono-dziem-a bandaĉo ne plu aŭdacas proksimiĝi al ni kaj libere agadi, kiel antaŭe. Kaj ĉiuvespere, antaŭ la sunsubiro, la marionetaj aŭtoritatuloj kaj spionoj jam haste forlasas siajn laborejojn por unu post alia sin enŝovi profunde en siajn zorge fortikigitajn postenojn. Tage, por iri pli malproksimen, ili devas marŝi pogrube, prove esplorante la teron ĉe ĉiu paŝo, ĉar ili povas fali en foskaptilojn.

La 30an de julio 1960, nokte, denove eksplodis la de longe ne aŭdita pafbruo de la justa batalo, ekskuegante la tutan arbaron de Tanh Linh, kie la malamiko malliberigis kaj torturis dekmilojn da Thuong-montaranoj en la t.n. “agrokulturaj kolonioj”. En la daŭro de dek minutoj estis likvidita la fortikaĵo Bak Ruong kun kelkaj rotoj da sekurecaj agentoj, milicanoj kaj “respublikaj junuloj”. Granda kvanto da armiloj kaj municioj, inter kiuj troviĝis 7 mitraloj kaj 10 mitraletoj falis en la manojn de niaj popolaj armitaj fortoj. Sed, la plej grava venko kuŝis en tio, ke jam sukcesis sin liberigi el la “agrokultura kolonio” Bak Ruong ĉirkaŭ kvinmil koncentritaj Thuong-montaranoj por reveni sian hejmvilaĝon. Tiumatene, kiam la batalantoj de la armitaj memdefendaj unuoj helpis niajn montaranojn fuĝi el tiu kamufilita malliberejo kun siaj mebloj, la malamikaj helptrupoj amase venis kaj tuj iniciatis severan persekutadon. La fuĝintoj troviĝis en vere kriza

*El la poemo “Antaŭen ni iras” de To Huu (P. 117, *To Huu, Elektitaj poemoj — Fremdlingva Eldonejo — Hanojo — Vjetnamio, 1964*)

situacio: malantaŭ ili, la postkuranta malamiko iom post iom proksimiĝis kaj antaŭ ili, profunda kaj rapidfluanta rivero baris la vojon. Sed, kun sia sindonema batalspirito kaj sia firma volo protekti siajn sampatrujanojn, niaj batalantoj unuflanke rezistis kontraŭ la malamikaj soldatoj por bremsi ilian antaŭeniron kaj, aliflanke, urĝege debakis arbojn kaj konstruis provizoran ponteton por helpi milojn da personoj ĝustatempe trapasi la riveron. Baldaŭ alvenis la malamikoj. Sed ili povis fari nenion alian, krom rigardi per koleraj okuloj al la transa riverbordo, ĉar la ponteto jam estis fordetruita!

Tiu sukcesplena malkaŝa armita lukto jam kontribuis al la antaŭenpuŝo de la komuna movado de nia provinco. Pli ol iam, ni kuraĝe kontraŭstaras al la malamikoj opiniante, ke de nun nin helpas “niaj soldatoj”. Ambaŭ vortoj “niaj soldatoj” entenas tiom da amo kaj koralligiteco!

Fakte, “niaj soldatoj” estas varmege akceptitaj ĉie, kie ili trapasas. La junuloj el ĉiuj vilaĝoj ekvojiras kun siaj pakajoj por sin varbi en la armeon. La armitaj fortoj senĉese kreskas kaj regule agadas ĉie en la provinco. Koncerne la embuskon kontraŭ militveturiloj kaj vagonaroj, nia provinco jam akiris multajn rimarkindajn sukcesojn. Ni seninterrompe agadas tiel, ke la usono-dziem-aj aŭtoritatuloj terurite devas ĉesigi ĉiujn noktajn trafikojn sur la vojo Sajgono-Nhatrang tra Muong Man. La malamikaj veturiloj estas arope detruitaj.

La gerilgrupo de T. estas ankaŭ tre lerta en siaj agadoj. Iun fojon, ĝi sukcesis renversi kvar usono-dziem-ajn militvagonarojn. Aparte en la militvagonaro detruita la 9an de junio 1962, mortis kaj vundiĝis pli ol cent malamikoj, inter kiuj troviĝis 7 Usonanoj.

Paralele kun la armitaj luktoj, ankaŭ forte disvolviĝas ĉie la politikaj luktoj sub diversaj formoj.

Ni ne povas ne citi, ĉi-tie, la heroajn agojn de niaj virinoj el B.L., kiuj kun infano sur la brako amase venis al malamikaj pafnestoj kaj staris antaŭ la kanonfaŭkoj por malpermesi al la malamikoj pafi kontraŭ iliaj vilaĝoj. La firmdecidaj agoj kaj la kortuŝa kaj persvada elokventeco de la virinoj devigis la diem-ajn soldatojn ĉesigi ĉian pafadon. Ni jam havis la okazon renkontiĝi kun tiuj bravulinoj kaj ilin demandis: “Ĉu vi ne timis, ke la malamiko povus sin montri ĉiam obstinega kaj senpripense pafi kontraŭ vi?” Ridante, ili respondis: “Tute egale, ĉu oni mortas aŭ vivas, kiam oni batalas. . .!”

Dum en la kamparo forte leviĝas la batalmovado, en la urboj kaj urbetoj, la loĝantoj ankaŭ “ekmoviĝas”. Ni povas diri, ke antaŭe, sub la peza jugo de la diem-aj reĝimo, en tiuj lokoj oni ne facile “levis sian kapon”. Sed, lastajn jarojn, la situacio jam ŝanĝiĝas. La diem-aj aŭtoritatuloj ne estas plu liberaj por koncentrigi kaj subpremi la loĝantaron. Ĉirkaŭ trimil lernantoj en Fan Tjet unuanime leviĝas kontraŭ la ordono de Ngo Dinh Dziem pri deviga uzado de la lerneja uniformo. La tuta lernantaro ne venas al la lernejo por protesti kontraŭ la decido devigi la lernantojn gardostari en multaj lokoj. Eĉ dum la lernohoro, ili senĉese direktas demandojn al siaj instruistoj, — kiuj estas nur maskitaj agentoj de Ngo Dinh Dziem kaj tiuj lastaj tute konfuziĝas ne sciante, kion respondi. En la laboristaj

kvartaloj, oni malkaŝe denuncas la krimojn de la diem-aj Administracio eĉ antaŭ ĝiaj lakeoj kaj spionoj. Inter la oficistaro, troviĝas ankaŭ homoj, kiuj protestas kontraŭ la deviga militekzercado aŭ partopreno en la aranĝo de defendpozicioj. Oni publike interŝanĝas opiniojn pri la sciencaj kaj teknikaj atingajoj de la komunisma tendaro aŭ komunikas unu al alia novaĵojn pri la militaj malvenkoj de Usono-Dziem.

Ni ofte renkontas fraŭlinojn, kiuj ĵus forlasis sian urbon por veni al la gerilbazo. Ŝultre portante siajn pakajojn, ili vigle surgrimpas la montodeklivon. Kvankam ilia vizaĝo ruĝiĝas pro varma suno, tamen sur ilia buŝo ĉiam aperas ĉarma rideto. “Ĉi-tie, — ili diras, — ni povos elteni ĉian ajn mizeron; sed, kunvivi kun tiu kanajlaro estas tute neeble!”

Ekde la mezo de 1961 ĝis nun, la batalmovado en nia provinco ĝenerale pli progresas, ol antaŭe.

Sendube, vi volas informiĝi pri nia gerilbazo, ĉu ne? Tiu famkonata regiono, tiel kara al ni dum tiom da jaroj de Rezistado, nun apartenas al ni. Unu post alia, ĉiuj malamikaj postenoj estas fordetruitaj. Tie, flirtas nun la standardo de la Fronto. Prove imagu al vi la vilaĝeton G.T., kiu antaŭe senkreskaĵa, estas nun plenkovrita per freŝaj ombroj de verdaj kokosarboj, kreskantaj laŭlonge de irigaciaj kanaloj. La tagon, kiam vi forveturis Norden, tiuj kokosarboj estis nur arbidoj kun junmolaj burĝonoj; sed nun, ili jam plenkreskas kaj la batalantoj de la Liberiga Armeo plezure elektas tiun lokon, kiel haltejon por sin sensoifigi. Ĉi-tie, la patrinoj de la eksrezistantoj ankoraŭ bone fartas; ili senpacience atendas la tagon de l' reunuiĝo por renkontiĝi kun siaj karuloj.

Tage, ni pene laboras, sed nokte nin distras artaj prezentadoj, komedioj, lumbildoj... Okazas, ke dum iaj noktoj, la programeroj estas tiel allogaj, ke spektantoj samkiel aktoroj ne volas disiĝi, kvankam jam sonas la unua aŭ dua horo de la mateno.

La loĝantaro sin montras pli kaj pli vigla en la defenda organizo, fosante pliajn tranĉejojn, starigante barikadojn, kaj plifirmigante siajn fortikigitajn vilaĝojn. Kiam okazas disraba operacio, la maljunuloj kaj la infanoj estas tuj kondukita al sekuraj lokoj, dum la gejunuloj embuske posteniĝas en ĉiuj anguloj. Kaj la malamiko postlasas ĉiufoje multajn kadavrojn. Iufoje, bandaĉo da usonaj militkonsilantoj singardeme proksimiĝis al nia regiono. Ni tuj fervore ilin “akceptis” kaj sukcesis “inviti” al ni unu “sinjoron”! Okaze, ni rakontas al vi la historion de tiu usona militkaptito:

Li venis de Kalifornio kaj elŝipiĝis en Sajgono, februare 1962. Kvin monatojn poste, li estis kaptita de niaj soldatoj. La animstato de Rock Matagulay, tiel nomiĝas la militkaptito, similis al tiu de la francaj koloniistoj en la pasinta tempo. Li kvazaŭ frenezigiĝis kiam li falis en la manojn de l' Liberiga Armeo. Sed, oni ne “tratanĉis al li la gorĝon kaj la ventron”, kiel estis minace dirinta al li la usona stabo. Niaj loĝantoj kaj batalantoj tamen sin montras humanaj kaj ĉiam strikte observas la politikon de la Nacia Fronto de Liberigo koncerne la militkaptitojn, kvankam ili altgrade malamegas la usonan imperiismon. Matagulay mem rakontas, ke survoje al la koncentrejo, li foje haltis ĉe iu kamparano. Li renkontis tie maljunulinon, kies do-

mo kaj havaĵoj estis fordetrinitaj kaj forrabitaj de la usono-dziem-aj soldatoj. Komence, ŝi ne povis kaŝi sian malamegon kontraŭ la militkaptito; sed, post klarigoj de la aktivuloj de la Fronto, ŝi memvole donis al Matagulay unu rostitan maizon. Evidentiĝas, ke unu rostita maizo havus nenian signifon por Usonano, sed ĝi jam profunde emociis lin. La pardonemo, kiun la popolo kaj la revolucio rezervis al li superis ĉiujn imagaĵojn. Kontraŭ li, okazis neniu revenĝa ago. Post kelka tempo, kompreniginte al si la justecon de la revolucio, Matagulay sin montris tre pentema. Kiel vi scias, antaŭ sia liberigo, li jam eldiris jene siajn opiniojn: “Mi jam rekonas, ke la lukto de la sudvjetnama popolo ne estas verko de tiu grupo da Vjet Kong-komunistoj, kiuj kaŝe agadas en foraj makisoj, — kiel asertas la usonaj regantoj! Male, ĝi estas lukto vaste organizata, animata de multnombraj kaj potencaj fortoj kaj ampleksanta ĉiujn popoltavolojn.”

Ni plurfoje ricevis poemojn senditajn el regionoj kontrolataj de l' malamiko. Parto el tiuj verkoj senvaligas la indignon de la loĝantoj de “strategiaj vilaĝetoj”:

*En malluma “strategia vilaĝeto” la malamikoj
nin koncentrigas,*

Kiom multe ni suferas!

Ne! Ne! — Ni diras al ili: Ne!

Ĝian ĉirkaŭbarilon fordetrui

kaj ĝin forbruligu!

Jaro jaron sekvas, kaj neniam ĉesiĝas nia lukto. Kvankam jam longdaŭras la batalo kontraŭ Usono-

Dziem, tamen ni ĉiam trovas, ke mankas al ni la tempo!

Ĉiufoje kiam ni skribas al vi, ni ne forgesas niajn sampatrujanojn de Tuyen Kuang, kiu provinco jam interfratiĝas kun nia Binh Thuan. Malgraŭ longa distanco, ni konstante premsekvadas la novaĵojn pri la socialisma konstruado en la libera Nordo de nia patrolando, kaj precipe ni tute entuziasmiĝas pro la senĉesa kreskado de Tuyen Kuang. Kvankam ni ankoraŭ ne detale konas tiun provincon, tamen jam delonge al ni estas tre familiaraj la historiaj nomoj: “la Tegmento de la Komunuma Domo Hong Thai, la Banjararbo Tan Trao, la Venko de Lo-Rivero”. Ni deziras, ke iun tagon, kiam la lando estos reunuigita, nia peklakvo kaj niaj sekigitaj engraŭloj de Fan Tjet povos kontraŭfluen veturi sur la Lo-Rivero ĝis Tuyen Kuang.

Permesu, ke ni haltu ĉi-tie; la letero estas jam sufiĉe onga, kaj ni devas ankoraŭ nin pretigi por solena akcepto de novaj rekrutoj el diversaj distriktoj kaj urboj. Oni povas diri, ke paralele kun la “venkosezono” venas la “varbado-sezono”. Preskaŭ ĉiuj rekrutoj apartenas al tiu generacio de junuloj, kiuj estis ankoraŭ tre naivaj en la tempo de la Militrezistado. Tamen baldaŭ ili fariĝos bravaj batalantoj, tute pretaj foroferi sian vivon por la Patrujo.

Tiel, neniam elĉerpiĝos tiu fonto de vivecaj fortoj, tiom pli, ĉar la Revolucio konstante sin provizas per novaj, junaj kaj decidemaj rekrutoj!

Kore via
NGUYEN MINH

Fablo

FIERA RANO

Antaŭ multaj multaj jaroj ĉe Duolang-lago loĝis du ranoj, kiuj estis patro kaj filo. Nenien ili iris krom la ĉirkaŭan bordon kaj vivis tre kontentaj rigardante la lagon kiel la tutan mondon.

Iutage, profitante endormiĝon de sia patro, la raneto elŝteliĝis kaj alvenis en malproksiman rizkampon. Ĝi saltis jen tien jen ĉi tien, plezuriĝis de la interesaj vidaĵoj kaj ekkantetis pretervole: “kvak, kvak, kvak!”

Dum ĝi raviĝis en gaja kantado, subite granda bubalo pasis preter ĝi trenante plugilon. La raneto neniam vidis bubalon kaj mirigite rigardis ĝin per la rondigitaj okuloj— “Vere senkompara giganto! Ho, liaj kvar gamboj simple estas kvar kolonoj! Ĉu lia korpo ne similas al la monteto en Duolang-lago?...” Kiam la raneto ekstazis, subite ekmuĝis la bubalo. La bleko pres-

kaŭ ĝin surdigis. Ĝi ne kuraĝis daŭrigi la esploron kaj haste saltis returnen al la hejmo. La ranopatro estis en kolero pro la malapero de sia filo. Vidinte la raneton li demandis severe:

“Kien vi iris? Kial vi longe forestis?”

“Paĉjo, mi iom ludis en rizkampon.”

“Kio interesa tie povas esti!” diris la patrorano dignoplene.

“Ho, paĉjo, tie mi vidis tre tre grandan estaĵon, tia giganto neniam estis ĉe nia lago.”

“Kia babilo mistera!”, diris la rano indiferente. “Kio do ĝi estas? Kiom granda ĝi estas efektive?”

“Ho, grandega! terure grandega!”

“Nu, nu! Vi parolis longe, sed eĉ ne klarigis ĝian grandecon — vidu, ĉu ĝi povas kompari kun paĉjo?” dirante li enspiregis aeron kaj pufigis la ventron.

“Multe pli granda!” la raneto diris kapskuante.

La rano refoje enspiregis.

“Ne, ankoraŭ pli granda.”

La rano denove faris du enspire-

gojn kaj demandis: “Ĉu tiom granda?”

“Tiom granda,” diris la raneto mansignante, “tiom granda! Paĉjo, multe malpli granda vi ankoraŭ estas!”

La rano forte enspiregis aeron. Ĉifoje li ne plu povis paroli timante ellasi aeron dum malfermo de la buŝo, kaj mangeste demandis al la filo: “Ĉu tiom granda?”

Vidinte la geston de sia patro, la raneto faris pli grandan geston. La patro ankoraŭ ne volis konfesi sian malgrandecon, enspiregis aeron per sia tuta forto kaj intencis pufigi sian ventron tiom granda kiom la dirita estaĵo. Li faris enspiregon post enspirego. “Pum!” kreviĝis lia ventro.






En la unuaj du monatoj la sportistoj de Ĉinio jam renovigis 36 landajn kaj 1 mondan rekordojn.

La rekordorompado komenciĝis en naĝado. Ekde la novjartago ĝis la fino de feb. de la nuna jaro, en la ses konkursoj sin trovis 21 personoj kiuj kvardek-foje rompis la landajn rekordojn de dek ses sportoj, t. e., pli ol duono de la 21 landaj rekordo en la vira kaj virina naĝadoj estis jam renovigitaj.

Ankaŭ en aliaj sportoj aperis multe da novaj rekordo. En la pezlevaj turniroj okazintaj en Kantono kaj Pekino 11 personoj deknau-foje renovigis 13 landajn rekordojn, kaj interalie monda rekordo de 118-kilogramoj de bantam-pezlevo de la dumana puŝlevo estas kreita de pezlevisto Ĉen Manlin.


Novaj rekordo kreiĝis ankaŭ en la virinaj sportoj de 800-metra vetkurado, 3 specoj en rapida glitkurado, 2 specoj en radiograma sendado kaj ricevado kaj en konkurso de aviadilo-modeloj.




Ĉen Manlin, bantam-pezlevisto el Guangdong-provinco rompis la mondan rekordon de 117.5 kg. de puŝlevo per 118 kg. en la pezleva konkurso okazinta la 27-an de feb., en la Pekina Sporthalo.



Li Lifan, 15-jara naĝistino rompis la landan rekordon en virina papilia 100-metra naĝado dum la konkurso okazinta la 1-an de feb., en la Pekina Sporthalo.



Ŝa Liugang, Fu Dajin, Li Ŝiguang kaj Ĝou Tongven (de maldekstre) rompis la landan rekordon en la vira liberstila stafeta naĝado.



Ĉina Tablotenisa Teamo por la 28-a Monda Turniro de Tablotenisa Ĉampioneco.



VEJĈIO

III. PRAKTIKA VEJĈILUDO

(*Daŭrigo*)

3. Dua Periodo de la Ludo

Kiam la du flankoj de vejĉi-ludo jam dividis la strategiajn punktojn ĉe la anguloj kaj flankoj, la batalo disvolviĝas neeviteble al la mezo de la vejĉi-tabulo. Tiam komenciĝas la plej grandskala batalado, kiu decidos kiu flanko gajnos la ludon.

Estas du principoj por batalo de tiu ĉi periodo.

1) **Interligi la fortojn de sia flanko** por ke ili formu potenciajn fortojn reciproke subtenantajn.

a. Por tio la vejĉi-ludanto devas elekti bonajn interligajn punktojn inter la ankoraŭ ne sekurigitaj unuaj ŝtonoj.

b. Al la jam sekurigitaj bazoj oni ne aldonu proksime superflujajn ŝtonojn. Kontraŭe oni devas tien peli la ŝtonojn de la kontraŭa flanko, ke ili estu persekutataj ambaŭflanke de niaj ŝtonoj. Vidu Diag. 47. Tie la nigra grupo ĉe la supra maldekstra angulo estas jam sekurigita minacante la blankan ŝtonon Ĉ 17. Tial ne estas necese por la nigra flanko meti superflue ŝtonojn inter D 17 kaj H 17. Sed ĝi devas peli la blankajn al tiu ĉi parto per ŝtonmeto dekstre de H 17. Cetere tio fortikigos ĝian dekstran angulon.

c. Se iu ŝtono estas izolita inter fortaj malamikaj grupoj, oni nenial devas klopodi ĝin elkonduki el la en-

fermiteco. Ĉar la sukceso estas dubinda, kaj eĉ se sukcesos tia klopodo, oni ne povos turni per tio la malfavoran situacion.

ĉ. Plej ideale estas interligi siajn grupojn kaj malfortigi la malamikajn samtempe per la ŝtonmetoj.

2) **Enpenetri en la influferon de la kontraŭa flanko kaj ĝin detrui.** Por efektiviĝi tiun ĉi principon oni devas atenti la jenajn kondiĉojn:

a. La enpenetro aŭ atako al la kontraŭa flanko devas esti farata nur kiam oni estas certa, ke tio alportos al li nur utilon sed nenian malutilon.


b. Se iu flanko havas mem malfortan punkton, ĝi devas fari tie necesan aranĝon antaŭ ol komenci atakon kontraŭ la malamiko, kaj neniel devas zorgi nur persekutadon ignorante eventualan malfortaĵon de sia flanko.

c. Kelkfoje ĉirkaŭatako estas pli preferinda ol rekta atakado. Vidu la Diag. 48 kaj 49.


En Diag. 48 la sorto de la supra blanka grupo estas ankoraŭ ne decidita. La nigra penis ĝin enfermi per 1. Ĥ 11, tiam sekvis 2. I 12, 3. Ĵ 12, 4. I 11 kaj la nigra malsukcesis.

Sed se la nigra flanko ĝin ĉirkaŭatakas kiel montrita en Diag. 49, la supra blanka grupo trovas jam nenian elirejon.


Diag. 47



Diag. 48



Diag. 49



EDUKO DE ETULOJ

KIAM mi vivis en Aŭstralio mi parolis kun multaj patrinoj pri eduko de iliaj infanoj. Mi trovis, ke preskaŭ senescepte ili estas malkontentaj. Estante instruistino, mi mem komprenas, ke pri tio kulpas nek la gepatroj nek la instruistoj.

Lastjare mi vizitis la homplenan Kantonon de Ĉinio. Kun mi estis bonega, juna interpretisto, diplomito de universitato. Li demandis kien mi ŝatus iri kaj mi sugestis viziton al lernejo, kaj tiel mi pasigis tutan tagon en unu elementa lernejo. Kompreneble oni ne atendis min, kaj ne havis tempon prepari por mia vizito.

La vetero estis varmega kaj glua. Sed tuj kiam mi enpaŝis en la lernejon mi sentis feliĉon, trankvilon kaj senzorgecon. Pro la kvieta, dolĉa kapablo de mia interpretisto mi povis paroli longe kun la funkciuloj kaj eltrovi de kie venis tiu ĉi trankvila konduto de la lernejoj en tiaj malfacilaj kondiĉoj. La respondo certe interesos patrinojn en aliaj landoj.

556 geknaboj estas en la lernejo en 14 klasoj. Por ili laboras 27 instruistoj kaj du estroj! Du trionoj el la instruistoj estas virinoj.

La infanoj vizitas la elementajn lernejojn ekde sia 7-jara aĝo, kaj iras al liceo je la 13-jara. Infanvartejoj akceptas ordinare infanojn super la aĝo de 3 jaroj. Kaj se la patrinoj deziras, ili povas sendi siajn infanetojn tiel junajn kiel 56-tagajn. Geknaboj de 3- ĝis 6-jaraj ĉeestadas infan-lernejon, de 13- ĝis 19-jaraj — liceon, kaj poste universitaton. Tiuj kiuj ne kvalifikiĝas por liceo pro certaj kialoj (ekz-e manko de kapablo, malsano ktp.) iras en vesperajn lernejojn kaj dum la tago instruistoj donas al ili specialajn lecionojn en iliaj hejmoj. Je la 16-jara aĝo ili estas permesataj labori, ordinare fariĝi metilernantoj.

Instruistoj de elementaj lernejoj ricevas tri-jaran preparadon post trijara lernado en mez-lernejo, kaj tiuj de liceoj — kvar-jaran post sesjara lernado en mez-lernejo. Estas la devo de veteranaj instruistoj instrui kaj helpi junajn instruistojn, kiam ili komencas labori. Respekto al maljunaj instruistoj estas instruata kiel parto de ilia preparado.

La lernejoj surprizus niajn instruistojn antaŭ ol ili ekzamenus ilin detale. La geknaboj alvenas lernejon je 7.40 matene kaj iras hejmen por

tagmanĝo je 11.50. Ili revenas je 2.30 posttagmeze. La pli junaj iras hejmen je 4.30 kaj la aliaj je 5.30. Kompreneble ĉi tio taŭgas al la varma klimato, kie tagmeza laboro ne estas prudenta. Instruistoj donas po proksimume 22 lecionojn semajne. Sed ili ne ĉiam laboras en la klasĉambro de 7.40 ĝis 5.30 posttagmeze! Ili ĉiuj donas iom da tempo al plua studo kaj ĉeestadas studrondojn pri internaciaj aferoj.

Ili emfazis la fakton ke ili havas tre kontentigajn labor-kondiĉojn. Se ili mem havas infanojn, ĉi tiuj iras en infanvartejon tute proksiman al iliaj hejmoj. Ili ricevas senpagan medicinan zorgon kaj ankaŭ la salajron, kiam ili malsanas. Ankaŭ iliaj familianoj ĝuas favoran medicinan zorgon. Ili insistis ke nenio ilin ĝenas. “Do,” diris la estro, “ili iĝas bonaj instruistoj kaj la infanoj profitas.”

La infano ĉiam komencas tage per mallonga legleciono kaj poste korpekzercas ekstere. Ili tion faras post ĉiuj du lecionoj. Tio donas al la moviĝemaj etuloj okazon sin liberigi de la streĉa atento. Tiom da atento estas donata al la “lerna kutimo” de la infanoj, ke ili ŝajnas neniam ribeli kontraŭ la hejmaj ekzercoj. Ĉiuj geknaboj lernas la latinigan skribon. Mi ĉeestis la lernadon de la 2-a klaso. La sonoj estis skribataj en latinaj literoj kaj en ĉinaj ideografiaĵoj.

Ĉiu infano estas instruata naĝi kaj la elstaraj naĝantoj ĝuas ŝancon sin prepari kiel naciaj sportistoj.

Sed ĉi tiuj infanoj ne tuttage sin okupas pri lecionoj. Grupoj formiĝas ekster la lecionaj horoj. Ili povas studi muzikon, dancon, brodarton, faradon de radioriceviloj, parolarton ktp. Estas violona klaso en kiu muzikaj instrumentoj kaj folioj estas provizataj. Al ili estas instruataj ankaŭ dommastrumado, kudrado, kaj tiel nomataj de ili “publikaj laboroj”. Mi demandis, “Kion tio signifas?” kaj mi ricevis respondon en iliaj agadoj.

Meze de la strato estas ĝardeno kreita dum la Opia Milito (1840-1842 p. K.). Dum la japana okupado, ĉinoj ne estis permesataj eniri ĝin. Nun la infanoj estas instruataj akvumi tie la florojn kaj prizorgi la ĝardenon. Ili lernas kiel teni purecon de la stratoj, kaj neniam forĵeti tien paperon aŭ aliajn malpuraĵojn. Ĉar tio estas kontraŭ socia moralo.

Afero kiu miregigis min estis tio ke dum la lecionoj de produkta laboro ili fabrikas kretojn kiujn la instruistoj uzas en la klasĉambro.

Ankaŭ la 4-a kaj 5-a klasoj havas sian amuzon: Du fojojn ĉiusemajne ili fabrikas desegno-najletojn en malnova dometo kontraŭ la lernejo. Ili ricevis forjetitajn pecojn de ferlado de la fabriko de enladigitaĵoj, kaj estas instruataj kiel funkciigi la diversajn stampajn maŝinojn kaj la poluran cilindron. Nu, tio estas bona ŝanĝo de aritmetiko kaj gramatiko, ĉu ne? Ili vendas la najletojn kaj konservas la monon por kolektivaj elspezoj.

Estis du montroŝrankoj ĉe la akcepta ĉambro. Unu tenis ekzemplojn de verkoj faritaj en la ŝat-okupa klaso. Tie estis brodaĵoj, kretoj, lignaj skulptaĵoj kaj dentbrosoj faritaj de la infanoj! La lignaj skulptaĵoj estis figuroj de marionetoj. Unu grupo elmontras marionetojn kiel ilian ŝatokupon. La alia montroŝranko tenis donacojn kaj leterojn el fremdaj landoj. Malgraŭ lingvaj malfacilaĵoj ili

penas formi amikecajn grupojn kun fremdlandanoj kaj interŝanĝas donacojn kun infanoj de aliaj landoj. Estis leteroj kaj kartoj kaj donacoj el Sovetunio kaj aliaj eŭropaj landoj. La lernejo estas fermita dimanĉe kaj sabate posttagmeze. Ili havas tiel interesan lernoprogramon ke ili bezonas ĉiun horon kiun ili povas trovi.

Fine mi alvenis al tio, kio laŭ ilia diro estas la plej grava parto de ilia eduko: la moralaj lecionoj. Dum ĉi tiuj lecionoj la geknaboj estas instruataj ami kaj kompreni siajn kunulojn, ami pacon, respekti laboron kaj honori sciencon.

Mi vidis la infanojn dum lecionoj kaj inter lernhoroj kiam ili estis amasmovantaj en la koridoro. Neniam mi vidis malicetan ludadon, malĝentilecon aŭ interpuŝiĝon inter ili. Ili nek estis aŭtomate en rektaj linioj kiel en milita ekzercado.

Patrinoj kiuj estas malkontentaj pri la eduko de siaj infanoj devus interbabili kun ĉi tiuj ĉinaj patrinoj. Multon ili povu lerni.

KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ



DU PRECIZAJ INSTRUMENTOJ SUKCESE PROV-FABRIKITAJ DE ĈINIO

Du precizaj instrumentoj estas sukcese provfaritaj en Ĉinio tute per enlande produktitaj materialoj:

1) Moderna altefika analizilo uzata por analizi la konsistigajn elementojn kaj iliajn kvantojn de ĉia organika komponaĵo — kapilara kromatografia instrumento. Ĝi povas elanalizi la elementojn kaj iliajn kvantojn de dek specoj da organikaj komponaĵoj, kiuj povas fariĝi gaso sub 300° C.

2) Aparato por aŭtomata desegno de elektronaj trakoj — preciza ilo uzata por studi kaj projekti elektronajn aparatojn. Ĝi kapablas desegni la trakojn de elektrona moviĝo en ĉia elektrostatika kampo pere de la aŭtomata kontrolo sistema de la instrumento, ebligante ke oni trovu la plej favorajn kondiĉojn en projektado de diversaj elektronaj aparatoj.



3.8-OBLE PLIIĜIS LA KURACEJOJ EN TIBETO

Antaŭ la Liberiĝo, en Tibeto sin trovis nur unu kuracejo kiu dungis pli ol dek tibetajn kuracistojn, kaj alttarife pagigis la malsanulojn. Ĝenerale la laboranta popolo tute ne povis ricevi kuracon de ĝi. Post la demokratia reformo en 1959, pli kaj pli boniĝis la kondiĉoj de kuracado kaj higieno ĉe la laboruloj. Laŭ statistiko, nun en 70 gubernioj de Tibeto troviĝas jam kuracaj centroj kaj krome, establiĝis 13 kompare grandaj sintezaj popolaj hospitaloj kun moderna ekipaĵaro. En diversaj gubernioj kaj vilaĝoj estas ankaŭ preskaŭ cent sanigejoj kaj kuracejoj por senpaga servado al la tibeta popolo. En 1964, la kuracejoj en la tuta regiono 3.8-oble pliiĝis, malsanulaj litoj 2.5-oble pliiĝis kaj la kuracaj laborantoj 2.2-oble pliiĝis kompare kun tiuj en 1959.

DU KOMETOJ MALKOVRIATAJ

La Zigin-monta Observatorio de la Ĉina Akademio de Sciencoj malkovris en jan., nunjare du kometojn.

En la vespero de la Novjara Tago de 1965, la observatorio malkovris

kometon kun ĉ. 15-grada heleco en la konstelacio Ĝemelo. Ĝia ekzisto estas denove konfirmita per observado en la vespero de la 5-a de jan. Kaj en la vespero de la 11-a de jan. la observatorio plie malkovris en la konstelacio Kankro kometon kun ĉ. 15-grada heleco, oni povas vidi neklare ĝian voston sur la farita fotonegativo.

RAPORTA KUNVENO DE FIZIKOKULTURA SCIENCO

Ekde la 23-a de nov., ĝis la 1-a de dec., 1964, en Ĉinio okazis la unuafoja Tutlanda Raportokunveno de Fizikokultura Scienco. Dum la kunveno la reprezentantoj de pli ol 80 organizoj el 23 provincoj, aŭtonomaj regionoj, urbegoj rekte sub la centra registaro kaj la Popola Libera Armeo elmetis pli ol 300 disertaĵojn kiuj traktas per riĉaj materialoj pri iliaj studatingoj en la kampoj de sporta trejnado, instrumentado pri fizika kulturo, sporta fiziologio, sporta terapio k. c. La ĉinaj laborantoj de fizikokultura scienco sin okupas pri scienca esplorado laŭ praktikaj bezonoj por servado al socialismo kaj praktikado en sporto kaj fizika kulturo. Iliaj disertaĵoj elmetis multe da valoraj atingajoj en esplorado kaj estas tre utilaj por referenco en elektado, akcelado kaj rapida lertigo de la sportistoj.

Vortoj signitaj per "*" estas klarigitaj en "Nia Vortareto"

Nofhan: Letero al Malproksimaj Amikoj (VII)

ĈU UNUE ANTIKVA?

Karaj geamikoj,

Vi iam diris, ke vin tre interesas la antikva civilizacio de Ĉinio kaj ke vi volas pli detale informiĝi pri ĝi. Tiu vian deziron mi parte pravigas kaj parte ne.

Jes, Ĉinio havas kvarmiljaran civilizacion. Ĝi multe kontribuis al la monda kulturo kaj postlasis grandan influon ankaŭ al aliaj landoj. Se oni volas kompreni Ĉinion, oni neniel devas malatenti tiun ĉi flankon. Do, via deziro estas pravigebla.

Tamen mi devas akcenti, ke tio ne estas la ĉefa punkto por kompreni Ĉinion. "Antikva" ja signifas "estinta". En nia lando, la estanto multe diferencas de la estinto, kvankam nia popolo heredis ĉion bonan kaj utilan de la historio.

Eble vi scias, ke la evoluo de la ĉina socio longe restadis en la feŭda stadio. Tial la t. n. antikva civilizacio spegulas esence nur la feŭdan socion de Ĉinio.

Sed en lasta jarcento, granda ŝanĝo okazis en la ĉina historio. La feŭda socio estas rompita de imperiisma invado.* Anstataŭ kapitalisma socio, Ĉinio fariĝis socio duonkolonia* kaj duonfeŭda. La ĉina popolo estis sub-premata kaj ekspluatata de imperiismo, feŭdismo kaj burokrata kapitalismo.*

Nur dank' al gvidado de la Komunista Partio de Ĉinio la ĉina

popolo fine sukcesis for-skui la pezajn ŝarĝojn* kaj komencis konstrui tute novan socion, la socialisman socion. Jen estas la tasko de la nuna ĉina popolo. Sen tuŝo de tiu ĉi tasko oni vane klopodas koni Ĉinion.

Ĉu la ĉina popolo heredis la antikvan civilizacion de Ĉinio? Kompreneble jes, kaj laŭeble ni heredis ĉion kio povas servi al la socialisma konstruado kaj utilas al la socialisma kulturo.

Tial estas nepre necese por amikoj de Ĉinio kompreni unue la nunan Ĉinion kaj nur poste ĝian antikvan civilizacion.

S-ro Lusin, la fondinto de la moderna ĉina literaturo, iam diris, ke la vivantoj neniel devas esti retenataj de mortintoj. Tiu ĉi principo validas ankaŭ por komprenado pri Ĉinio.

Rakontoj pri Afanti

ANTAŬ LA MOND-FINO

Kelkaj islamaj* pastroj volis superuzi Afanti por manĝi liajn ŝafojn. Ili do lin vizitis kaj kriis:

"Ho ve, venos morgaŭ la mond-fino! Nu, por kio utilis ankoraŭ viaj ŝafoj? Ni manĝu ilin!" Kaj ili mortigis ĉiujn liajn ŝafojn.

"Prave, prave!" konsentis Afanti. "Mi kuiru la ŝafajon, kaj vi ĉiuj de-metu viajn sur-tutojn kaj en-iru en la ĝardenon mal-antaŭ la domo por ripozeto!"

Kiam la pastroj en-iris la ĝardenon post-lasinte la sur-tutojn ĉe li, li tuj kaŝis la ŝafajon kaj bruligis ĉiujn iliajn sur-tutojn. Kiam la pastroj revenis, tie restis nur cindroj.

"Kie estas niaj sur-tutoj, Afanti?" kriis la pastroj.



"Viaj pastraj moŝtoj," diris Afanti mal-rapide, "venos ja morgaŭ la mond-fino. Por kio ankoraŭ utilis viaj sur-tutoj?"

Nia Vortareto

Burokrata kapitalismo — Ŝtata monopola kapitalismo dis-volviĝinta per kruela ekspluatado al la popolo fare de la kontraŭ-revolucia reg-ant-aro kiu dependas de eksterlanda imperi-ismo kaj lig-iĝas kun en-landaj feŭd-fortoj.

Invadi — Per-forte en-iri kaj ek-okupi fremdan landon.

Islamo — Religio iniciatita de Mahometo.

Kolonio — Lando regata kaj ekspluatata de fremda lando.

Ŝarĝo — Peza port-at-aĵo.

Kuriozaĵo:

ROKO-ABELOJ

Jan Inkang

En Junnan-provinco de sudokcidenta Ĉinio troviĝas Ajlaŭ-monto. Densaj arbaroj kreskas sur ĝi kaj altegaj estas ĝiaj krutaj rokmuroj.

Sur la rokmuroj sin trovas centoj da abelujoj loĝataj de roko-abeloj. La roko-abeloj vivas sur la rokmuroj de la monto kaj plenpene konstruas por si abelujojn kaj produktas multon da mielo. Sed antaŭ ol forkonsumo de la preparita mielo ili jam devas transloĝiĝi al aliaj lokoj. Tiuj ĉi roko-abeloj povas produkti ĉirkaŭ kvindek kilogramojn da mielo antaŭ sia ĉiufoja transloĝiĝo. Laŭ aserto de indiĝenoj, iuj el la abelujoj estas tiel grandaj kiel muro kaj el ĉiu el ili oni povas kolekti 50-100 kilogramojn da vakso. Iuj abelujoj estas tiel mielriĉaj, ke, kiam oni enpikas ĝin per bastoneto, mielo tuj elversigas abunde. La roko-abeloj formigras vintre kaj revenas printempe en ĉiu jaro, kaj ili estas fidelaj vizitantoj al la monto sen ajna prokrasto.

VIGLA AGADO EN LOVEĈ, BULGARIO

En bulgara urbo Loveĉ troviĝas esperantista societo "Espero", kiu havas 80 membrojn. Post la 36-a Kongreso de bulgaraj esperantistoj, la membroj de tiu societo ekagadis pli vigle kaj rikoltis kontentigan sukceson.

Per komunaj ekskursoj, publika kunveno kaj impona manifestacio la societo estis pli kaj pli konata de la neesperantistaj rondoj. La plej granda sukceso estis la organizado de esperantaj kursoj en pluraj lokoj. Nun estas entute kvin kursoj por komencantoj kaj unu por progresintoj. Rezulte de tio, la societo sukcesis varbi pli ol 100 novajn adeptojn de Esperanto.

Krome la sekretario de la societo ankaŭ multe laboris por disvastigi esperantajn gazetojn.

(Laŭ I. I.)

PROGRESO EN HUNGARIO

La interesiĝo pri Esperanto en Hungario pli grandiĝis en lastaj jaroj. Tion pruvas la rapida elĉerpiĝo de la esperantaj lernolibroj. Ekzemple la lernolibro de Baghy eldoniĝis jam 20,000 ekzemplerojn en kvar eldonoj. Sed la lastjara eldono estas jam netrovebla.

Laŭ raporto de la Instrua Komitato de HEA oni registris en lastaj tri jaroj 3,234 novajn kursanojn de Esperanto kaj kun ĉiam pli granda progreso.

En iuj universitatoj oni aranĝis superajn E-kursojn. En la hungarlingva "Jarlibro por Knaboj 1965" kaj similaj libroj troviĝis propagandaj artikoloj pri Esperanto.

(Laŭ S-ano Balkanyi)

ESPERANTAJ EKSPOZICIE- TOJ EN HUNGARA FERVOJA STACIO

La hungara fervojista grupo en la urbo Békéscsaba faris bonan propagandon por Esperanto en la

stacidomo de la urbo. Ĝi utiligis vitrinon ĉe la stacidomo por aranĝi ekspozicieton de Esperanto, kaj poste ankaŭ novan ŝrankon por tiu celo. En ili la grupo ekspoziciis valorajn esperantajn librojn, afiŝojn kaj ankaŭ hungarlingvan propagandilon. Aldone al tio la grupo metis ĉe la ekspoziciejoj leterkeston por rekte kontakti kun interesiĝantoj de Esp-o. Tio rikoltis konsiderindan sukceson inter la pasaĝeroj elvagoniĝintaj ĉe tiu stacio.

ESP-O EN JUNULARKONFE- RENCO

La Internacia Junularcentro en Amsterdam de Nederlando ĉiujare organizas konferencon, kaj ĝis nun ĝia konferenca lingvo estas la angla. Sed en la kuranta jaro, ankaŭ Esperanto estas allasita kiel konferenca lingvo. Ĝi okazos de la 25-a ĝis la 31-a de julio. Detalan informon oni petu de "ANNE FRANK-DOMO, Prinsengracht 263, Amsterdam-C., Nederlando".

TERMINARO POR KOMERCO KAJ INDUSTRIO

Instituto por Esperanto en Komercio kaj Industrio (EKI) estas organizo celanta zorgi la disvastigon de Esperanto en Komercio kaj Industrio. Nun ĝi difinis sian urĝan taskon je kompilo de moderna fakterminaro por komercio kaj industrio, kiu samtempe estu difina kaj poliglota. Por tio ĝi bezonas moralan kaj financon apogon de multaj industriaj kaj komercaj entreprenoj. Estus dezirende, ke oni donu al ĝi subtenon per informoj pri adresoj de komercaj kaj industriaj entreprenoj, kiuj eble simpatias kun la celoj de EKI kaj pretas esti ĝiaj apogantoj. Ĝia adreso: E.L.M. Wensing, Aalsterweg 217, EINDHOVEN, Nederlando.

ARANĜOJ DE ESP-ISTA KULTURDOMO

La Esperantista Kulturdomo en Kastelo "Grésillon" BAUGÉ (M.-et-L), Francio, planis viglajn agadojn en la kuranta jaro. La aranĝoj estas dividitaj en tri periodoj. De la 4-a de julio ĝis la 29-a de aŭgusto la programeroj sinsekvos unu alian. Ĝi atendas multajn vizitantojn.

LETEROJ EL SUD-VJETNAMIO
(Dua Volumo) — Redaktita kaj eldonita de la Fremdlingva Eldonejo, Hanojo, 1964. Formato 13×19 cm. 214 p.

Kun ekscitiĝo mi legis ĝian unuan volumon, pri kiu recenzis Honfan en EPĈ, n-ro 5, 1964. Nun, unu-spire finleginte la duan volumon, mi sentas, ke mi devas eldiri mian emociiĝon al ĉiuj.

La tiel nomata "speciala milito" kondukata de la usona imperiismo en la suda parto de Vjetnamio estas plej kruela tipe agresiva milito. La tuta teritorio de suda Vjetnamio estas loko kie la usonaj imperiistoj faras masakradon kaj bestaĵojn. La centoj kaj miloj da tiel nomataj "strategiaj vilaĝetoj" fakte estas malliberejoj por la sudvjetnama popolo. En Rach Ko, la hommortigantoj de la uson-dziema kliko tute malpermesis al la loĝantoj provizadon per trinkakvo kaj samtempe ili sendis teroristojn malpurigi la akvujojn per fekaĵo por devigi la popolamasojn preni venenitan akvon distribuitan de ili. Ili venenis panon kaj viandon antaŭ ol ilin distribui al la loĝantoj, tiel, ke "la toksitaj homoj vomis, laksis kaj dolore kriegis..." Des pli kruelega estas, ke arestinte kelkcent homojn, ili eĉ rompis iliajn kraniojn kaj krurojn, puŝpelis la senkulpulojn en rizkampojn, erpis sur iliaj kapoj, kaj tiel transformis la marĉan rizkampojn en maron de sango.

Tamen ĝuste kiel diris unu el la leteroj: "Ju pli granda estas la malamika subpremado, des pli firme decide oni sekvas la revolucion." Ĉie bolas luktoj. Kiam la malamikoj starigis "strategiajn vilaĝetojn", la popolo fordetrus ilin, ŝanĝante ilin en batalajn vilaĝojn. Ĉe la malamikoj estis tranĉeoj kaj remparoj, sed la popolo farĉis regionojn per minoj, aranĝis foskaptilojn kun pikiloj k. s. por mortigi la malamikojn. Kiam alflugis militaviadiloj, ili paffaligis ilin. Kiam alvenis tankoj, ili eksplodigis ilin per grenadoj....

Ĉie leviĝis popolaj herooj en la luktado. Flegme brava maljuna patrino per sia korpo ŝirmis embuskantan batalanton por sukcese ekstermi la malamikojn. En iu loko virinoj kun infano sur la brako amase venis al malamikaj pafnestoj, staris antaŭ la kanonfaŭkoj, kaj per firmdecidaj agoj kaj persvada elokvento devigis la dziemajn soldatojn ĉesigi pafadon, kaj tiel disfalis la malamikojn. Knabo kiu hieraŭ nur pafis birdojn per ŝtonĵetilo, hodiaŭ jam fariĝis pafertulo, timiganta la malamikojn, kiel tigro. En malliberejoj ankaŭ junulinoj kaj maljunulinoj persistis en batalo, preferante morti ol submetiĝi; la milita propagando fare de la gerilanoj, kiuj, sin alivestinte, eniris kaj sturmis malamikan administrejan oficejon, teruregis la malamikojn.

Unuvorte, ĉu maljunuloj aŭ junuloj, ĉu viroj aŭ virinoj ĉiuj sin ĵetis en la ardan luktadon.

La situacio de la usonaj agresantoj kontraŭas al iliaj imagoj. Kiam ili entrudiĝis ĉi tien, ili estis sieĝataj de la popolo, kvazaŭ dronantoj en vasta maro.

Same kiel la unua volumo, ankaŭ tiu ĉi estas ne nur kolekto de privataj leteroj el la Sudo al parencoj, amikoj kaj kamaradoj en la Nordo, sed ankaŭ libro en kiu 14 milionoj da sudvjetnamaj popolanoj, per sango kaj larmoj, akuzas al la tuta mondo la krimagojn, kiujn faris la usona imperiismo en Sudvjetnamio, kaj militproklamo skribita per flamoj, en kiu ili ĵuras firmdecide batali ĝisfine kontraŭ la usona imperiismo kaj ĝiaj lakeoj. Ĝuste tiu ĉi batalspirito montras: "Nepre fiaskos la usona imperiismo kaj nepre triumfos la vjetnama popolo!", ĝuste tiu ĉi decidemo montras, ke la usonaj agresantoj ne povas savi sin el la fiaska fatalo eĉ per ĉiaj modernaj armiloj.

Kiu povas ne emociiĝi, legante tiun ĉi kronikon pri la bestagoj de la usonaj agresantoj skribitan per sango, larmo, indigno kaj heroa lukto de la sudvjetnama popolo! Eble iuj dirus, ke ĝi estas plenŝarĝita de malamego. Jes. La faktoj ja tiel diras. Tamen tio estas objektivaj faktoj. Tiuj, kiuj estigis la malamegon, ne estas la verkantoj de la leteroj, nek la sudvjetnama popolo. La malamego estas kaŭzita

de la manpleno da regantoj de Usono. Ĉu oni povas fermi siajn okulojn antaŭ la faktoj nur pro iluzio pri paco? Ĉu la sudvjetnama popolo ne devas leviĝi por rezisti, alfrontante tiujn terurajn korŝirajn kaj abomenegajn krimojn? Mi konsideras, ke riproĉo fare de s-ro Russell de Britio al la usonaj agresantoj estas justa. Tial, mi rekomendas la leterkolekton al la pacamaj kaj justamaj esperantistoj, kiuj respektas faktojn. Ĝi estas utila por kompreni la volon de la nuna azi-afrika popolo. Krome, la lingvo estas simpla kaj konciza, tial ĝi estas bona legaĵo por ĉiuj.

Lin Ŝiahua


FUNDAMENTO DE ESPERANTO kaj LINGVAJ RESPONDOJ de L. L. Zamenhof — La unua kun formato 15×21.5 cm., p. 356, kaj la dua kun formato 13×19.7 cm., p. 134. Ambaŭ estas eldonitaj de la Esperantaj Francaj Eldonoj (11, Rue Paul-Vergnes, MARMANDE, Francujo) en 1963 kaj 1962 respektive.

Delonge oni plendis, ke la klasikaj verkoj de Esperanto kaj eĉ la Fundamento estas apenaŭ troveblaj por la nova generacio de la esperantistaro. Estas ĝojinda afero, ke en lastaj jaroj kelkaj Esperantaj eldonejoj klopodis ŝtopi tiun ĉi mankon. La nunaj du libroj estas parto de ilia frukto.

Estas superflue akcenti la gravecon de tiuj ĉi verkoj. Tamen mi devas aldoni, ke pro zorga aranĝo de la eldonintoj, la novaj eldonoj havas pli grandan utilon por konsultado de la esperantistoj. Ekz-e en la *FUNDAMENTO DE ESPERANTO* la eldonintoj kolektis ĉiujn koncernajn materialojn. Krom Antaŭparolo, Gramatiko, Ekzercaro, kaj Universala Vortaro troviĝas ankaŭ Deklaracio pri la Esenco de la Esperantismo, Akademiasjaj Korektoj de la Universala Vortaro en kvin lingvoj, kompara teksto de la *KVINLINGVA FUNDAMENTA GRAMATIKA* ktp. Krome aldoniĝis enkondukoj, notoj kaj lingvaj rimarkoj de D-ro A. Albault. Tio multe helpas al la legantoj kompreni pri la estiĝo de Esperanto. Ankaŭ la *LINGVAJ RESPONDOJ* eldoniĝis en pli klara aranĝo kun utila indekso.

EL AFRIKO — Unua broŝureto de la libret-serio "Legu kaj Lenu" redaktita de Derrick Faŭx, poŝformata kaj multobligita kun 24 p. Ĝi enhavas 13 pecojn da simplaj infanaj legaĵoj kaj kantoj. Ili ĉiuj temas pri Afriko. Laŭ aserto de la redaktoro, sekvos aliaj similaj broŝuroj.

Honfan



KORESPONDI DEZIRAS

*Pli ol 300 kursanoj diversagaĵ k divers-profesiaj, Pola Esp. Asocio, Nowy Swiat 27, Varsovio, Pollando.

*Sendu belajn bk filatele afrankitajn de via lando. Rekompencos per bk de Roma, Napoli, kc. laŭ dez. Bagnis Romano-Salesiani, Pietrasanta (Lucca), Italio.

*Lernantoj 15-17j. de metilernejo en granda ferfabriko dez. kor. Skribu multnombre. Skribonto ricevos foton de nia ferfabriko. Odborne uciliste VZKG, Vedeni uciliste, Ostrava-Hrabuvka Hasiccka, Ĉeĥoslovakio.

*Dez. interŝ. pm. per 100/200 malsamaj kun ĉl. Ĉiam respondos. R. Melo, 6 pl. Jules Ferry, St. Etienne (Loire), Francio.

*3-a klaso, 8-j. infanoj dez. kor. per il. k. Lernejo de P'Paco, Platz OdF 12, 195 Neuruppin, GDR.

*Grupanoj en infanvartejo 10-13 j. dez. interŝ. il. k. kaj donacetojn per E. Hort, Karl-Liebkecht-Str. 1, 195 Neuruppin, GDR.

*Gelernantoj (10-14j.) pri ĉt. Ĉeneral-lernejo, Hodmezovasarhely, Szek u. 5. Hungario.

*Atanas D. Atanasov, Ĉatalĝa No. 4, Ruse, Bulgario, kun ĉl.

*Vasil D. Velĉev, bul. Aprilov-144, Gabrovo, 4, Bulgario, precipe kun aziaj, arabaj k afrikaj landoj.

*Lojevski Eugeniusz, Bialystok1, Skrytka pocztowa 27, Pollando, pri filatelio k aliaj temoj.

*Juri Mustafin, Proletarskaja, 7 kv. 3, Olonec (Aunus), Karelio, USSR, kun junularo de ĉl.

*Ŝurigina Nataŝa, Gedraiĉio 49-3, Vilnius-5, USSR, kun infanoj de ĉl.

*Sendu plej multnombrian interesan bildmaterialon por ekspozicio sub devizo "Tutmondaj fervojoj en bildoj kaj diagramoj". Ĉiuj kompare kun la jaro 1946, povas esti esprimitaj en %. Aldonu esp. klarigojn. Zavodni klub CSD, Esp. rondeto, Havlickuv Brod, ĈSSR.

*Stefano Mesterhaxy, ekselektisto, Pecs, Munkacsy str. 13, Hungario, precipe pri astronomio.

*F-ino Nastalska Zdzisława, Zary, Wisniowa Nr. 16, Pollando, kun ĉl. pri arto, literaturo, muziko, filmo k. interŝ. pm., gazetojn, librojn.

*Hermann Stern, Beloiannisz-strato 21, Szolnok, Hungario, pri fotoarto.

*Aleksandro Polacsek, 35-j., Vorosmarty-u. 14, Komlo, Hungario, kun ĉinaj, japanaj, vjetnamaj k. indoneziaj geesp-istoj pri ĉt. Nepre respondos.

*Denisov Evgeni, ulica Karla Marksa, dom 30, kv. 3, Gatchina, Leningradaska obl., Sovetunio, kun ĉl. k. interŝ. librojn (pentrarto) en la angla k. germana lingvoj k. kolorajn neskribitajn bk.

*Avni Dibra, Rr. "Shaqir Hoshafi" Nr.4, Tiran, Albanio, kun ĉl.

*Victor Rodriguez Coffigny, General Fox 303, Florida, Camaguey, Cuba (Kubo), kun ĉl. k. interŝ. revuojn, diskojn bk., jurnalajn.

*F-ino Genka Draganova Ivanova, "Batak" No. 10, Kazanlir, Bulgario, kun ĉl. pri ĉt.

*Avram Eusebiu, Ovesel-Oltetu, Oltenia, Rumanio, kun ĉl. k. interŝ. pm.

*Sutopobroto, Gajam Gk6/4, Jogjakarta, Indonezio, kun ĉl.



Humuraĵo

DU BIENULOJ

Antaŭ longe vivis du bienuloj, kiuj ambaŭ estis avaruloj. Iun tagon, Bienulo Ĝang vizitis Bienulon Li. Enirinte la pordegon li tuj ekkriis: "Ĉu Sinjoro Li estas hejme? Jen mi venas por manĝi ĉe vi." Lin akceptis la filo de Bienulo Li, demandante: "Kian bongustaĵon vi alportas?" "Jen pecon da viando!" respondis Bienulo Ĝang etendante sian manon. Sed en lia mano estis nur papero kun pentrita peco da viando. Tiam la filo de Bienulo Li, ankaŭ tre ruza, tuj sekvis: "Bone, mi regalos vin per farĉita kuko." Dume li prezentis per mangesto

grandan rondon. Bienulo Ĝang ne niom profitis el tio, kaj foriris grizhumore. Iom poste Bienulo Li hejmevenis. La filo tion rakontis al li memkontente. Tion aŭdinte Bienulo Li forte ekkoleris, kaj donis al la filo vangfrapon. Gestmontrante per siaj manoj malgrandan rondon, li diris: "Kia malavaro! Kial ne doni malpli grandan!"

KIEL DEPRENI

Vangĉjo montris ĉenon el sep plastaj ringoj al Liĉjo kaj diris: "Mi donacos ĝin al vi, kondiĉe ke vi prenos ĉiutage nur unu ringon kaj ne rompos pli ol unu ringon ĝis la finpreno."

Cerbuminte Liĉjo elpensis bonan metodon, kaj sukcesis. Sed kiel?



Esperantaj Bildolibroj por Geknaboj



Ni liveras ankaŭ multajn aliajn Esperantajn librojn por geknaboj kaj gejunuloj. Detalan katalogon ni sendos laŭ peto.

Mi Volis Viziti Lernejon

Tria eldono, 1964

78 p., 13 × 17.5 cm.

Prezo: £.0-1-6, Us\$0.20, Gld.0.75, Rb.0.19

Bela Konvolvulo

22 p., 18 × 20.5 cm.

Prezo: £.0-0-9, Us\$0.10, Gld.0.40, Rb.0.09

Karpetoj Transsaltis la Drakpordon

32 p., 18 × 20 cm.

Prezo: £.0-1-3, Us\$0.18, Gld.0.65, Rb.0.16

La Fiera Generalo

22 P., 26 × 19 cm.

Prezo: £.0-1-6, Us\$0.20, Gld.0.80, Rb.0.19

La Kvin Fratoj

12 p., 26 × 19 cm.

Prezo: £.0-1-6, Us\$0.20, Gld.0.80, Rb.0.19

Rakontoj pri Simioj

12 p., 20 × 19 cm.

Prezo: £.0-1-6, Us\$0.20, Gld.0.80, Rb.0.19

LIBROSERVO DE ĈINA ESPERANTO-LIGO (P. O. Kesto 313, Pekino, Ĉinio)



Printempo Venis al Li-rivero

Foto de Ĉen Jagiang



6611